

# EL POPOLA ĈINIO

# Vortoj de Prezidanto Maŭ

La havaĵoj de la socio estas kreitaj de la laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj intelektuloj mem. Se ili ekposedas sian sorton, sekvas la marksism-leninisman linion kaj ne evitas problemojn, sed aktive solvas ilin, ĉia ajn malfacilo en la mondo estas solvebla.

---





Vivu, longe vivu la granda instruanto

Prezidanto Maŭ!

# Riĉega Rikolto de Tritiko en Pekinaj Antaŭurboj

Firme efektivigante la grandan strategian principon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito**”, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de la popolaj komunumoj en la pekinaj antaŭurboj plene streĉas sian revolucionan energion, aktive kaj bone faras produktajn laborojn kaj akiris ĉijare riĉegan rikolton de tritiko maloftan en la historio.





*(Supre)* Migeĝuang-a Brigado de Ĉeng-guan-komunumo, Ŝunji-gubernio, jam akiris riĉan rikolton en 5 sinsekvaj jaroj. Revoluciaj kadroj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado serioze resumas sian sperton en riĉrikolta tritika kampo.

*(Sube)* Komunumanoj de Nangaŭ-brigado de la Ĉina-Albana Amikeca Komunumo ventolas tritikon. Ili faris firman decidon ke la tritiko estu seka, pura kaj komplete kolektita sen perdo de iu ajn grajno.







Revoluciaj instruistoj kaj studentoj de Kinghua-universitato degrajnis tritikon kune kun malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Jangfang-komunumo, Ĉangping-gubernio.

Agrikulturante por la revolucio kaj ne forgesante la Partion kaj Prezidanton Maŭ post riĉa rikolto, la komunumanoj pretas vendi la plej bonan tritikon al la ŝtato.





# Antaŭen Marŝas la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio

**A**NTAŬNELONGE, ni vizitis unu el la plej grandaj industriaj bazlokoj de fero kaj ŝtalo de nia lando — la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio. La laboristoj de tiu ĉi kompanio harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio batalas sur siaj laborpostenoj kun senprecedenca revolucia entuziasmo. De la minejo kun bruegado de maŝinoj ĝis la ŝtalfandaj fornegoj kun disŝprucantaj fajreroj, de la gigantaj altfornoj ĝis la intense laborantaj laminatiloj, ĉie vidiĝas kortuŝaj scenoj de fervora produktado.

## KREADO DE NOVAJ REKORDOJ

La ferŝtala kompanio estas metalurgia kombinumo konsistanta el dekoj da grandaj kaj malgrandaj fabrikoj. Antaŭ la Liberiĝo, la vastaj amasoj de ĝiaj laboristoj suferegis de ekspluatado kaj subpremado fare de imperiismo kaj kapitalistoj kaj vivaĉis en mizerego. Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio antaŭen marŝas flugrapide laŭ la larĝa socialisma vojo per heroaj paŝoj.

Laŭ statistikoj, en la 59 jaroj de 1890, kiam fondiĝis la Hanjang-a Ferŝtala Uzino ĝis 1948, la malnova Ĉinio produktis entute nur kelkajn milionojn da tunoj da ŝtalo. Sed sole en la tri jaroj de 1958 ĝis 1960, la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio jam produktis pli multe da ŝtalo ol la malnova Ĉinio en la 59 jaroj. En la pasintaj 20 jaroj de post la Liberiĝo, kaj precipe en la senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la kompanio senĉese akiris novajn venkojn en revolucio kaj produkto, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, strikte sekvante la grandan

strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ kaj agante sub la direktado de la orientilo de Prezidanto Maŭ de sendependeco kaj memstareco kaj sinapogo sur la propraj fortoj.

En 1968, kuraĝigate de la Plivastigita Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, la tuta kompanio renovigis centojn da rekordoj de plej alta produkto en la historio, faris pli ol 1,000 erojn da teknikaj renovigoj, el kiuj sin trovis pli ol 400 gravaj teknikaj renovigoj, kaj sukcese provproduktis multajn novajn produktaĵojn. En la unua sezono de 1969, la produktokvantoj de ŝtalo, fero, ŝtalaj ŝtipetoj, ŝtalaj materialoj, metalurgia koakso, erco, prilaborita erc pulvoro k. a. ĉefaj produktaĵoj superis la plej altan nivelon de la sama periodo en la historio. Alte tenante la unuiĝan kaj venkan flagon de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio unuanime batalis en solidareco, multe rapidigis la paŝojn de batalo, kritiko kaj reformo en la tuta kompanio kaj akcelis la novan antaŭensalton en produkto de ŝtalo kaj fero. Ekzemple, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de ĝia fabriko de senjuntaj ŝtaltuboj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, energie faras teknikajn renovigojn kaj dank' al tio la nombro de la novaj specoj kaj varioj de ŝtaltuboj produktitaj dum la Granda Proletara Kultura Revolucio estas pli granda ol la totala nombro de tiuj produktitaj en dek jaroj antaŭ 1965, kaj ili jam bone scipovas produkti diversajn altklasajn precizajn senjuntajn ŝtaltubojn.

En la lastaj jaroj, la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio elfaras novan produktaĵon meznombro en ĉiu tago. Interalie ĝi produktis U-ŝtalajn fostojn por konstruado de hidroelektoj, kajoj kaj digoj,



*La revoluciaj komitatanoj de la Unua Ŝtalfanda Fabriko de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio konstante venas al la plejfronto de produkto por gvidi la amasojn solide efektivi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ.*

diversajn laminatitajn ŝtalaĵojn kaj alojajn ŝtalplatojn por konstrui eksterordinare grandajn pontojn, diversajn alojajn ŝtaltubojn por fari altpremajn ujojn kaj tutajn seriojn da materialoj bezonataj por fervoja transportado kaj fabriko de aŭtoj kaj agrokulturaj mekanikaĵoj.

### KREO DE NOVA VOJO

En la pasinteco, la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio povis produkti nur centojn da specoj de ordinaraĵoj ŝtalaĵoj, sed nun ĝi jam povas produkti milojn da diversaj specoj de ŝtalaĵoj, kaj multaj el ĝiaj ĉefaj produktaĵoj jam atingis aŭ superis la avangardan nivelon de la mondo.

Dum la vizitado, ni aŭdis, ke multaj laboristoj diris kun heroa sento: “Ni nepre forbalaos la reviziisman entreprenan linion de filozofio de sklaveco antaŭ fremduloj, rampismo kaj ‘profito en komando’, antaŭenpuŝitan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, en la historian rubujon, kaj ni nepre senĉese marŝados antaŭen laŭ la socialisma entreprena linio de sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj

fortoj kaj la principoj de ‘Konstitucio de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio’, t.e., la larĝa vojo, kiun Prezidanto Maŭ montris al ni!” La nova venko akirita de la kompanio en disvolvado de ordinaraĵoj malalt-alojaj ŝtaloj ja estas venko akirita en irado de tiu vojo. Tiu vojo estas senlime larĝa brila vojo montrita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj pionire elhakita de la ĉina popolo per pena luktado.

Karbona ŝtalo ja ĉiam okupas gravan lokon en la ŝtalproduktaĵoj de la mondo. En la penso de multaj homoj, tio ĉi fariĝis leĝo neŝangebla. Sed en la socialisma konstruado de nia lando necesas pli multaj kaj pli bonaj ŝtalaĵoj. Jen prezentiĝis kontraŭdiro. Kiel ĝin solvi? La granda renegato Liu Ŝaŭki energie kolportis la filozofion de sklaveco antaŭ fremduloj kaj rampismon, kaj pledis por sinapogo sur la burĝaraj reakciaj teknikaj “aŭtoritatoj” kaj “specialistoj”, kaj por iri la malnovan vojaron de disvolvado de karbonaj ŝtaloj, kiun iris aliaj landoj. En 1957, kiam ŝtalaĵoj laboristoj de nia lando sukcese provproduktis la unuan specon de ordinara malalt-aloja ŝtalo utiligante enlandajn riĉfontojn, laŭ la instruo de la



granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke “ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj rampadi paŝon post paŝo post la aliaj”, ili ricevis oponadon fare de Liu Ŝaŭki kaj lia plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en la metalurgia branĉo. La lastaj kalumniis, ke tio estas “troa ambicio” kaj ke la laboristoj “deziras ion krei, eĉ ne sukcesinte en imita produkto de karbonaj ŝtaloj laŭ fremdlanda metodo”. Ili starigis diversajn barojn al la laboristoj en la eksperimentoj kaj produktado kun la vana espero sufoki tiun ĉi novnaskiton en la lulilo.


La kreemo de la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj estas barebla de nenia forto. Ĝuste en la antaŭensaltega jaro 1958 kaj la periodo post ĝi, agante laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ “rompi superstiĉon kaj liberigi penson” kaj kuraĝigate de la “Konstitucio de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio” persone ellaborita de Prezidanto Maŭ, la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio, kune kun revoluciaj laboristoj de aliaj frataj unuoj, rompis la rampisman katenon de la granda renegato Liu Ŝaŭki, levis amasan movadon por energia provprodukto de

malalt-alojaj ŝtaloj kaj kreis nombron da novaj specoj de ordinaraĵ malalt-alojaj ŝtaloj. Tia ŝtalo estas elfandita dank’ al sinteza utiligo de duaj metaloj en feraj ercoj. Ili estas multe pli bonaj ol karbonaj ŝtaloj. La maŝinoj faritaj el ili estas relative malgrandaj; dank’ al apliko de ili en domkonstruado, la framoj fariĝas malpezaj; la reloĵ faritaj el ili estas pli solidaj; kaj ĉeftraboj de aŭto faritaj el ili atingis ŝarĝ-koefficienton super la avangarda nivelo internacia. La revoluciaj laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio kreis novan vojon de nia lando por disvolvi ordinaraĵ malalt-alojajn ŝtalojn.

### LA PLEBAJ ESTAS LA PLEJ SAĜAJ

Alveninte al la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio, ni vizitis ankaŭ la Anŝan-an Ekspoziciejon pri Teknika Renovigo. El la multnombraj kaj tre variaj ekspoziciaĵoj tieaj, ni vidis propraokule la senliman saĝon kaj kreaĵ talenton de la laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio, kiujn ili elvolvis en la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la direktado de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la “Konstitucio de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio”.

*La revoluciaj laboristoj de la Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio produktas bonkvalitajn tubojn por la ŝtato.*



Fere solidaj faktoj plene pruvis la grandan veron montritan de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ke “la laborista klaso nepre devas gvidi ĉion”, kaj “la plebaj estas la plej saĝaj! La aristokrataj estas la plej stultaj”.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj rompis la teknikan administran organizon, kiun longe regis la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la burĝaraj teknikaj “aŭtoritatoj”, fondis grupon de teknika renovigo kun laboristoj kiel la ĉefaj elementoj kaj partopreno de revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikistoj, levis potenctajdon de teknika renovigo kaj kreis multajn miraklojn neimageblajn por la burĝaraj filistroj.

Post kiam la laboristoj de iu ferminejo de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio ektenis la teknikan potencon, ili sukcese faris grandan eksplodigon de la kolonoj por elpreno de la erco en ili. Tio estis alia triumfa kanto de Maŭzedongpenso, laŭte

*La konstanta Komitatano de la revolucia komitato de la Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio kaj laboristo-inĝeniero Li Ĝenming (maldekstre) diskutas pri teknika renovigo kun la revoluciaj laboristoj en la laborejo por varma laminatado.*




sonanta tra la aero de Anŝan en la Granda Proletara Kultura Revolucio. En tiu ĉi eksplodigo oni aplikis progresintan teknikon, kaj per unufojo oni sukcesis faligi tiel multe da erco, ke la eksplodiga tasko por 1969 estis superplenumita, kaj tiel kreis grandan kvanton da riĉaĵo por la ŝtato.

Malhavante pretajn ekipaĵojn kaj teknikan materialon, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Fabriko de Grandtipaj Laminatitaj Ŝtalaĵoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio sin apogis sur la vastaj amasoj de laboristoj laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ kaj produktis novan specon de relo por nia lando en la jaro 1968, kaj la unuaklasaj produktaĵoj de tia relo konstante okupis pli ol 97 procentojn. Kaj per tio ili vicigis la produktan teknikon de reloj de nia lando en la progresintan nivelon de la mondo. La produkto de tiaj reloj havas gravan signifon por la fervoja konstruado de nia lando. Dank’ al tio, la trako povas uziĝi pli longe, multe da ŝtalo kaj konstrua kosto povas esti ŝparitaj, kaj krome la rapideco de la vagonaro povas esti pligrandigita kaj la transporta kapablo de la fervojo povas esti plialtigita.

En la jaro 1958, la Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio ricevis taskon de produktado de tubŝeloj el speciala alojŝtalo. Sed la reakciaj teknikaj “aŭtoritatoj” de tiu fabriko okupiĝadis pri tio dum pluraj jaroj post fermita pordo, faris plurajn eksperimentojn kaj fiaskis ĉiufoje. La revolucia amasa kritikado en la Granda Proletara Kultura Revolucio multe stimulis la revolucionan entuziasmon de la vastaj amasoj de laboristoj. Kun fidela koro al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ili sin ĵetis en la provfaradon de tubŝeloj el speciala alojŝtalo. La laboristoj-kamaradoj sur diversaj laborpostenoj ĉiuj turnis sian zorgon al la sama afero kaj koncentris siajn fortojn al la sama tasko kiel kuntordita ŝnuro, kaj plene disvolvis la kolektivian saĝon de la laborista klaso kaj la noblan respondecon de mastroj. La varmiga fornego staris ĉe la unua paŝo en la aŭtomata produkta linio,





*Ŝtalaj reloj kun longeco de 25 metroj grandkvante produktitaj de la Fabriko de Grandtipaj Laminatitaj Ŝtalojoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio*

kaj ĝi estas unu el la ŝlosilaj ĉeneroj por la sukceso de la eksperimento. La maljuna laboristo Ĝang Bajhoŭ agis tiel zorgeme kaj serioze kaj strebadis por pli bona rezulto kiel kamarado Bethune en kuracado de pacientoj. Li varmigis la ŝtalŝtipon ĉiuparte egale ĝis ĝusta temperaturo kaj tiel pretigis favoran kondiĉon por la laminatado. Kiam la unua brila ruĝa ŝtalŝtupo estis kaptita de la truiga maŝino, spertaj laboristoj de laminatado de ŝtal-tuboj tuj aŭdis ĝojigan bruon kaj vidis sukcesan signon. Venke naskiĝis la unua tub-ŝelo el speciala alojŝtalo!

### **LA LABORISTA KLASO ĈIAM FIDELAS AL PREZIDANTO MAŬ**

La senprecedenca Granda Proletara Kultura Revolucio akcelis kaj antaŭenpuŝis la rapidegan disvolviĝon de la revolucio kaj produkto de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio. Nova alta tajdo leviĝis en la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ inter la vastaj

amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj. La laboristoj de la kompanio armitaj per Maŭzedongpenso profunde komprenis el sia praktika batalado la veron, ke oni certe povas marŝi de venko al venko, se oni strikte sekvas la strategian dispozicion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj centpocente efektivas la sinsekvajn plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Sub la flegado de Maŭzedongpenso, la heroaj gefiloj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio sane kreskas.

Maljuna laboristo-kamarado Vej Bingkuj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio estis orfo en la malbeninda malnova socio. Li komencis almozadi, kiam li estis nur 7-jara, kaj kiam li estis 11-jara, li venis al la gistuba fabriko de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio (antaŭe sub la posedo de la japana monopola kapitalisto Kubota dum la japana regado) por labori en ĝi kiel knabo-laboristo. Li havis nur krudajn manĝaĵojn kaj vivis pli mizere ol ŝarĝbrutoj. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ savis lin el la maro de mizeroj. Poste, dank' al

flegado kaj edukado de la Partio li glorie kompartianigis el ordinara laboristo kaj fariĝis revolucia batalanto de la proletaro. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, li firme staris kune kun la laboristoj de Anŝan, kaj laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj**” kaj sub la firma subteno de ĈPLA kondukis decideman batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki, frakasis la belan sonĝon de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Liaŭning-provinco kaj la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio vane provi restaŭri kapitalismon, kaj deprenis la de ili uzurpitan parton de la regpotenco partia, administra, financa kaj kultura. En la granda kultura revolucio, kamarado Vej Bingkuj prenis sur sin la oficojn de vicĉefkomitatano de la revolucia komitato de Liaŭning-provinco kaj tiu de la urbo Anŝan, honore partoprenis la Naŭan Tutlandan

*Bonkvalitaj gisfero, ŝtalaj ingotoj kaj ŝtalojoj estas transportataj grandnombre al diversaj lokoj por subteni la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de la lando.*



Kongreson de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel membro de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Kamarado Vej Bingkuj diris emocie: “Prezidanto Maŭ, ho, Prezidanto Maŭ, ĉio mia estas donita de vi. Nur dank’ al via ĝusta gvidado ni laborista klaso kaj laboranta popolo povis akiri liberiĝon! Mi firme decidis revoluciadi sekvante vin, la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ!” Liaj vortoj prezentis la komunan volon de la milionoj kaj milionoj da ĉinaj laboristoj.

Kvankam la pozicio kaj ofico de Vej Bingkuj ŝanĝiĝis, li tamen ĉiam tenas sian propran naturon de laboranta popolano, kaj ne ŝanĝiĝis lia bona penso kaj bona stilo de laborista klaso. En ĉiu semajno, li nepre uzas certan tempon por reiri al la fabriko por labori, interparoli korverŝe kaj studi verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun laboristoj. Se iuj kamaradoj estas en malfacilo, li do faras sian eblon por helpi ilin solvi la malfacilon. Li ricevis laŭdojn de la vastaj amasoj de laboristoj.

Tiaj bonegaj laboristoj kia kamarado Vej Bingkuj troviĝas tre multaj en la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio.

Nun, la vastaj amasoj de laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio estas levantaj ankoraŭ pli altan novan tajdon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, sub la gvido de la diversnivela revoluciaj komitatoj kaj alte tenante la standardon de solidareco kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio. Disvolvante la ĝisfundan revolucionan spiriton de pena strebado, sinapogo sur propraj fortoj kaj timo nek al penado nek al morto, strikte sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, ili decidis ankoraŭ pli bone konduki batalon, kritikon kaj reformon kaj akiri novajn venkojn!



# Marŝo sur Nia Propra Vojo de Industriigo

— Pri avangardaj agoj de la Eksperimenta  
Kemia Fabriko de Pekino

**L**A Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino estas relative granda fabriko de nia lando, en kiu kombiniĝas eksperimentado kun produktado. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, la amasoj de laboristoj kaj oficistoj de la tuta fabriko iras kun firma volo sian propran vojon de industriigo kaj akiris grandajn sukcesojn en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento.

## FONDI NOVAN EKSPERIMENTAN KEMIAN FABRIKON

La Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino naskiĝis en la tamtamado kaj tamburado de la antaŭensalto en 1958. En la unua jaro post la fondiĝo de la fabriko, la laboristoj iris sian propran vojon de industriigo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ. Kvankam tiutempe ĝiaj domoj estis simplaj kaj malbonaj kun nesufiĉaj ekipaĵoj, tamen laŭ la bezono de agrikultura produkto de nia lando, la laboristoj rapide sukcesis starigi per eksperimentoj teknologiajn procesojn por produktado de du specoj de kemia sterko kaj ilin disvastigis al la provincoj, municipoj kaj regionoj tra la tuta lando. Kaj samtempe, ĝi finis per la rapideco de la granda antaŭensalto la konstruadon de laborejo kies jara produkto estas pli ol dekmil tunoj da sinteza amoniako. Kaj poste, la laboristoj

elmetis planon de pliapaŝa disvolvo de scienca eksperimentado kaj produkto de kemisterko.

Sed la potenca amasa movado de antaŭensalto malplezurigis la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la malnova Kompartia Komitato de Pekino kaj de tiu fabriko. Ili fabrikis diversajn pretekstojn por oponi kaj malhelpi la laboristojn plenumi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ, kaj plenforte antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucion reviziisman entreprenan linion de Liu Ŝaŭki. Ili diris, ke “la klereco de la laboristoj estas malalta por fari sciencajn eksperimentojn”, kaj nur lasis ilin okupiĝi pri produktado. Dume ili konfidis al la specialistoj kaj altlernejaj diplomitoj funkciigon de la scienca eksperimenta laborejo, kaj ĉi tiuj tuttage faradis eksperimentojn kopiante spertojn el fremdulaj libroj, serioze sin disigante de produktado kaj praktiko.

La laboristoj tre indigniĝis pro la malhelpo kaj subpremo fare de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj kondukis firman batalon kontraŭ ili. Por akceli la disvolviĝon de scienca esploro kaj produkto, laboristoj elmetis raciajn proponojn unu post alia. En paklaborejo de amoniaka bikarbonato, la pakado estis plenumata per homforto. Tiu laboro estis peza, la produktiveco estis malalta kaj la pakado ofte

ŝiriĝis, kio plialtigis la produktkoston. Kaj krome amoniaka bikarbonato estas malutila al la sano de la laboristoj pro sia volatileco. Por plibonigi tiun laboron, la riparistoj elfaris pakmaŝinon rompinte la fremdlandan regularon. Sed la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon fabrikis diversajn pretekstojn por malpermesi la eksperimentadon kaj samtempe lasis reakciajn teknikajn "aŭtoritatulojn" libere fari "mekanikigon" de pakado. Ĉi tiuj faris eksperimentojn sen interligo kun la praktikado, faris plurajn plibonigojn sensukcese kaj nur malŝparis ĉ. 8 tunojn da ŝtalaĵoj kaj pli ol tridek mil *yuan*. Kaj tiamaniere sub la kontrolado de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, la scienca esplorado de tiu fabriko ne multe progresis kaj la jara produktkvanto de sinteza amoniako restis nur dudek mil tunoj ĝis la jaro 1965.

Kiel potenca printempa tondro, eksonis la batala klariono de la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ. Strikte sekvante la grandajn strategiajn dispoziciojn de Prezidanto Maŭ, la laboristoj de la Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino, kiuj estas senlime fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, faligis la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, fondis la novan revolucionan komitaton kaj firme tenas en siaj manoj la regpotencon de la fabriko. Kun ekzaltita spirito kaj ĝojo en la koro, la laboristoj ĉiuj diris: "La revolucia linio de Prezidanto Maŭ savis la Eksperimentan Kemian Fabrikon de Pekino. Ni nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj faros ĝin novtipa eksperimenta fabriko vere servanta al la konstruado de socialismo!" De pli ol tri jaroj, sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, profunda ŝanĝiĝo okazis kaj tute nova fizionomio aperis en la Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino. Strikte interligante sciencan eksperimentadon kun produkta praktiko, la laboristoj jam sukcese faris dudek kelkajn sciencajn esplorojn kaj iuj gravaj esploroj estas disvastigitaj al la tuta lando. En la paklaborejo de amoniaka bikarbonato la laboristoj kaj teknikistoj intime kunlaboris por provfabriki aŭtomatan pakmaŝinon. Dank' al la forta subteno de la revolucia komitato de la fabriko, ili baldaŭ sukcesis en provfabrikado. La produktaj rekordoj estas senĉese renovigitaj kaj la totala produktkvanto de sinteza amoniako en la jaro 1968 atingis pli ol tridek mil tunojn.

Prezidanto Maŭ instruas nin: "En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas, . . . la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn." Sed antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino estis regata de enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj la reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj" kiuj iris la malnovan vojon de fremdlandanoj kaj limigis la fabrikon tiel, ke ĝi povis produkti nur sintezan amoniakon kaj unu aŭ du aliajn produktaĵojn kaj povis fari nenian kreon kaj progreson. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso elmetis la jenan bravan sloganon: "Ni povas fari eksperimentojn por produkti ĉion, kion la socialisma konstruado bezonas!" Bonega ekzemplo pri tio estas la sukcesa eksperimentado, finkonstruo kaj ekproduktado de moderna laborejo de metilalkoholo.

Ĝi estas granda metilalkohola produktejo kun areo de pli ol mil kvadrataj metroj, ekipita per pli ol 100 maŝinoj kaj aparatoj. Ĝia ĉielskrapa distilatoro altas je 32 metroj. La tuta laborejo baniĝas tiel interne kiel ekstere en hela sunlumo. Laŭ malnova sperto, por konstrui laborejon de tiel granda konstrua laborkvanto kaj tiel alta konstrua kvalito, necesas almenaŭ unu kaj duona jaroj, sed ĉifoje, la laboristoj uzis nur iom pli ol 4 monatojn.


La finkonstruo de la laborejo de metilalkoholo eltrovis vojon por multe, rapide, bone kaj ekonomie disvolvi produkton de metilalkoholo por multaj ekzistantaj kemiaj fabrikoj de nia lando. Metilalkoholo estas grava baza organika kemia materialo nemalhavebla por la industriaj branĉoj de plasto, kaŭĉuko, medikamentoj, sintezaj fibroj, insekticidoj kaj naciddefendo. Sekve de la prospera disvolviĝo de nia nacia ekonomio, pli kaj pli grandiĝis la bezonata kvanto de tiu materialo, sed ĝia produktado ankoraŭ ne povis kontentigi tiun bezonon. Pro sia kontraŭrevolucia naturo, imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj ekstreme malamas la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de nia lando kaj klopodis fari blokadon kaj subfoson kontraŭ nia lando per embargo; kaj enlande, plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon plenenergie distrustumpetis sklavecon antaŭ fremduloj kaj rampis-



mon konforme al la bezonoj de imperiismo, reviziismo kaj la reakciularoj, intrigis restaŭri kapitalismon en nia lando; ĉio ĉi tio serioze malhelpis la disvolvon de produkto de metilalkoholo.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj” la laborista klaso de nia lando firme decidis elhaki novan vojon de produkto de metilalkoholo de nia lando. En januaro de la kuranta jaro, la Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino akceptis la gloran taskon de konstruado de metilalkohola produktejo. Fronte al tiu malfacila tasko, la laboristoj de la Eksperimenta Kemia Fabriko, senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ, marŝis ĉiam antaŭen renkonte al la malfaciloj! Veterana laboristo, kiu terure suferis de subpremado kaj ekspluatado en la malnova socio kaj ne scias eĉ la vorton “metilalkoholo”, eldiris firme la koran senton de la tuta laboristaro: “Kvankam ni veteranaj laboristoj estas sen alta klereco, tamen havante la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson ni timas nenion. Kiom ajn grandaj estu la riskoj, ni tamen ilin spitos; kiom ajn peza estu la ŝarĝo, ni tamen ĝin prenos sur nin; kaj ni nepre produktos metilalkoholon per la manoj de ni ‘kruduloj’!”


Ili organizis gvidan grupon de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefparto partoprenatan de gvidantaj kadroj kaj teknikaj laborantoj por gvidi la konstruadon de metilalkohola produktejo. Tiu gvida grupo unue zorgis ne pri bluplano kaj projektado, sed gvidis la laboristojn kritiki la reviziisman linion antaŭe efektivigitan de la enpartiaj potencentantoj irantaj la kapitalisman vojon en la kapitala konstruado de la fabriko, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “sen detruo ne estas konstruo”. En kritikado, laboristo okupiganta pri instalado de altprema akva kondensatoro diris: “Entreprenante kapitalan konstruadon en la pasinteco, la enpartiaj potencentantoj



*La alta distila turo de la metilalkohola produktejo*

irantaj la kapitalisman vojon en la fabriko sin apogis precipe sur fremduloj, ‘aŭtoritatuloj’ kaj fremdlanda helpo kaj uzis tri jarojn por konstrui ure-produktejon kun jara produktokvanto de dekmil tunoj. Por instali unu kondensatoron ili jam elspezis ĉirkaŭ kvindek mil *yuan*.” Ju pli ili kritikis, des pli akriĝis ilia senkompara malamo kontraŭ la plenmano da enpartiaj potencentantoj irantaj la kapitalisman vojon. Poste kuraĝigante kaj helpante unu alian, la laboristoj desegnis kaj rebonis ĉirkaŭ mil projektajn desegnojn kaj alprenis la metodon de samtempa konduko

*La vicĉefkomitatano de la revolucia komitato Joŭ Ĝenĝi (maldekstre) studas veldadon kun laboristo.*



de domkonstruado, instalado de mekanikaĵoj kaj provfunkciigo de unuopaj maŝinoj. Kiam la domo de la laborejo ankoraŭ ne finkonstruiĝis, ili jam komencis provprodukton per la mekanikaĵoj sub ŝirmo de barako.

Foje, iu frata fabriko en la ĉirkaŭaĵo pretigis por la konstruado de metilalkohola produkto 5 ŝtalajn traborojn ĉiu kun longeco de 24 metroj kaj pezo de pli ol 10 tunoj. Tiam oni ne povis trovi transportilon por ilin venigi al la konstruejo. Por ne prokrasti la konstruadon, laboristoj elpensis rimedon por solvi la problemon, nome dividi iun ĉaron en du partojn kaj per ili aldoni radojn al la traboroj. Unuj tiris kaj aliaj puŝis, oni luktis pli ol ses horojn en nokto kaj fine transportis ilin al la konstruejo. En la metilalkohola produkto, oni devis instalati ĉirkaŭ cent maŝinojn, sed la fabriko tiam ne havis sufiĉe da muntistoj kaj lev-instrumentoj por plenumi la laboron. Por venki la malfacilojn, la laboristoj rompintis la limojn inter labor-

specoj kaj disvolvis la komunisman spiriton de vasta kunlaboro tiel ke stabllaboristoj kaj tubolaboristoj agis kiel veldistoj kaj stabllaboristoj agis kiel arganmanipulantoj; kie troviĝis peza laboro, tie tuj aperis helpaj manoj. Dank' al kolektiva klopodado ili ĝustatempe instalis la tutan maŝinaron.

La laboristoj de la eksperimenta kemia fabriko armitaj per Maŭzedongpenso havas neelĉerpeblajn saĝon kaj fortojn. Ili subpremis la malfacilojn sub siaj piedoj, superis imperiismon, reviziismon kaj la reakciularojn kaj finkonstruis la grandan modernan metilalkoholan produktojn en nur kvar monatoj, farante kontribuon al la socialisma konstruado de nia lando.

### **REVOLUCIA GVIDA GRUPO**

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la revolucia komitato de la



Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino naskiĝinta en la intensa batalo inter la du klasoj kaj inter la du linioj ludis la rolon de bastiono en la produkta batalo kaj la praktiko de scienca eksperimentado.

Post sia fondiĝo, la revolucia komitato gvidis la laboristojn disvolvi profundan kaj longdaŭran revolucion kritikadon. Prenante la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj reakciaj teknikaj "aŭtoritatuloj" de la fabriko kiel vivan celtabulon, ili forte kritikis la absurdan teorion de Liu Ŝaŭki "administrado de fabrikoj per specialistoj".

Iu teknika "aŭtoritatulo", kiun antaŭe la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon laŭdadis kaj metis sur gravan postenon, pretigis projektan desegnon de maŝinpeco de aŭtomata koaks-provizilo laŭ fremdlanda sperto, sed procedante laŭ tiu desegnaĵo, la laboristoj neniel povis munti la maŝinpecon. Poste la laboristoj faris projekton laŭ la reala stato kaj sukcesis. Iuj tamen ankoraŭ ĉiam pensis, ke en la desegno de la "specialisto" certe estas io sekreta ankoraŭ ne mastrita de ili. Dum la amasa kritikado iuj laboristoj do vokis la "specialiston" al la produktejo kaj diris, ke li surmuntu la maŝinpecon laŭ lia propra desegno. Vizaĝe al la maŝinpeco, la "specialisto" prenis la desegnaĵon per tremantaj manoj, longe provis, sed ne povis ĝin surmunti. Nur kiam laboristoj riproĉe lin demandis, li fine malkaŝis sian sekreton, nome lia tasko estis nur desegnado, sed li mem ne sciis, ĉu la maŝinpeco povas esti muntita aŭ ne. Tion aŭdinte, la laboristoj diris indigne: "Tiu ĉi sinjoro 'specialisto' estas ne nur reakcia en ideologio, sed ankaŭ sentaŭga en tekniko. Ili povis longe agi laŭplaĉe en la fabriko kaj laŭvole malestimi kaj subpremi la laboristojn nur pro la protektado de la absurda teorio de Liu Ŝaŭki 'administrado de fabrikoj per specialistoj'. Ni nepre ĝisfunde kritiku tiun teorion prenante Maŭzedongpenson kiel armilon kaj vere tenu la potencon de produkto kaj scienca esploro en la manoj de la laborista klaso!"

Laŭ la opinioj de la laboristoj de la tuta fabriko, la revolucia komitato organizis gvidan grupon de scienca esploro kaj produktado de la tuta fabriko kun laboristoj kiel ĉefa forto, nome la produktan grupon de la revolucia komitato. La estro de tiu ĉi grupo estas la reprezentanto de la amaso en la revolucia komitato, la veterana veldisto Joŭ Ĝenĝi. Majstro Joŭ havas ne nur bonan tekni-

kon, sed pli grave estas, ke li havas ruĝan koron senlime fidelan al Prezidanto Maŭ. Li diris: "Ni laboristoj devas ĝisfunde nin liberigi ne nur en politiko, sed ankaŭ en produktado kaj scienca esploro. Sub la kondukado de Prezidanto Maŭ, mi nepre bone ludos la rolon de estro de la produkta grupo!" Li estas vicĉefkomitatano de la revolucia komitato, sed li malofte deĵoras en la kabineto de la revolucia komitato. Same kiel antaŭe, portante sian kutiman olemakulitan laboran bluzon kaj tenante sian kutime uzatan veldilon, li laboras en produktejo por konduki revolucion kune kun la laboristoj. Ankaŭ la aliaj membroj de la produkta grupo ne forlasas sian produktan laboron kaj praktikadon de scienca esploro. Ili studas verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun laboristoj en laborejoj por solvi la problemojn renkontitajn en penso, produkto kaj scienca esploro, ĝustatempe jesis la atingojn de la laboristoj en produkto kaj varme subtenis iliajn kreojn kaj renovigojn. Tial prospere iras la sciencaj eksperimentoj kaj produktado de la fabriko.

Gvidante la laboristojn en klasbatalo, produkta batalo kaj praktikado de scienca eksperimentado, la membroj de la revolucia komitato de la fabriko ĉiam staras sur la fronta linio. En ordinara tempo, sin trovas nur unu aŭ du deĵorantoj en la kabineto de la revolucia komitato, kaj la ceteraj komitatanoj ĉiuj iras en la laborejojn por teni la revolucion kaj stimuli la produktadon kune kun la laboristoj. Dum la tagoj de streĉa konstruado de la metilalkohola produktejo, la ĉefkomitatano de la revolucia komitato Zang Huabin ofte ne revenis hejmen post la deĵorado, sed restis en la kolektiva dormejo de la laboristoj por daŭrigi sian batalon tagnokte kune kun ili. Foje en noktmezo paneo okazis al la gasgeneratoro. Informiĝinte pri tio, li tuj organizis la eksterdeĵorajn laboristojn, rapidis al la loko, ĝin urĝe riparis dum la tuta nokto kaj garantiis la normalan funkciadon de la maŝino.

Kie montriĝis malfaciloj kaj problemoj, tie tuj aperis membroj de la revolucia komitato. Ilia revolucia laborstilo ricevis varmajn laŭdojn de la vastaj amasoj de la laboristoj.

La laboristoj de la Eksperimenta Kemia Fabriko de Pekino, senfine fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, prenas la jam akiritajn sukcesojn kiel novan starton por gajni pli grandajn venkojn kaj marŝas laŭ la brila vojo montrita de Prezidanto Maŭ, per la paŝoj de antaŭensalto sub la gvido de la revolucia komitato de la fabriko!

# *La Ruĝa Standardo*

## *de Daking*

### *en Plia Brileco*

KING TIAN




**L**A nomo Daking ligiĝas kun la historio de disvolviĝo de petrola industrio de Ĉinio. Sekvante la instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ “sinapogi sur propraj fortoj, peneme lukti, rompi superstiĉon kaj liberigi penson” kaj disvolvante revolucion spiriton maltimi penadon kaj laciĝon, la heroaj daking-aj laboristoj kun malplenaj manoj ekspluatistis la unuan grandtipan olekampion de nia lando per propraj fortoj en la senlima stepo. Sekve de tio ekspluatigis la dua, tria... Nun la petrola produkto de nia lando jam sufiĉas por memprovizado.

Baptite en la batalo de la Granda Proletara Kultura Revolucio Daking-olekampo havigis al si novan fizionomion; laboristaro de Daking — la avangarda trupo de la ĉina laborista klaso farigis pli viglanima kaj pli alta je batalvolo tra la rigora provado de la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso sub la forta subteno de la granda ĈPLA, la heroaj laboristoj de Daking eltiris agentojn de la granda renegato Liu Ŝaŭki en Daking, reguligis la kontojn kun ili pro iliaj krimegoj kontraŭ la Partio, socialismo kaj Maŭzedongpenso, komplete frakasis ilian intrigon restaŭri kapitalismon en Daking kaj defendis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Fondigis demalsupre supren la revoluciaj komitatoj de triflanka kombiniĝo en la tuta Daking-olekampo.

En solvado de multaj komplikaj problemoj oni devas unue kapti la radikan. La revoluciaj komitatoj de diversaj niveloj en Daking-olekampo prenas gvidon de la vastaj revoluciaj amasoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj seriozan efektivigon de diversaj proletaraj politikoj de Prezidanto Maŭ kiel siajn sanktan devon





*Nafto produktita en Daking estas sinsekve transportata aliloken por forte subteni la socialisman konstruadon de la patrolando.*

kaj plej fundamentan taskon. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“fondi studrondojn estas bona rimedo, ĉar multaj problemoj povas esti solvitaj en ili”** kaj lige kun la situacio de la Granda Proletara Kultura Revolucio de la tuta lando kaj stato de klasbatalo en propraj unuoj ili fondis diverstipajn studrondojn de Maŭzedongpenso por plene realigi serion da plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ. Pli ol 90 procentoj de revoluciaj amasoj, revoluciaj kadroj, revoluciaj oficistoj kaj laboristoj kaj iliaj familianoj partoprenis en ili. Kun disvolviĝo de la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, la veteranaj laboristoj reprezentataj de kamarado Vang Ginhi, la fama labormodelo de la tuta lando kaj vicestro de la revolucia komitato de Daking, akiris novan progreson en la intensa luktado inter la du klasoj kaj du linioj, dume ankaŭ ŝprucis granda nombro da novaj aktivuloj kaj progresintaj kolektivoj de viva studo kaj

viva apliko de Maŭzedongpenso. Senprecedence altiĝis la konscio de la vastaj revoluciaj amasoj pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj, la plej novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ kaj batalordonoj de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj kun Vicprezidanto Lin kiel la vicestro neniam estis tiel rapide kaj senbare efektivitaj kiel nun.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“nun unu el niaj gravaj taskoj sur la ideologia fronto estas disvolvi kritikadon kontraŭ reviziismo”** kaj sub la gvido de la revoluciaj komitatoj la vastaj laboristoj kaj revoluciaj amasoj de Daking aranĝis ĉie en laborejoj, putejoj kaj familioj batalkampojn de revolucia amasa kritiko por solide kritiki la kontraŭrevoluciajn reviziismajn nigrajn varojn en ekonomia fronto ofertitajn de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Daking. Ili diris kun profunda konvinkiĝo: **“Se la burĝaro ne estas**

firme kritikita, ĝi postlasos venenan radikon; se ĝi ne estas faligita per kritiko, nia regpotenco ne firmiĝos.”


La revolucia amasa kritiko stimulis la profundan disvolviĝon de la batalo, kritiko kaj reformo. Estas senĉese akiritaj novaj venkoj en batalo kontraŭ malamikoj, la neraciaj reguloj kaj sistemoj estas rompigitaj unu post la alia, kaj la produktfortoj estas multe liberigitaj. Kun vigla animo, alta batalvolo kaj plena energio la vastaj amasoj de laboristoj firme tenis la gvidantecon de revolucio kaj produkto, prenis sur sin la laborojn de planado, produktado, scienca esplorado de la olekampo kaj kun sentima heroeco kaj neelĉerpebla saĝo pene klopodas por kuratingi kaj superi la progresintan nivelon de la mondo. Prospere disvolviĝis la movado de teknika renovigo kaj teknika revolucio. La laboristaj amasoj de la sesa brigado de olekampa konstruado kuraĝe alprenis altpreman aŭtomatan akvomezurilon anstataŭ la mezurilon de flukvanto kaj tiamaniere okoble pliigis la laborproduktivecon kaj ŝparis por la ŝtato grandan kvanton da monrimedoj. Antaŭe en la kvindeka trupo de la dua parto de oleekspluato, du laboristoj zorgis unu oleputon, sed post abolo de neraciaj reguloj kaj starigo de nova sistemo de revolucia respondeco ili efektivigis antaŭensaltan planon, ke unu persono zorgas sep oleputojn. Por redukti la tempon en transportado de ekipaĵoj la putodrila trupo n-ro 3248 kun montotranslokiga spirito de la Malsaĝa Avo movis per homaj fortoj la grandan drilmaŝinon pezan je pli ol 60 tunoj al la nova putejo antaŭ ol veturigi traktorojn por transporti ekipaĵojn post findrilo de unu puto, manifestante la revolucian spiriton de la ĉina laborista klaso peneme lukti kaj sinapogi sur propraj fortoj. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de putodrila trupo n-ro 1205, kiu kreis la plej novan rekordon de la mondo en putodrila longeco de la jaro, denove akiris novan elstaran sukceson en rapidira putodrulado. La putodrila truopafa obusa fabriko kaj ĝenerala maŝinfabriko praktikis triflankan kombiniĝon de laboristoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikistoj kun la laboristoj kiel la ĉefa forto, prove sukcesis en la nova metiarto de truodrulado kun internacia nivelo. Apliko de tiu nova metiarto ne nur malpliigis la laborintensecon de laboristoj kaj altigis laborefikon, sed ankaŭ povas ŝpari por la ŝtato kelkcent tunojn da altklasa aloja ŝtalo ĉiujare. La oka trupo de oleokspluato piedpuŝis la burĝarajn reakciajn teknikajn “aŭtoritatulojn”,



*Junaj laboristoj de la 5-a trupo de la unua oleokspluata departemento de Daking sukcese fabrikis post provado cibernetikajn instalaĵojn por oleputoj kaj per tio malfermis novan vojon por modernigo de administrado de olekampo. La bildo montras, ke ili interŝanĝas komprenojn en viva studo kaj viva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ.*

rompis superstiĉon, transformis la oleputon neartezan en la artezan, kaj per tio akumulis valorajn spertojn por rapidigi ekspluaton de olekampo. La tasko de olekampa konstruado de Daking difinita en la tria kvinjara plano estas plenumita jam en 1968, t.e., antaŭdate je du jaroj. La taga produktkvanto de nafto jam superis la plej altan nivelon de la pasinteco. Nun sub la kuraĝigo de la spirito de la Naŭa Kongreso de la Partio la laboristaro de Daking solide plenumas la taskojn de diversaj etapoj de batalo, kritiko kaj reformo.





*En severa frosto heroe luktas la putodrilaj laboristoj de Daking.*



*La daking-aj laboristoj instalas konduktubon por rapidigi la konstruadon de la olekampo.*



# Noviĝas la Penso de la Noviĝas la



**P**RINTEMPO belas nun tutpatric kaj buntaj floroj aromas ĉie. Dank' al la Granda Proletara Kultura Revolucio, Maŭzedongpenso multe disvastiĝis kaj populariĝis en la tuta Vuhu-a Kartonfabriko "Oriente". Noviĝis la penso de la homoj, noviĝis ankaŭ la fizionomio de la fabriko kaj elspulis vulkane la grandega socialisma aktiveco en la amasoj.

En tiu fabriko estas tri fremdlandaj kaldronejoj, kies bruligebla restaĵo en la cindro ĉiam okupis 30-40 procentojn pro "malbona brulado", kaj ili malŝparis ĉiujare nekalkuleblan kvanton da karbo. Antaŭ dek jaroj laboristoj jam montris al la fremdlanda specialisto, kiu venis kune kun la kaldronejoj, la "malbonan bruladon" de la kaldronejoj. Sed tiam la fremdlanda specialisto kulpigis la laboristojn pri "teknika malalteco". Foje, li persone venis al la kaldronejoj ŝajnigante sin aŭtoritatulo kun la intenco paradi sian lertecon. Sed, neatendite, la bruligeblaĵo en la cindro el lia hejtado estis eĉ pli multa ol tiu de ni laboristoj. Tiam la fremdlanda specialisto absurde diris, ke "la kaldronejoj mem ne havas difekton, sed la kvalito de la ĉina karbo estas malbona". La

enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj aŭtoritatuloj en la fabriko tute staris ĉe la flanko de la fremdlanda specialisto kaj prenis liajn babilaĵojn kiel bibliion. Kvankam la laboristoj foje kaj refoje proponis renovigi la fremdlandajn kaldronejojn, sed la sinjoroj kiuj tenis la teknikan potencon tute ignoris tion. De tiam la tri fremdlandaj kaldronejoj fariĝis "tigra postaĵo" por neniu tuŝebla.

La Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando komplete frakasis la reviziisman linion de la granda renegato Liu Ŝaŭki en administrado de entreprenoj. La heroaj laboristoj ĝisfunde kritikis la sklavecon antaŭ fremduloj de la granda renegato Liu Ŝaŭki, disvolvis la revolucionan ribelemantan spiriton "iri en monton spite, kvankam sciante ke troviĝas tigro tie", ili firme decidis reformi la fremdlandajn kaldronejojn en kaldronejojn honorigajn al la ĉinaj laboristoj por multe altigi la spiriton de la ĉinaj laboristoj, kvankam ili havis nek bluplanon, nek specialan teknikiston, nek praktikan sperton. Kaj ĝuste en tiu tempo, reakcia teknika aŭtoritatulo dissemis pesimisman opinion, ke por homo sen scio pri la struk-



# Homoj kaj Fizionomio de la Fabriko



turo kaj karaktero de la fremdlandaj kaldronegoj estas preferinde ne tuŝi ilin. La revolucia komitato de la fabriko firme subtenis la revolucion agon de la laboristoj kaj organizis grupon de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefa konsistiga parto kaj partopreno de kadroj kaj teknikistoj, decidis komenci sian operaciadon sur la unua kaldronego.

Komenciĝis la batalo de reformo de la fremdlandaj kaldronegoj.

Kiam la penso reprezentanta la avangardan klason estas posedata de la amasoj, ĝi povas doni neelĉerpeblan materian forton. En la grupo de triflanka kombiniĝo estis juna laboristo kun la aĝo de iom pli ol dudek jaroj. Li estis triaklasa hejtisto. Kaj estis li, kiu agis kuraĝe laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ke kono devenas de praktiko, enrampis en la kaldronegon por esplorado pro manko de bluplano, kaj li akiris fidindajn sciencajn konstataĵojn per mezurado, desegnado kaj korektado. Ne havante specialajn teknikistojn por riparado de kaldronegoj la maŝinriparistoj do rompis la diversajn limigojn, kaj lernis kaj prak-

tikis samtempe. Kie ili renkontis problemon, tie ili do konsultis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj samtempe kritikis nigrajn reviziismajn varojn, diskutis pri solva rimedo. Kun ruĝa koro por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj profunda malamo al la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, ĉiu kamarado de la grupo de triflanka kombiniĝo tiel heroe batalis tage kaj nokte kaj venkis multajn malfacilojn unu post alia. Fine la fremdlanda kaldronego estis sukcese reformita de la laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso. Post prova hejtado oni konstatis, ke la bruligeblaĵo en la cindro malmultiĝis ĝis malpli ol 15 procentoj. Tiu ĝojiga novaĵo boligis la tutan fabrikon, kaj la laboristoj kaj oficistoj entuziasme kriadis: "Vivu la venko de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso!" Iu teknikisto, kiu partoprenis la batalon de reformado de la kaldronego, diris forte emociite: "Farante renovigon en la pasinteco, ni ĉiam serĉis konsilojn en fremdlandaj libroj kaj rezulte de tio ni atingis malmulte, malrapide, malbone kaj malŝpare. Nun farante renovigon la laboristoj elĉerpas forton el la ore brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj ili atingis multe, rapide, bone kaj ekonomie."

Nelonge post la sukcesa reformo de la unua kaldronego, venis la ekstreme ĝojiga novaĵo pri la inaŭguro de la Naŭa Kongreso de la Partio. Ili decidis fari ĝisfundan reformon de la dua kaj tria kaldronegoj en la forta favora vento de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj ĵuris ĵeti la sklavecon antaŭ fremduloj antaŭenpuŝitan de la interna spiono Liu Ŝaŭki en la historian rubejon.

Kiam la laboristoj de la materiala provizejo rimarkis, ke la provizado de materialo jam ne povas kontentigi la ĉiam pli grandan pliprodukton de kartono, ili tuj lige pensis, ke la ŝlosila punkto en tio estas la mallarĝa fervojo transportanta materialon. Sed laŭ la reviziisma regularo, reformo de mallarĝa fervojo devas esti farata de speciala unuo respondeanta pri projektado kaj konstruado de fervojoj. La laboristoj de la fervojripara grupo diris: “Por plenumi la instrukcion de Prezidanto Maŭ **‘teni la revolucion, stimuli la produkton’**, ni mem faru tion!” Ankaŭ laboristoj de aliaj laborspecoj sin anoncis por partopreni la rekonstruon de la fervojo. Dank’ al tio, ili sukcese plenumis la laboron de rekonstruo nur per du tagoj.

Iutage, kiam la laboristoj de la B-dejoro de la paperprodukta laborejo laboris absorbite, subite tabulo falis de sur la pulpfoliiga maŝino en la pulpobaseno kaj obstrukcis la aperturon tiel ke pulpo ne povis elflui. Kion fari? Ĉu haltigi la maŝinon kaj ĉesigi la elfluon de pulpo por elpreni la tabulon

kiel kutime aŭ salti en la frostan basenon kaj tuj ĝin elpreni por garantii regulan produktadon? Por defendi la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”**, la tri deĵorantaj laboristoj ekkriis preskaŭ samtempe: “Tuj ni elprenu la tabulon!” Dirinte “unue mi malsupren” la juna laboristo Ma Ĝaŭĉun demetis siajn vatitajn vestojn kaj saltis en la pulpan basenon, malvarmegan kaj profundan. Ankaŭ la du aliaj kunbatalantoj ensaltis tuj poste por batali kune. La obstrukcaĵo estis forigita. Kvankam ili tiel frostiĝis de la ĝisoste malvarmega pulpo en la baseno, ke iliaj dentoj kunfrapadis kaj iliaj lipoj bluiĝis, ili tamen sentis varman fluon tra la tuta korpo, kiam ili vidis, ke pulpo denove el-torentas senbare el la aperturo. Kiam kamaradoj en la laborejo zorgeme konsilis, ke ili tuj surmetu la vestojn kaj sin varmigu, ili respondis emocie: “Kvankam estas malvarme, tamen ĉiam fajre ardas la ruĝa koro de ni laboristoj fidela al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!”

Post kiam Prezidanto Maŭ donis la batalan ordonon, ke **“la laborista klaso nepre devas gvidi ĉion”**, tiu fabriko selektis industriajn laboristojn okupantajn kvinonon de la tuta personaro por eniri en la superstrukturan sferon kaj gvidi tie batalon, kritikon kaj reformon. Kaj krome, la partiordiga studrondo de la fabriko elprenis nombron da laboristoj por 2-monata studado sen partopreno de produkta laboro. Kvankam tiel malmultiĝis la laborantoj, tamen la produkta plano de la kvara sezono de 1968 estis plenumita je kvar tagoj antaŭ la fiksita dato! En la kuranta jaro, la produktaj rekordoj estis ofte renovigitaj kaj kreiĝis produkta nivelo neniam atingita en la historio. Ĉio ĉi tio plene montris la senliman fidelecon de la laboristaro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la fortan vivipovon de la orientilo **“teni la revolucion, stimuli la produkton”**.

(SONG GONGBIN)

*La grupo de triflanka kombiniĝo studas la projekton por reformi la kaldronegon.*





# Renminbi—Plej Stabila Mono Malofta en la Mondo

“La malamiko putriĝas tagon post tago, dum nia afero pliboniĝas kun ĉiu tago.” Tio ĉi estas la akrapida konkludo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ pri la ĝenerala tendenco de la monda situacio. La nuna monda financa kaj mona situacio ankaŭ tre vive spegulas tiun ĉi ĝeneralan historian tendencon. La financa kaj mona sistemo de la kapitalisma mondo staras sur la sojlo de disfalo, kaj eĉ matene ĝi ne povas garantii sian sorton en la vespero. Pli kaj pli malboniĝas ankaŭ la financa kaj mona situacio de la landoj regataj de la moderna reviziismo. Dume en nia lando disvolviĝas la ekonomio, prosperas la merkato kaj stabilas la prezoj. Nia *renminbi* jam fariĝis plej stabila mono malofta en la mondo.

## DU SPECOJ DE MONO, DU SPECOJ DE SORTO

Nia *renminbi* estas nova socialisma mono. Ekde sia naskiĝo ĝi prezentas sin en la mondo kun tute nova aspekto kaj plene manifestas sian senkompare potencon vivpovon.

La longtempa stabileco de *renminbi* trovas koncentritan esprimon en la longtempa stabileco de merkataj prezoj. Sur la bazo de rapida disvolviĝo de produktado en industrio kaj agrikulturo, la podetalaj prezoj de la varoj de nia lando ĉiam restas stabilaj ekde la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. La prezoj de greno, katuno, karbo kaj salo estas stabilaj, kaj tiuj de multnombraj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj por la popolo kaj aliaj varoj estas fundamente stabilaj. Domlupagoj, poŝtkostoj kaj pagoj por akvo, elektro kaj publikaj trafikoj ĉiuj estas malaltaj kaj ĉiam restas stabilaj. Por ŝanĝi la neracian proporcion inter la prezoj de industriaj kaj agrikulturaj produktoj postlasitan

de la malnova Ĉinio kaj plie fortikigi la aliancon inter la laboristoj kaj kamparanoj, la ŝtato laŭplane kaj paŝo post paŝo plialtigis sian aĉetprezon por greno, koton, manĝebla oleo, kanabo, silkraŭpaj kokonoj, teo, sukerkano, porkoj kaj aliaj agrikulturaj kaj flankaj produktoj. La vendaj prezoj de tiuj produktoj tamen estas fundamente ne plialtigitaj. La ŝtato reduktis cetere la prezojn de multaj industriaj produktoj, precipe de tiuj uzataj en subteno al la agrikulturo kaj en ĉiutaga vivo, ekzemple, kemia sterko, agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj, insektomortigiloj, dizela oleo, keroseno, medikamentoj kaj medicinaj instrumentoj.

Sana kaj stabila nacia financo kun ekvilibro inter enspezoj kaj elspezoj estas grava faktoro por garantii la stabilecon de la mono. Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, dank' al firma efektivigo de serio da instrukcioj de Prezidanto Maŭ, nia lando atingis ekvilibron inter financaj enspezoj kaj elspezoj kaj inter enspezoj kaj elspezoj en fremda mono kun iom da aktiva saldo, kaj per tio ne nur kontentigis la financajn bezonojn de konstruado de socialismo kaj plifortigo de nacia defendo, sed ankaŭ fariĝis socialisma lando, kiu havas nek internan nek eksteran ŝuldon.

Nia *renminbi* servas al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando kaj al la laboranta popolo. Ĝi gajnis plenan konfidon de la vastaj amasoj. Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la ŝtato plurfoje reduktis la interezajn procentojn de ŝparaj mondeponoj, tamen la sumo de ŝparaj mondeponoj en urboj kaj vilaĝoj ĉiam kreskis stabile. Kompare kun tiu de 1952, la sumo de urbaj ŝparaj mondeponoj kreskis sepoble, dum tiu de la vilaĝaj kreskis centoble. La plejparto el la deponantoj estas la-

borantaj popolanoj en urboj kaj kamparo. Triono el la totala sumo estis deponita en la Granda Proletara Kultura Revolucio. La totala sumo de la ŝparaj mondeponoj de la popolanoj en urboj kaj kamparo nun superas la totalan sumon de ĉirĉulanta mono en nia lando. Multaj patriotaj samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen tre amasian grandan socialisman patrolandon, tre konfidas *renminbi*, kaj petas la bankojn de nia lando en Hongkong kaj Aŭmen akcepti mondeponojn de *renminbi*.

Nia *renminbi* ĝuas ankaŭ tre altan prestiĝon internacie. En la tempo, kiam pli kaj pli profundigas la financa krizo en la kapitalisma mondo, nemalmultaj landoj kaj regionoj nun ekuzas *renminbi* anstataŭ aliajn monojn en komerco kun Ĉinio, en akcepto de ĉina helpo aŭ en aliaj ekonomiaj aferoj; kaj tiaj landoj kaj regionoj ankoraŭ senĉese plimultiĝas.

La usonaj imperiistoj, la sovetuniaj reviziistoj kaj aliaj reakciuloj, kiuj malamas la Grandan Proletaran Kulturalan Revolucio de nia lando, ĉiam sonĝas, ke okazos ĥaoso en nia nacia ekonomio. Sed, sub la direktado de la granda strategia penso de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**” kaj lia granda politiko de “**tenado de la revolucio, stimulado de la produkto**”, en nia lando vige disvolviĝas la socialisma konstruado, pli prosperas la ekonomio, pli viglas la merkato, kaj pli stabilas la prezoj de varoj kaj la valoro de mono.

La faktoj iras kontraŭ la deziro de la klasaj malamikoj. La landoj, kies ekonomio troviĝas en ĥaoso, ĝuste estas tiuj, kiuj estas sub la regado de imperiismo, moderna reviziismo kaj diverslandaj reakciuloj.

Ekde la devaluto de sterlinga funto en novembro de 1967 ĝis marto de la pasinta jaro, eksplodis la financa krizo plej serioza kaj plej profunda en la lastaj 40 jaroj en la okcidenta mondo, kaj ĝia mona merkato skuiĝis pli kaj pli forte. Pro la frapo de la revolucia amasa movado en Francio leviĝis mona krizo en la kapitalisma mondo en majo de la pasinta jaro kaj en novembro samjare eksplodis febra aĉeto de oro, kio kondukis al fermo de fremdvalutaj borsoj. En la fino de aprilo ĉijare de Gaulle, la prezidanto de Francio, estis devigita forlasi sian oficon rezulte de akraj politikaj kaj ekonomiaj krizoj en la lando. La ŝtormo de nova krizo kiu envolvis ĉiujn financajn centrojn en la okcidenta Eŭropo, peze batis la sterlingan funton kaj la fran-

can frankon kaj ankaŭ forte frapis la usonan dolaron.

Imperiismo estrata de Usono kaj diverslandaj reakciuloj estas delonge turmentataj de inflacio, altiĝo de prezoj kaj konstanta falo de la valoro de mono. Laŭ la evidente multe reduktitaj prezoj indicoj por diversaj kapitalismaj landoj kompilitaj de la Internacia Mona Fonduso, dum 19 jaroj de 1949 ĝis la fino de 1968, podetalaj prezoj leviĝis je 48.7 procentoj en Usono, je 110 procentoj en Britio kaj je 161 procentoj en Francio. En la pasinta jaro la prezoj en tiuj landoj leviĝis ankoraŭ pli furioze. La monoj de tiuj landoj ripetade devalutis pro inflacio kaj leviĝo de prezoj. Ekde la fino de la Dua Mondmilito la sterlinga funto jam oficiale devalutis dufoje, la franca franko kvinfoje kaj la hinda rupio dufoje. Kaj la usona dolaro, kiu estas la ĉefa subtenilo de la monoj de la kapitalisma mondo, fariĝis en la sesdekaj jaroj, same kiel la sterlinga funto, objekto por spekulacio kaj vendo en la okcidentaj fremdvalutaj borsoj. Sub la frapado de la senprecedence longdaŭra kaj furioza ŝtormo de febra aĉeto de oro, eksplodinta en marto de 1968, Usono ne povis plu teni sian oficialan prezon de oro je 35 dolaroj por unu unco. La neoficiala prezo de oro en la kapitalisma mondo leviĝis ĝis ĉ. 20 procentoj pli alta ol la oficiala prezo. La usona dolaro fakte jam devalutiĝis.

En rekta rilato kun inflacio kaj mona devalutiĝo, tiuj landoj ĝenerale havas grandegajn financajn deficitajn kaj internajn kaj eksterajn ŝuldojn. En la fiska jaro 1968, la usona budĝeta defcito atingis 25.2 miliardojn da usonaj dolaroj; la totala cifero de la naciaj obligacioj emisiitaj atingis 359.5 miliardojn da usonaj dolaroj ĝis marto ĉijare, sumon egalan proksimume al tiu de registaraj financaj enspezoj por du jaroj. Kolosaj deficitaj aperis ankaŭ en la bilanco de internaciaj spezoj de Usono en sinsekvaj jaroj. Tio kaŭzis grandkvantan elfluon de ororezervo. Ekde 1958, Usono jam perdis pli ol duonon de siaj oraj rezervoj; nun ĝiaj oraj rezervoj sume egalas nur al malpli ol 11 miliardoj da dolaroj, dum la sumo de la dolaraj mondeponoj posedataj de fremdlandanoj, kiuj rajtas postuli de Usono interŝanĝon kontraŭ oro en ĉiu ajn momento, estas multe pli ol 30 miliardoj da dolaroj. Tio plene montras la esencan malfortecon de la usona dolaro. De multaj jaroj la reakcia hinda registaro vivas ĉefe el almozoj, kiujn ĝi ricevas de fremdaj landoj. Ĝis la fino de 1968, ĝiaj fremdaj ŝuldoj atingis totale pli ol 56.6 miliardojn da rupioj. Kun la ĉiam pli profundigantaj politikaj kaj ekonomiaj krizoj de la kapi-



talisma mondo, pli granda financa krizo estas en kovado.

La financaj kaj ekonomiaj krizoj en la kapitalisma mondo disvolviĝas kune kun politikaj krizoj, kaj la ambaŭ krizoj reagis unu al la alia. En tiuj landoj, la mono estas instrumento de la monopolaj regantaj klikoj por prirabi kaj ekspluati la laborantan popolon. Ĝuste kiel diris Lenin, en la manoj de la ekspluataj klasoj, “**mono estas signo kiu ebligas ĝian posedanton preni tributon de ĉiuj laboruloj**”, “**kaj ĉiu dolaro estas makulita de sango**”. En financa krizo, la reganta kliko de monopolistoj ĉiam uzas tiajn rimedojn, kiaj pliigo de impostoj, plialtigo de prezoj, frostigo de salajroj kaj redukto de la nombro de dungitaj laboristoj, por transigi la ŝarĝon sur la laborantan popolon, kaj intensigas sian agresadon kaj prirabadon eksterlande. Tio neeviteble akriĝas la klasajn kontraŭdirojn en la koncernaj landoj kaj la kontraŭdirojn inter la subpremataj nacioj kaj imperiismo. La pli akra disvolviĝo de mona kaj komerca militoj inter la imperiismaj klikoj kondukas al pliprofondiĝo de la ekonomiaj kaj financaj krizoj de la kapitalisma mondo.

La sovetunia reviziisma renegata kliko efektivas plenumplaksan restaŭron de kapitalismo en Sovetunio, kaj tiel puŝis la tutan nacian ekonomion en ĥaoson de senfinaj malfaciloj. Ĝi perdis ĉiujn socialismajn atingojn akiritajn de la sovetunia popolo en penema luktado sub la gvido de Lenin kaj Stalin. Dum la dek jaroj de 1956 ĝis 1965, ĝi forvendis oron valorantan ĉ. 3 miliardojn da usonaj dolaroj; per la anstataŭigo de la malnova rublo per la nova en 1961, la sovetuniaj reviziistoj fakte multe devalutis la rublon eksterlande. Ekde 1966, la ŝtata komitato pri prezoj de sovetunia reviziismo sinsekve difinis novajn tarifojn por teksa, trika, ledŝua kaj nutraĵa industrioj kaj peza industrio, kaj multe levis la pograndaĵajn prezojn de multaj industriaj produktoj. Sole en la 1-a de julio de 1967, ĝi en unu fojo levis la prezojn de multaj industriaj produktoj, inter kiuj la prezo de karbo leviĝis per 78 procentoj, kaj tiu de elektra energio por industria uzo per 20 ĝis 22 procentoj. Nun, en la bazaroj de Sovetunio ne sufiĉas la provizo de manĝaĵoj, vestaĵoj kaj ĉiutagaj uzaĵoj. Furiozas nigraj komercoj. En iuj regionoj eĉ la prezoj de pano akre leviĝas. Pro inflacio la reala aĉetpovo de mono senĉese falas, tial la laboranta popolo multe suferas, kaj tio pliakraĝas la fortajn malkontenton kaj reziston de la sovetunia laboranta popolo kontraŭ la sovetunia reviziisma renegata kliko.

Du specoj de mono, du specoj de sorto. La financa kaj mona krizo de la kapitalisma mondo estas nekuracebla malsano, kiu rezultas de la reakcia kaj putra sistemo de kapitalisma socio. La longtempa stabileco kaj vasta perspektivo de nia *renminbi* plene manifestas la senkomparan superecon de la socialisma sistemo de nia lando.

## **GRANDA VENKO DE LA REVOLUCIA LINIO DE PREZIDANTO MAŬ**

La brilaj atingoj en la financa kaj mona fronto de nia lando estas rezulto de la plenumo de la serio da teorio, linio, principoj kaj politikoj fiksitaj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj de la venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ super la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.

Frue en 1949, je la antaŭvespero de la Liberiĝo de la tuta lando, en la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam montris: “**En la urboj ni devas ellerni kiel fari politikan, ekonomian kaj kulturen batalojn kontraŭ la imperiistoj, Kuomintango kaj la burĝaro, kaj kiel fari diplomatan batalon kontraŭ la imperiistoj.**” Alie, “**ni ne povos konservi nian regpotencon, ni ne povos stari sur niaj piedoj, ni malsukcesos.**”

Post sia Liberiĝo, nia lando tuj nuligis ĉiujn financajn privilegiojn de imperiismo en Ĉinio, konfiskis la financajn instituciojn de la burokratkapitalo, starigis proprajn bankajn organizojn de la popolo, rapide kaj laŭplane transformis ĉiujn privatajn kapitalismajn bankojn, fondis landskalan unuigitan socialisman fincan sistemon. Ni ankaŭ senprokraste eliminis komplete diversajn monojn emisiitajn de la kuomintanga reakcia registaro, elpelis senescepte la imperiismajn monojn el cirkulado kaj establis sendepandan, unuigitan kaj stabilan socialisman monosistemon. Tiamaniere, ni deradike faris la ĉinan monon imuna kontraŭ ĉia ajn influo de la financaj krizoj en la kapitalisma mondo.

En la komenca periodo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la restantaj fortoj de Kuomintango kaj la burĝaro faris subfosadon kaj detruon per senskrupula spekulaciado kaj levado de prezoj. Samtempe kun sia lanĉo de agresa milito kontraŭ Koreio, la usona imperiismo efektive ekonomian blokadon kaj embargon kontraŭ nia lando, nepravigeble frostigis la monprovizon de Ĉinio eksterlande, kaj fabrikis en komploto kun la bandita kliko de Ĉiang Kajŝek grandajn kvan-

tojn da falsaj bankbiletoj por ĥaosigi la financon de nia lando, vane provante strangoli la novan Ĉinion ekonomie. Liu Ŝaŭki, la agento de imperiismo kaj ĝenerala postkulisa estro de la burĝaro, aktive ludis la rolon de trojana ĉevalo. Li provis igi nian bankon fiksi kurzon de fremda valuto laŭ la postuloj de la kapitalistoj, pledis por establo de valorpaperaj borsoj, postulis de niaj bankoj doni pruntojn al la kapitalistoj por subteni ilin en spekulaciado kaj subfosado de stabileco de merkataj prezoj.

Sed, sub la gvido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, sinapogante sur la potencaj fortoj de la proletara regpotenco kaj la socialisma ekonomio de ŝtata posedo, sur la laborista klaso kaj la vastaj revoluciaj popolamasoj, nia lando solide rebatis la spekulaciadon de la burĝaro. En marto de 1950, ni jam stabiligis la prezojn tra la tuta lando kaj metis finon al la inflacio, kiu daŭris multe pli ol dek jarojn sub la reakcia regado de Kuomintang. Tuj sekve, en la milito por rezisti kontraŭ la usona imperiismo kaj helpi Koreion, nia lando persistis en tiu ĉi justa milito, en socialisma konstruado kaj ankaŭ en stabiligo de prezoj kaj monvaloro. Kaj en pinto-kontraŭ-pinta batalo kontraŭ la rabista ago de la usona imperiismo de nepravigebla frostigo de la monprovizo de Ĉinio, nia lando frostigis la usonan kapitalon en Ĉinio. Kaj en la postaj politikaj movadoj, dank' al efektivigo de serio da principoj kaj politikoj formulitaj de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ multe disvolviĝis la socialisma ekonomio, firmiĝis la diktaturo de la proletaro, kaj kreiĝis bonegaj kondiĉoj por longdaŭra stabileco de *renminbi*.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **“La ĝenerala politiko de nia ekonomia kaj financa laboro estas disvolvi la ekonomion kaj garantii provizadon.”** Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, nia popolo komandis, stimulis kaj kondukis produktadon per revolucio, brave marŝas antaŭen laŭ la Ĝenerala Linio **“streĉi plene la energion, strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**.

La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki estis terure timigita de la torenta fluego de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Unuflanke, li senskrupule distrumpetis la teorion de “estingiĝo de klasbatalo”, por oponi kontraŭ daŭra revoluciado; aliflanke, li plenenergie levis la diablan venton de “opono kontraŭ riskema antaŭensalto” por kontraŭstari la Ĝeneralan Linion de la Partio por socialisma konstruado. Li ĉiam distrumpetis la reakcian absurda-

ĵon de “budĝetaj deficitoj kaj inflacio”. Li absurde diris, ke “budĝetaj deficitoj estas permeseblaj”, ke “Ni povas emisii pli da bankbiletoj por pliigi la enspezon”, ke “Ankaŭ inflacio estas bona”, kaj ke “Ju pli granda estas la inflacio, des pli riĉa estas la popolo”. Precipe en la periodo, kiam nia lando trafis naturajn katastrofojn dum tri sinsekvaj jaroj kaj la subfosadon de la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj la nacia ekonomio renkontis provizorajn malfacilojn, Liu Ŝaŭki denove kaptis la ŝancon por levi insidan uraganon en kunlaboro kun la klasaj malamikoj en- kaj ekster-lande. En 1962 li proponis “50-pocentan plialtigon de la prezoj”. En decembro de 1963, kiam la nacia ekonomio jam plamplekse reboniĝis, li denove elmetis sian reakcian postulon de ĝenerala plialtigo de prezoj kaj de devaluto de mono. La ĉina popolo, kiu sate suferis de inflacio kaj fluga leviĝo de prezoj en la malnova Ĉinio, profunde komprenis, ke la vasta laboranta popolo suferus refoje kaj falus denove en la fundon de mizero, se oni efektivigus tion por kio pledis Liu Ŝaŭki. Tial, firme tenante en la memoro la grandan instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **“nepre ne forgesi la klasan batalon”**, la popolo de la tuta lando efektivigis la politikon de reguligo, solidigo, kompletigo kaj plialtigo en la nacia ekonomio, klopodis pliigi la produkton, kreskigi enspezojn kaj redukti elspezojn, kaj persistis en tenado de ekvilibro inter la financaj enspezoj kaj elspezoj, disvolvante la spiriton peneme lukti sub malfacilaj kondiĉoj, sinapogi sur la propraj fortoj, konstrui la landon diligente kaj ŝpareme kaj strebi al prosperiĝo. En la sama tempo, la kontrolo de la merkato estis plifortigita, kaj tiel la stabileco de la prezoj kaj monvaloro estis tenata. La kontraŭfluo de kapitalisma restaŭro levita de Liu Ŝaŭki kaj lia kompanio estis denove frakasita!

Nun, la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam ruinigis la burĝaran komandeton reprezentatan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, kaj frakasis ĝian intrigon de restaŭro de kapitalismo. La diktaturo de la proletaro de nia lando firmiĝis pli ol antaŭe, kaj en la socialisma konstruado de nia lando aperas nova antaŭensalto. Kiam financa kaj mona krizo envolvas la kapitalisman mondon, kaj ankaŭ la ekonomio de la landoj sub la regado de la moderna reviziismo troviĝas en la antaŭvespero de ĝenerala disfalo, nia *renminbi*, kiel sendependa, unuigita kaj stabila socialisma mono, havas senlime belan perspektivon.



# Fremdlandaj Amikoj en Ŝaŭŝan

ŜAŬŜAN estas la hejmloko de nia amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ. La mondaj revoluciaj popoloj senlime aspiras ĝin. Ĉiujare multaj revoluciuloj de diversaj landoj alvenas ĉi tien trans oceano por fari viziton. Dum la vizito ili ofte esprimis en diversaj formoj sian varman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

“ŜAŬŜAN ESTAS LA HEJMLOKO EN LA KORO DE LA MONDAJ REVOLUCIULOJ”

Grupo da japanaj amikoj finfine venis al Ŝaŭŝan, rompinte malhelpojn de la japana reakciularo kaj reviziisma Mijamoto-klika kaj konkerinte sen-nombrajn malfacilojn. Surpaŝinte la teron de

*Albanaj amikoj vizitas Ŝaŭŝan.*



Ŝaŭŝan, en emociiĝo ili fojrefoje laŭte kantis *Ruĝas la Oriento, Marnavigo Dependas de Stiristo* kaj aliajn revoluciajn kantojn. Kiam ili venis al la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ, ili sentis neesprimeblan ĝojon kaj tuj deklamis ĵus verkitajn versojn:

*El Ŝaŭŝan levas sin la brile ruĝa suno,  
La orientan firmamenton ĝi ruĝigas!  
La sun' ja estas Prezidanto Maŭ, gvidanto nia  
granda.*

*Ho, Prezidanto Maŭ,  
Ni varme amas kaj respektas vin,  
Eternan vivon al vi bondeziras!*

En la vizito, laŭ postulo de la japanaj amikoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ŝaŭŝan okazigis kun ili kunsidon, interŝanĝis komprenojn en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj ĝoje interparolis pri la grandaj atingoj akiritaj de la Granda Proletara Kultura Revolucio de Ĉinio. En la kunsido iuj japanaj amikoj diris, ke la grandaj venkoj de la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis al ili kuraĝon kaj fidon. Aliaj diris: “Reveninte al Japanio, ni certe armos nin per Maŭzedongpenso kaj senŝanceliĝe kondukos ĝisfine la batalon kontraŭ imperiismo kaj reviziismo!”

Fininte sian viziton, la japanaj amikoj restigis en la opinia notlibro jenajn entuziasmajn vortojn: “Maŭzedongpenso estas lumturo lumiganta la antaŭenmarŝon de la mondaj revoluciaj popoloj. Ŝaŭŝan estas la hejmloko en la koro de la mondaj revoluciuloj!”

### “NEPRE IRU LA VOJON DE MAŬ ZEDONG”

Iutage, venis al Ŝaŭŝan amikoj el Indonezio — la lando de mil insuloj. Kun plena emociiĝo ĉiu el ili tenis la ruĝan libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano kaj surbruste portis ore brilantan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ. Dum la vizito ili senĉese laŭte kantis kantojn kun vortoj de Prezidanto Maŭ. Ili povas kanti pli ol 20 revoluciajn kantojn prikantantajn Prezidanton Maŭ.

Ili petis klarigiston emfaze rakonti la armitan batalon de Gingga-montaro gviditan de Prezidanto Maŭ. Iuj indoneziaj amikoj respekte karesis la ekspozitajn glavojn kaj lancojn, kiujn kampanoj uzis dum la kampana movado gvidita de Prezidanto Maŭ. Ili detale demandis pri la armita batalo de Gingga-montaro kaj serioze faris notojn. Aŭskultante klarigon, iuj nereteneble diris: “Iru la vojon de Maŭ Zedong! Ni nepre iru

la vojon de Maŭ Zedong, se ni volas venkon de revolucio!” Iuj emociite ekkantis ĉinajn revoluciajn kantojn en ĉina lingvo.

En la kunsido kun tieaj popolanoj, la indoneziaj revoluciaj amikoj dolore rememoris la sangan lecionon de la indonezia revolucia batalo. Iuj el ili montris: “Ni profunde konis: Deviante de Maŭzedongpenso la revolucio certe malvenkos; sekvante Maŭzedongpenson la revolucio certe venkos. Ni resumis tiun sperton kaj lecionon. Tial, ni nepre iru la vojon de Gingga-montaro antaŭlonge montritan de Prezidanto Maŭ, iru la vojon de popola milito sieĝi urbon per kamparo.” Iuj esprimis: “Ni certe armos nin per Maŭzedongpenso kaj batalos por la liberigo de niaj popolo kaj patrolando.”

### “VIVU, MAŬ ZEDONG!”

Alveninte al Ŝaŭŝan, amikoj el Afriko laŭte kriis kun larmoj svingante la ruĝan trezoran libreton: “Vivu, Maŭ Zedong!” “Vivu, Maŭ Zedong!” Ili ankaŭ plenvoĉe kantis *Ruĝas la Oriento*.

Iu el ili prenis plenmanon da tero, atenteme envolvis ĝin per naztuko kaj poste metis la paketon en la sinon. Li esprimis, ke li portos al sia lando la teron de la hejmloko de Prezidanto Maŭ. Li diris, ke post reveno al la patrio, li nepre kondukos sub la direkto de Maŭzedongpenso kune kun la popolo de sia patrio firman batalon por faligi imperiismon, reviziismon kaj reakciularon.

Post vizito, grupo da afrikaj amikoj estis gastigita ĉe malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ili fiere diris: Ni sentas senkomparan feliĉon, ke ni gastis ĉe malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Ŝaŭŝan.

### “IRI LA VOJON DE PREZIDANTO MAŬ SIGNIFAS VENKON!”

*El Ŝaŭŝan levas sin plej ruĝa suno,  
Li gvidas la revolucion de l' popoloj mondaj.  
Ho, vivu nia granda instruanto!  
Ho, vivu ruĝa sun' en nia koro — Maŭ Zedong,  
Al vi eternan vivon, ho, eternan vivon!*

Tiu poemo entuziasmoplena estas verkita de latinamerikaj revoluciuloj post vizito al Ŝaŭŝan. Ĝi esprimis revolucionan patoson, la varman amon de latinamerikaj revoluciuloj al Prezidanto Maŭ. Ili vizitis la antaŭan loĝejon de Prezidanto Maŭ kaj muzeon. La granda revolucia praktiko de Prezidanto Maŭ, precipe la praktiko en lia gvidado al kampana movado kaj armita batalo, forte





*Japanaj amikoj vizitas la muzeon de la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ en Ŝaŭŝan.*

instigis tiujn revoluciulojn. Laŭplane ili devis forlasi Ŝaŭŝan posttagmeze en tiu tago, sed, por pli multe lerni Maŭzedongpenson, ili unuvoĉe postulis tranokti en Ŝaŭŝan por pasigi la plej signifan kaj plej feliĉan nokton en la vivo. Ili kunsidis kun ĉinaj kamaradoj ĝis profunda nokto. Post tio, ligante la enhavon de la vizito ili serioze studis sub lampoj brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan kaj La Batalo en Gingga-montaro.*

La sekvintan tagon, ili ellitiĝis en matenkrepusko kaj alvenis al la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ, ĝojkriis, kantis kaj serioze studis verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili diris al ĉinaj kamaradoj, ke ili kaptis ĉiun libertempon studi verkojn de Prezidanto Maŭ dum streĉaj bataloj en sia lando. Iu revoluciulo emocie diris: “La vojo de Ŝaŭŝan estas vojo irita persone de Prezidanto Maŭ, estas vojo revolucia kaj vojo kondukanta al venko.

Iri la vojon de Prezidanto Maŭ signifas plej grandan feliĉon, iri la vojon de Prezidanto Maŭ signifas venkon. Ni kondukos la armitan revolucion ĝis la fino laŭ la revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ.” Tiuj revoluciuloj vice piediris al la fervoja stacio de Ŝaŭŝan laŭ la vojo siatempe irita de Prezidanto Maŭ. Sur la vojo je 5 km. longa, ili plenvoĉe kriis “vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ” kaj laŭte kantis la kanton kun la vortoj de Prezidanto Maŭ “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**”. Ĝojkrioj kaj kanto ŝvebis inter la montoj.

#### **“PREZIDANTO MAŬ STARIGIS POR NI BRILAN MODELON DE KOMUNISTO”**

En la muzeo de la antaŭa loĝejo de Prezidanto Maŭ, kiam amikoj el Italio aŭdis, ke ses familianoj de Prezidanto Maŭ dediĉis sian vivon al la ĉina kaj monda revolucio, ili laŭdis kun emociiĝo la

grandecon de Prezidanto Maŭ kaj esprimis sian senliman respekton al Prezidanto Maŭ. Ili plurfoje petis klarigiston rakonti kiel la familianoj de Prezidanto Maŭ luktis por la revolucio kaj kiel Prezidanto Maŭ edukis siajn familianojn sin dediĉi al la revolucia afero. Aŭskultante, iuj el ili premis *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* en la mano antaŭ sia brusto kaj montris fortan emociiĝon, iuj emociiĝis ĝis larmoj kaj aliaj fojfoje laŭtkriis alte tenante *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*:

“Vivu Prezidanto Maŭ!” “Eternan vivon al Prezidanto Maŭ!”

Antaŭ sia foriro, ili skribis vortojn plenajn de patoso: “La granda Prezidanto Maŭ Zedong ne nur dediĉis sian tutan energion al la liberiga afero de la ĉina kaj mondaj popoloj, sed ankaŭ kapablis eduki siajn familianojn per sia revolucia spirito. Prezidanto Maŭ starigis por ni brilan modelon de komunisto.”

## KURANTAJ AFEROJ

### LA JUHIKOŬ-A ŜIPKLIZO EN ANHUJ-PROVINCO VENKE MALFERMIĜIS AL NAVIGADO

Post la finkonstruo de la reguliga kluzo kaj la riverbaraĵo, la granda akvoutiliga konstruaĵo Juhikoŭ-a ŝipkluzo por ebligi navigadon inter Jangzi-rivero kaj la lago Ĉaŭhu en Anhuĵ-provinco estas venke finkonstruita kaj malfermita al navigado antaŭ la fiksita dato.

La nove konstruitaj reguliga kluzo kaj ŝipkluzo ĉe Juhikoŭ estas konstruitaj tute el ferbetono. La reguliga kluzo konsistas el 24 spanoj kaj longas pli ol du cent metrojn. Kune kun la Ĉaŭhu-a kluzo konstruita dum la jaroj de la antaŭensaltego ĝi formas ŝtupan akvoutiligan pivotan konstruaĵon de Juhirivero en la baseno de la lago Ĉaŭhu, kiu povas protekti 2,200,000 muojn da tero kontraŭ inundo kaj konservi kaj alkonduki akvon por irigacii 3,290,000 muojn da tero. La baseno de la ŝipkluzo longas 195 metrojn, larĝas 15.4 metrojn kaj povas enteni samtempe paron da dumil-tonelaj ŝipoj. Ĝia konstruiĝo ebligas facilan navigadon tra 280 kilometroj supre de la kluzo.

### EKSPOZICIO DE ĈINAJ MODERNAJ FAJENCOJ KAJ PORCELANOJ MALFERMIĜIS EN DANLANDO

La Ekspozicio de Ĉinaj Modernaj Fajencoj kaj Porcelanoj kune aranĝita de la Ambasadorejo de la Ĉina Popola Respubliko en Danlando kaj la Dana Asocio de Kulturaj Rilatoj kun Ĉinio malfermiĝis en la urba halo de Kopenhago je la 11-a de julio.


La inaŭguron ĉeestis la kultura ministro de Danlando K. Helveg Petersen, estro de la Politika Departemento de la Dana Ministerio de Eksterlandaj Aferoj T. V. A. Oldenburg, prezidanto de la Ĉefurba Konsilantaro de Kopenhago Henry Stzengvist, la urbestro de Kopenhago Urban Hansen, la prezidanto de la Dana Asocio de Kulturaj Rilatoj kun Ĉinio Aksel Milthers, la eksprezidanto de la Dana Parlamento Gustav Pedersen kaj amikoj de ĉiuj rondoj, sume 150 personoj. Petersen, Stzengvist kaj Milthers faris amikajn paroladojn ĉe la ceremonio. Ankaŭ la provizora aferŝarĝito de Ĉinio en Danlando faris paroladon.

La ekspozicio kovras 400 kvadratajn metrojn kaj montras pli ol 400 fajencajn kaj porcelanajn artaĵojn dividitajn en 160 grupojn. Tiuj artaĵoj montras la senliman amon de la ĉina popolo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, entuziasme laŭdas la Grandan Proletaran Kulturajn Revolucion de Ĉinio, la grandan venkon de Ĉinio en siaj socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj la heroajn aperintajn sub la nutrado de Maŭzedongpenso kaj plenajn de komunisma brilo.



# Fremdlingvaj Gazetoj el Ĉinio


Por ke la diverslandaj revoluciaj popoloj de la mondo ĝusttempe informiĝu pri la rapida disvolviĝo de la socialisma nova Ĉinio en diversaj flankoj, ni sincere rekomendas al niaj legantoj gazetojn eldonatajn de Ĉinio en diversaj lingvoj. Ili en diversaj flankoj raportas grandajn venkojn akiritajn de la ĉina popolo sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la socialisma revolucio, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, kaj iliajn brilajn atingojn en la socialisma konstruado; ili raportas pri la firma opozicio de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kun Usono ĉe la kapo, la moderna reviziismo kun la sovetunia reviziisma renegata kliko kiel la centro kaj la diverslandaj reakciularoj kaj pri ĝia subteno al la revoluciaj bataloj de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo.



**El Popola Ĉinio** — sinteza gazeto eldonata monate en Esperanto.

**Pekina Revuo** — politika kaj teoria gazeto eldonata semajne en la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj japana, kaj distribuata al diversaj lokoj de la mondo per aviado.

**Ĉinio** — grandformata monata bildgazeto belega kun lakona teksto. Krom en la ĉina ĝi estas eldonata ankaŭ en la lingvoj angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, ŝuahilia, urdua kaj vjetnama.




**Ĉinio en Konstruado** — sinteza gazeto riĉe ilustrita kaj eldonata monate en la lingvoj angla, franca, hispana, araba kaj rusa.

**Ĉina Literaturo** — literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj sezone en la franca.

**Popola Ĉinio** — sinteza gazeto eldonata monate en la japana lingvo.

La supre rekomenditaj gazetoj nun komencis akcepti abonantojn por 1970. Abonu kaj abonigu! Varban faldfolion povas senpage ricevi ĉiu petanto.


Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio  
Haveblaj ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe la Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio






# Spirito Transformiĝas en Materion kaj Impetas la Produkto de Industrio kaj Agrikulturo



La Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando senprecedence disvastigis Maŭzedongpenson. Alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, transformante spiriton en materion, la vastaj amasoj de laboristoj, malriĉkampanoj, malsuperaj mezkampanoj kaj revoluciaj intelektuloj solide unuiĝas, senĉese antaŭenmarŝas sur la ŝoseo de **“memstareco kaj sendependeco, sinapogo sur la propraj fortoj”** kaj akiris gigantajn sukcesojn en la industria kaj agrikultura produkto, sciencoj kaj teknikoj de nia lando. Ni estas certaj, ke la granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio nepre sekvigos novan antaŭensalton en la ekonomia fronto kaj la tuta socialisma konstruado de nia lando.



Naskiĝis la plej novtipa giganta transistora komputilo taŭga por ĉiaj uzoj.







國產  
卑賤者最聰明！  
高貴者最愚蠢！




(Supre maldekstre) La olekampo Daking, ruĝa standardo persone starigita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, fariĝas ĉiam pli alloga por la okuloj. Jen granda kvanto da nafto pretas por transporto al aliaj lokoj.

(Supre dekstre) Caŭ Mukjuan (la sidanto) kaj Ĝang Ŝi, teknikistoj elkulturitaj el laboristoj, respondecis pri kaj sukcesis en provprodukto de la unua elektrona mikroskopo kun ducentmilobla grandiga povo en nia lando.

(Sube maldekstre) En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la Ŝanhaja Pezmaŝina Fabriko energie kondukis amasan movadon kaj sukcese produktis la unuan plej grandan ekipaĵon en nia lando por industria elektrofrenka varmtraktado.

(Sube dekstre) Irante la vojon de elektado kaj kulturado de teknikistoj el la laboristoj, la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko jam kulturis grandan nombron da laboristoj havantaj riĉajn praktikajn spertojn en spinajn fortojn de tekniko.



(Supre maldekstre) La laborejo de sinteza benzeno.

(Supre dekstre) La Ŝaŭŝan-a Irigacia Distrikto estas la unua granda akvokonduka konstruaĵo de Hunan-provinco. La kanalo longas 240 kilometrojn. Laŭplane, ĝi povas irigacii milionon da muoj da tero. En ĝia ĉefkanalo kaj norda trunkkanaĵo povas navigi 20-tonelaj lignaj ŝipoj, kaj la naviga parto longas 115 kilometrojn. La bildo montras unu el la akveduktoj de la Ŝaŭŝan-a Irigacia Distrikto.

(Sube dekstre) La antaŭurboj de Pekino akiris riĉegajn tritikajn rikoltojn en lastaj sinsekvaj jaroj.








Daĝaj estas ruĝa flago sur la agrikultura fronto de nia lando. Sin apogante sur la propraj fortoj kun la heroa spirito ŝanĝi la teron kaj la ĉielon, la daĝaj-anoj akiris stabilajn altajn produktojn en agrikulturo.









Prosperas la bestbredado sur la stepoj de la Nordokcidento de nia lando.

Granda nombro da ruĝgrundaj terpecoj de la Liugiagan-a Kultivejo de Gianghi-provinco jam estas reformita kaj utiligata. La bildo montras novajn teogardenojn sur ruĝgrunda altaĵo.





# Turni Vizaĝon al Bazaj

## Unuoj kaj

## Enradikiĝi en Rotoj

— Pri la surmara provianta servotaĉmento  
de kantonaj trupoj

SIGJUN

**L**A surmara provianta servotaĉmento de kantonaj trupoj estas malpeza kavalerio, kiu tutjare batalas sur maro kaj insuloj kaj senpere servas al bazaj unuoj. Ĝi tutkore servas al la batalantoj sur la insuloj kaj ricevis varman bonvenigon de la batalantoj, kiuj nomas ĝin “surmara migranta administracio de postfronta servo”.

### IRI LAŬ LA VOJO MONTRITA DE PREZIDANTO MAŬ

En 1966, la socialisma revolucio de nia lando eniris en tute novan etapon. En la ŝtormo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la kamaradoj de la administracio de postfronta servo de kantonaj trupoj koncentre pripensis la demandon, kiel oni povas akomodi sin al la paŝoj de la epoko kaj pli bone defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Iuj kamaradoj diris: “Por esti fidelaj al Prezidanto Maŭ, ni devas komenci de revoluciigo de ideologio. La ĉefa signo de la

revoluciigo de la oficejo estas turni vizaĝon al bazaj unuoj kaj servi al batalantoj. Ni devas tuj organizi servotaĉmenton por iri al bazaj unuoj, al la insuloj en la maro!” Tiu ĉi propono tuj ricevis aprobon de la vastaj amasoj. Sub la gvido de la partia komitato fondiĝis malgranda kaj elita surmara servotaĉmento, konsistanta el kadroj, batalantoj kaj laboristoj kaj oficistoj.

Tuj post la fondiĝo de la servotaĉmento, la kamaradoj ekstudis serioze la historion de batalo inter la du linioj en la Partio, ripetade studis la armekonstruan penson de Prezidanto Maŭ kaj principon de Vicprezidanto Lin emfazantan politikan armekonstruon. Post studo ĉiuj komprenis: Ĉu la laboroj de la oficejo estas farataj vizaĝe al bazaj unuoj kaj enradikiĝas en rotoj aŭ ne, tio estas la demando de fundamenta direkto koncernanta, ĉu oni povas aŭ ne povas strikte sekvi la armekonstruan linion de Prezidanto Maŭ kaj efektivigi revoluciigon de trupoj, sub la diktaturo de la proletaro. Nur se oni turnas la vizaĝon al

bazaj unuoj, enradikiĝas en rotoj, oni povas intime ligiĝi kun la amasoj, forbalai la polvon de burokratismo kaj fari pli solide la preparadon kontraŭ milito. En iu kritika kunveno, kamaradoj forte kritikis la renegaton, internan spionon kaj laborist-perfidulon Liu Ŝaŭki. Taĉmentanoj diris: “La burĝara milita linio de Peng Dehuaj kaj Luo Ĵujking estas grava konsistiga parto de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Tiu linio ja igas la laborantojn en oficejo apartiĝi de la amasoj, fariĝi burokratoj kaj grand-sinjoroj, meti la profesion laboron en la unuan lokon kaj vidi nur materion sed ne homon. Ĉu la administracio servu al rotoj aŭ rotoj servu al la administracio, tio estas dividlinio inter la proletara revolucia linio kaj la kontraŭrevolucia reviziisma linio, estas ekzamenŝtono por distingi la verajn revoluciulojn dis de la falsaj. Ni nepre antaŭenmarŝos brave laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.”

Kun profunda proletara sento al Prezidanto Maŭ kaj profunda amo al batalantoj sur la insuloj, la servotaĉmento ekiris al la insuloj!

## KUN LA TUTA KORO POR LA INSULOJ

La surmara servotaĉmento fervore servas al batalantoj kaj pro tio estas tre amata de ili. La batalantoj diris: “La servotaĉmento pensas kion ni pensas; kaj la servotaĉmento eĉ pensas por ni kion ni ankoraŭ ne pensas.”

En laŭdado la servotaĉmento pli severe postulas de si mem.

Iufoje, kiam la servotaĉmento estis preta forlasi iun malgrandan insulon, kaj la ŝipo estis tuj ekveturonta, ĝia membro Ĉen Hinĝen ankoraŭ restis en la domo por kontroli la jam flikitajn vestojn. Trovinte sojograndan truon sub la kolumo de iu vatita vesto, ŝi senhezite ekprenis kudrilon kaj fadenon kaj decidis foriri nur post finfliko de tiu vesto. Kamaradoj de la roto diris: “Tiu estas vintra vesto kaj ne estas urĝe bezonata. Ni havos tempon por ĝin fliki.” Sed Ĉen Hinĝen respondis: “Ni jam venis ĉi tien, do ni ne devas preterlasi malgrandan truon sur la vestoj de la kamaradoj. Preterlaso de unu trueto signifas mankon en nia penso de servado al niaj batalantoj sur insuloj.” Ĉen Hinĝen surŝipiĝis nur post finfliko de la malgranda truon. La kadroj kaj batalantoj emocie diris al ŝi: “Vi ne nur flikis la malgrandan truon, sed ankaŭ per praktika agado donis al ni ekzem-

plon de ‘ekskluziva’ kaj ‘senrezerva’ servado al la popolo!”

Alifoje, iu batalanto venis al la taĉmentano Hjue Baŭsong por peti lin ripari fontoplumon. Hjue Baŭsong neniam tion faris kaj jam volis konfesi, ke tion li ne povas. Sed li pensis en si, ke por fari revolucion oni bezonas pafilon kaj plumon. Nun la batalantoj sur la insulo disvolvas revolucian amasan kritikon kaj tre bezonas tiun plumon, tial li plenkore akceptis la taskon. Li malmuntis sian fontoplumon, esploradis kaj trovis riparan rimedon. La difektitan pecon de fontoplumo de la batalanto li ŝanĝis per la sia kaj fine rebonigis la plumon. Tion rimarkinte, la taĉmentestro Ĉen Ĝeseng okazigis en la tuta taĉmento kunvenon pri viva studo kaj viva aplikoj de Maŭzedongpenso kun tiu afero kiel temo. Ĉiuj estis multe edifitaj. Revolucio ne havas finon, kaj la vojo de servo al bazaj unuoj estas neniam finirebla. Por dediĉi la tutan koron al la insuloj, oni devas, same kiel Hjue Baŭsong, lasi malfacilojn al si mem, sed neniom al la batalantoj. La taĉmentano Juan Tiekjun diris: “Antaŭe mi opiniis, ke bone fari la laboron en la kadro de propra ofico signifas plenumon de tasko, nun mi komprenas, ke en servado al batalantoj oni ne devas esti limigitaj de la kadro de ofico; la bezonoj de batalantoj ja estas ĉiuj en la sfero de nia servado.”

De tiam, por kontentigi la bezonojn de batalantoj, la taĉmentanoj klopodis ĉiurimede fari sin kapabluloj en diversaj aferoj. Kion ili antaŭe ne scipovis fari, tion ili eklernis. Vidinte, ke ladaj siteloj kaj teleroj de la batalantoj difektiĝis, la veterana tajloro Feng Zeĝang tuj iris al koncerna riparejo por tie lerni arton de lutado. Liaj manoj, kiuj antaŭe sciis manipuli nur tondilon kaj liniilon, nun kapablas uzi ankaŭ fajroblovilon kaj lutilon. Vektoportante kudromaŝinon kaj forneton li grimpas montojn kaj travadas riverojn por servi al la batalantoj.

Antaŭe la servotaĉmento nur riparis kaj flikis vestojn, ŝuojn kaj aliajn ĉefajn militajn provizaĵojn, kaj poste ili pliiĝis sian servadon al pli ol 50 objektoj. Dum tri jaroj ili riparis por la trupoj sur insuloj grandan nombron da ekipaĵoj kaj ĉiutagaj necesajoj kaj, krome, elkulturis pli ol 200 ruĝajn riparistojn kaj flikistojn, kiuj restas sur la insuloj kiel konstanta servotaĉmento. Tio multe kuraĝigis la batalantojn sur la insuloj. La batalantoj diris: “Ke vi tiel fervore zorgas pri ni, tio plifirmigas nian feran volon gardi la insulojn. Ni volontas gardstari sur la insuloj la tutan vivon por defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ.”



## BRILO DE MAŬZEDONGPENSO LUMIGU LA INSULOJN

La progresemaĵoj de revoluciaj batalantoj senlime fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj ilia penso de kontinua revolucio stimulas la servotaĉmenton senĉese antaŭenmarŝi. La lasta ne nur portas al la insuloj materialojn bezonatajn de la batalantoj, sed ankaŭ portas la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson en ilian koron.

Foje, la servotaĉmento venis al iu insulo kaj trovis, ke la roto tie konsumas karbon kompare multe. Kvankam la forno estas jam reformita, sed la kvanto de la konsumita karbo ne multe malpliĝis. Kie kuŝas la kialo? La membro de la taĉmento Hjue Linmu trovis en la cindro multajn neplene brulintajn karbokernojn, li do iris al kuirgrupo por dormi kaj labori kune kun la hejtisto kaj baldaŭ trovis la kialon — tiu rekruto ja elfosas cindron antaŭ ol la karbo estas plene brulinta kaj tiel malŝparis multe da karbo. Hjue demandis la rekruton: “Ĉu tio ne estas domaĝinda?” “Ne gravas iometo da karbo por nia granda lando. Ĉu ĝi devas ankoraŭ kalkuli pri kelkaj karbokernoj?” La respondo de la rekruto tiris la kamaradojn de la servotaĉmento al profunda medito. Ĉiuj eksentis profunde, ke kontentigi la materiajn bezonojn de rotoj kaj solvi por ili realajn problemojn prezentas nur unu flankon de laboro vizaĝe al bazaj unuoj, kaj la pli grava flanko estas fari ideologian laboron, porti Maŭzedongpenson al la insuloj kaj en la koron de la batalantoj.

Hjue Linmu estas maljuna kamarado. En la malnova socio li petis almozon kaj kolektis karbokernojn. Nun li denove kolektis neplene brulintajn karbokernojn kune kun tiu rekruto. Ĉe la cindramaso Hjue Linmu diris al tiu rekruto, ke en la malnova socio malriĉuloj devis almozpeti kaj kolekti karbokernojn, ĉar la regpotenco estis tenata de bienuloj kaj riĉuloj. Nun ni jam prenis al ni la regpotencon, sed ni ne devas kuŝi senzorge sur dika kapkuseno, ĉar la venkita klaso ankoraŭ baraktos, imperiismo, reviziismo kaj reakciularo ankoraŭ faras provokojn, tial ni devas sufiĉe prepari nin kontraŭ milito. Pli da ŝparita karbo signifas pli da forton por venki malamikojn. Altiĝis la ideologia konscio de tiu batalanto kaj li firme memoras la instruon de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”, kaj multe ŝanĝiĝis lia laboro. Por sin instigi li skribis ĉe

la forno: “Rigardante la fajron en la forno, pensu la sepcentmilionan popolon. Ŝparu dum revolucio por batali kontraŭ la malamikoj” kaj multe reduktiĝis la kvanto de konsumita karbo.

Tiu afero pliprofundigis la komprenon de la kamaradoj pri la granda instruo de Prezidanto Maŭ, ke **politiko estas komandanto, animo**, kaj “**politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro**”. Ĉiuj ekkonsciis, ke la surmara servotaĉmento devas esti propaganda taĉmento de Maŭzedongpensoj kaj propagando de Maŭzedongpensoj devas fariĝi ĝia plej fundamenta tasko. Por turni la vizaĝon al bazaj unuoj, oni unue devas fari tie la politikan kaj ideologian laboron. De tiam, kien ili venas, tie ili metas la propagandon de Maŭzedongpensoj sur la unuan lokon antaŭ ĉiuj aliaj laboroj. Vicestro de la taĉmento Ĉen Liangtong proponis: kolekti la “tradician pelvon” uzatan de iu roto dum kvin generacioj kaj “revolucionian pioĉon” uzatan de dek tri jaroj k.s. por ekspozi ilin rondire, kolekti faktojn pri bonaj homoj kaj bonaj aferoj kaj priskribi tiujn en programero por propagandi la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**” kaj la gloran tradicion de nia armeo de penado kaj luktado. Kien ili venas, tie ili propagandas. Iufoje, kiam ili jam pretis forlasi iun insulon, ili informiĝis, ke kvar batalantoj de la gvatejo sur la alta montpinto ankoraŭ ne spektis ilian prezentadon, ili senhezite tien iris kaj faris por ili prezentadon. La batalantoj diris: La servotaĉmento vere estas propaganda taĉmento de Maŭzedongpensoj.

## BONA KLASĈAMBRO POR REVOLUCIIGO DE IDEOLOGIO

La ruĝa suno lumigas la dekmil-lian vojaĝon kaj la ventoj kaj ondoj de la suda maro elhardis ruĝajn korojn.

Dum tri jaroj, la kamaradoj de la servotaĉmento batalis sur insuloj kaj vivis inter batalantoj. Ili ensorbis riĉan politikan nutraĵon de la batalantoj. Laborante en oficejo iuj kamaradoj ne povis trovi siajn mankojn. Sed kiam ili venis sur la insulojn kaj kontaktiĝis kun la batalantoj, ili kvaŝaŭ venus antaŭ puran spegulon kaj tuj rimarkis “polvon” sur sia korpo.

La membrino de la taĉmento Liang Vanven naskiĝis kaj kreskis kaj ankaŭ laboras en urbo, tial ŝi ne havis profundan komprenon pri la vivo de

NOVE PRODUKTITAJ KURACAJ INSTRUMENTOJ

Disvolvante la revolucian spiriton de mem-stareco, sendependeco kaj sinapogo sur propraj fortoj, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj de ŝanhajaj industriaj entreprenoj por produkto de kuracaj instrumentoj sukcese provproduktis novajn kuracajn instrumentojn, kiuj estas relative malgrandaj, bonkvalitaj, malalt-produkstkostaj, taŭgaj por uzado en la kamparo kaj montriĝis tre bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj revoluciaj kuracaj laborantoj.

Depost la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, ŝanhajaj laboristoj jam sukcese provproduktis pli ol 60 specojn de novaj kuracaj instrumentoj, el kiuj sufiĉe granda parto ŝtopis breĉojn en la kuraca instrumentaro de nia lando kaj iuj jam atingis aŭ superis la avangardan nivelon internacian. Ekzemple, la revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Elektronaj Aparatoj por Kuracado sukcese provfabrikis malgrandtipan altfrekvencan operaciilon. Per tia aparato, kuracistoj povas amputi histon de viva korpo kaj sigeli sangtubojn. La tuta aparato pezas nur 5 kilogramojn, ĝiaj grandeco kaj pezo estas nur deksepono de tiuj de importita altfrekvenca elektrona amputaparato, ĝi estas facile portebla kaj uzebla daŭre dum 19 horoj. En amputo, koagulo kaj precipe en amputo de dika graso kaj intesto ĝia laborkvalito superas tiun de samspeca produktaĵo de la kapitalismaj landoj. Kaj krome, la aparato estas aplikebla por diversaj operacioj por kuraci malsanojn de encefala kirurgio, ginekologio, okulo, otorinolaringologio kaj urologio kun tre rimarkinda efiko.

KORESPONDI DEZIRAS

- \*Vladislav Piecha, Havirov X cp. 605 okr. Karvina, Ĉeĥoslovakio.
- \*Multnombraj esperantistoj de la Popola Universitato el Trapani dez. kor. Skribu al Casella Postale N.23, 91100, Trapani, Italio.
- \*Jan Vedevik, 50-j. laboristo el Svedio: Huvudpostkonporet, GÖTEBORG 1, dez. kor. pri ĉiuj temoj.

la batalantoj. Sur la insuloj ĉiu vorto kaj ĉiu ago de la batalantoj profunde edukis ŝin. Iufoje, ŝi vidis, ke iu batalanto manipulas grandan martelon pezan je 12 funtoj, malgraŭ ke li havas furunkon sub sia brako. Kiam aliaj volis lin anstataŭi, li tion firme rifuzis. Liang Vanven diris al li: "Iom ripozu, ankoraŭ longa estas la vojo de la revolucio." Sed la batalanto respondis: "Ĝuste pro tio ni devas rapide strebi antaŭen!" Aliffoje, flikante veston ŝi demandis iun batalanton: "Tutjare vi vivas sur malgranda insulo. Ĉu vi ne sentas tion peniga por vi?" La batalanto diris: "Ni venis ĉi tien ja por revolucii kaj revolucio estas afero peniga. Kiu revolucias, tiu ne timas penadon kaj kiu timas penadon, tiu ne povas revolucii!" La spirito de la batalantoj, kiuj tenas patrolandon en la koro kaj ĉirkaŭprenas la mondon en la okuloj, ne timas penadon kaj tutkore revolucias, donis profundan edukon al Liang Vanven. La kamaradoj de la servotaĉmento memkonscie prenas lernon de la revolucia spirito de la batalantoj sur la insuloj timi nek penadon nek morton kiel komencon por remuldi sin kaj akceli sian ideologian revoluciigon. Iuj kamaradoj antaŭe ne kutimiĝis al surmara vivo kaj tuj ekvomis surŝipiĝinte. Tiam ili prenis la batalantojn kiel ekzemplon, neniom cedis al ventoj kaj ondoj, kaj ili iris tien, kie pli grandaj estas ventoj kaj ondoj. La kamaradoj ĉiuj portas pakojn dorse aŭ vekte kaj grimpas montojn malgraŭ varmo, prenante penadon kiel ĝojon. Ili diris ridante: "Iri tian vojon estas plej signifplene. Unu paŝo antaŭen signifas plian proksimiĝon al la koro de batalantoj."

Sub la nutrado de la brilo de Maŭzedongpenso, la surmara servotaĉmento spertis hardadon de ventoj kaj ondoj de la suda maro kaj aperis en ĝi granda nombro da progresemaĵoj personoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Dum tri jaroj, 70 procentoj de la kamaradoj de la tuta taĉmento estis premiitaj pro sia kontribuo kaj el tiuj tri kamaradoj estas elektitaj kiel aktivuloj de kantonaj trupoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

La revoluciigo de ideologio de la taĉmentanoj akcelas revoluciigon de la oficejo. Dum la lastaj tri jaroj la oficejaj kadroj en la taĉmento jam alternis sepfoje. Dank' al hardado en bazaj unuoj tiuj kamaradoj plie starigis la solidan penson turni la vizaĝon al bazaj unuoj kaj tutkore servi al rotoj. Ili fariĝis ruĝaj semoj en la oficejo kaj stimulas senĉesan ŝanĝiĝon de ĝia fizionomio. Fari ĉion por bazaj unuoj jam fariĝis ĝenerala moro en la oficejo.



# Por Revolucio Li Volontis

## Vivoferon

— Pri la komunisto kamarado

Ĉeng Bingĉen

**L**A komunisto Ĉeng Bingĉen estis stabano de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj antaŭa estro de la plotono en kiu martiro Dong Cunĵuj servis antaŭ sia morto. En kriza momento de neatendita eksplodo de grenado, por protekti la sep klasajn fratojn ĉeloke, Ĉeng Bingĉen sin ĵetis kaj oferis sian karan vivon al la revolucio kaj la popolo. Tio plene manifestis noblan komunisman virton de la komunisto **“kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem”** kaj elmontris ĝisfunde revolucionan spiriton de proletara avangarda batalanto **“timi nek penadon nek morton”**.

### KURAĜA SINO FERRO POR LA POPOLO

La 2-a de marto, 1969, estis la tago en kiu niaj limgardaj armeanoj kaj popolanoj akiris grandan venkon en frakasado de la invado farita de la novaj caroj de sovetunia reviziismo al nia sankta teritorio Ĝenbaŭ-insulo. Posttagmeze de tiu tago, en garnizona loko de iu trupo de artilerio ĉe Mudan-

rivero, sub la gvido de rotestro Ĉeng Bingĉen, grupo da vicleplenaj rekrutoj venis al trejnejo por fari trejnadon de ĵetado de veraj grenadoj.

Ĉeng Bingĉen tre zorgis pri la kreskado de novaj batalantoj kaj ofte rakontis al ili pri la heroaĵo de Dong Cunĵuj, kiu sin oferis por eksplodigi fortikaĵon. Li diris al ili: **“Kiel Dong Cunĵuj, ni devas maltimi sinoferon, se ni volas ĝisfine konduki la socialisman revolucion kaj ĝisfunde entombigi imperiismon, reviziismon kaj reakciularojn.”** Same kiel la heroaj batalantoj gardantaj la sanktan teritorion Ĝenbaŭ-insulo de la patrolando, la novaj batalantoj harditaj en la batalo de la Granda Proletara Kultura Revolucio ĉiuj estas plenaj de vigleco kaj alta batalvolo. Per emocia voĉo Ĉeng Bingĉen al ĉiuj diris: **“Nun la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo intensigas frenezan oponadon kontraŭ Ĉinio. Ni devas firme memori la instruon de Prezidanto Maŭ: Se la malamikoj akriĝas tranĉilojn, ni devas ankaŭ tion fari. Ni devas preni Dong Cunĵuj kiel ekzemplon, dis-**

volvi revolucian spiriton ‘timi nek penadon nek morton’ kaj esti ĉiam pretaj ekstermi aŭdace invadantajn malamikojn!”

Montrante la celtabulon, Ĉeng Bingĉen diris: “Kamaradoj, jen antaŭ ni estas la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo, la pafekzercejo estas batalkampoj kaj la celtabulo ja estas malamiko. Ni nepre devas eksplodigi ĝin ĝis disrompiĝo.”

Kun ĝisosta malamo al imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj, ĉiuj novaj batalantoj firme prenis grenadon kaj forte ĝin ĵetis al la “malamiko”.

Okazis akcidento: Kiam iu nova batalanto faris ĵeton, li tro frue ellasis la grenadon pro uzo de tro granda forto, tiel ke la grenado falis sur ŝtona muro en dekstra fronto fore de 3 metroj. La fumanta grenado ruliĝis laŭ la deklivo al homamaso. Estis videble, ke ĝi tuj eksplodiĝos, kio serioze minacas la vivon de 7 klasaj fratoj ĉelokaj.

Dum tiu ĉi kriza momento, la brilaj figuroj de herooj Dong Cunĵuj, Vang Gie, Men He kaj aliaj inspiris Ĉeng Bingĉen. Li alsaltis laŭte kriante: “Kuŝiĝu!” Li kuŝiĝis perforte sian apudstarantan kamaradon kaj decideme sin ĵetis al la tuj eksplodonta grenado kun la revolucia heroismo de Dong Cunĵuj kiu sinofere eksplodigis fortikajon. . . .

En palpebrumo, tondris bruego “bum” kaj leviĝis densa fumo.

La kunbatalantoj alrapidis tien kaj haste prenis Ĉeng Bingĉen al sia sino. Li malrapide malfermis siajn okulojn kaj kun levita kapo kaj elstarigita brusto diris al ĉiuj: “Tuj savu kamaradojn! Estas nenio grava al mi.” La kamaradoj diris al li ke ĉiuj aliaj estas sekuraj. Tiam Ĉeng Bingĉen malpeze karesis per sia mano la ore brilantan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj kun rideto ĉesis spiri.

Por savi siajn sep klasajn fratojn Ĉeng Bingĉen heroe sin oferis. Kamarado Ĉeng Bingĉen ofte diris antaŭ sia morto: “La loko, kie estas malfacilo kaj danĝero, ja estas la plej glora batalposteno. Komunistoj devas batalakiri venkon en malfacilo kaj danĝero.”

En la jaroj 1961 kaj 1964, kiam la produkta brigado en la garnizona regiono suferis brulegojn, Ĉeng Bingĉen ambaŭfoje sin ĵetis en la fajrejon riskante danĝeron por sekurigi la kolektivajn riĉaĵojn kaj eldanĝerigi malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn.

En 1962, Ĉeng Bingĉen gvidis batalantojn transporti elektrajn stangojn. Kiam iu granda stango

ruliĝis suben de sur la veturilo, li alrapidis kaj haltigis la falantan stangon per sia ŝultro, tiamaniere li protektis 12 klasajn fratojn ĉe la veturilo.

En 1965, li brave saltis en Mudan-riveron kaj luktis kontraŭ torenta fluego por savi iun novan batalanton.

En 1966, kiam ŝtonego 50 kilogramojn peza ruliĝis desupre ĉe iu konstruejo, li sinforĝese forpuŝis batalanton sube laborantan, tamen li mem estis vundita.

Kaj nun li protektis 7 klasajn fratojn per siaj sango kaj vivo.

## POR REVOLUCIO PRENI PENADON KIEL ĜOJON

Ĉeng Bingĉen naskiĝis en ordinara kamparana familio en Ŝandong-provinco. En 1951, kun la decido defendi Prezidanton Maŭ, la 18-jara Ĉeng Bingĉen iris en la Popolan Liberigan Armeon, la grandan lernejon de Maŭzedongpenso, kaj venis al la roto en kiu Dong Cunĵuj servis antaŭ sia morto. Sub la nutrado de Maŭzedongpenso, Ĉeng Bingĉen rapide kreskis kaj fariĝis proletara avangarda batalanto. En la ĵurkunveno por aliĝi al la Partio, li solene ĵuris: Por ĉiam mi strikte sekvos Prezidanton Maŭ en revoluciado kaj batalos tutan vivon por realigi komunismon!

En ĉiuj aferoj Ĉeng Bingĉen direktis sian agadon per grandaj instruoj de Prezidanto Maŭ, prenis heroon Dong Cunĵuj kiel brillan ekzemplon kaj memkonscie hardis sin per la ĝisfunda revolucia spirito “timi nek penadon nek morton”. Kaj dum la plenumado de diversaj taskoj, li ĉiam prenis penadon kiel ĝojon, konkure faris malfacilan laboron, la unua venis al la loko, kie estis malfacilo kaj sin ĵetis antaŭen antaŭ la aliaj en la momento, kiam okazis danĝero.

Ĉeng Bingĉen ĉiam sin gardis de la korodo de la burĝara ideologio kaj tenis en si la bonan laborstilon de penema lukto kaj la naturon de la proletara revolucia batalanto. En 1956, la trupo, en kiu servis Ĉeng Bingĉen, iris el peniga cirkonstanco en luksan urbon. Li foje-foje serioze studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: “. . . ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ke la kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema lukto.” La instruo de Prezidanto Maŭ, kvazaŭ brilanta lumturo, montris al Ĉeng Bingĉen antaŭenmarŝan direkton. Li



## NEK POR FAMO NEK POR PROFITO, SED TUTKORE POR KOMUNISMO

komprenis, ke ankoraŭ ne finiĝis la klasbatalo, kaj ke oni devas por ĉiam konservi la gloran tradicion de penema luktado, se li volas konduki ĝisfine la revolucion. Li firme aŭskultis la vortojn de Prezidanto Maŭ, sin defendis kontraŭ la atako de sukertegita obuso de la burĝaro kaj memkonscie konservis peneman luktadon en sia laborstilo. Li persiste postulis de si mem per la kriterio de ordinara soldato, kaj studis, laboris kaj vivis kune kun batalantoj, neniam rigardante sin eksterordinara super ili.

En la roto, kie laboro estis plej peza, tie li laboris; kie tasko estis plej peniga, tie li batalis. Ju pli peza estis la tasko, ju pli peniga estis la laboro, des pli ĝoje li plenumis ilin. Li opiniis: Ju pli kiam estas malfacilo kaj ju pli kie estas postulata penado, des pli bona estas la tempo kaj loko por hardi sin per la revolucia spirito “timi nek penadon nek morton”.

Vintre de 1968, kune kun la roto Ĉeng Bingĉen iris al arbara regiono de Jiĉun por haki arbojn. Dum la transgrimpado de neĝaj montoj kaj trairado de primitivaj arbaroj, li kune kun la batalantoj soife studis la brilajn “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kaj rakontis al ili pri la heroaĵo de Dong Cunĵuj sidante en neĝkavo. Li diris al ili: “Kvankam ni tenas en la manoj nur hakilojn kaj segilojn, tamen ni ĉiuj laboras por konstrui komunismon. Komunismo estos kreita dank’ al laborado de dekmilionoj da homoj, kia Dong Cunĵuj, timantaj nek penadon nek morton.”

Iutage, Ĉeng Bingĉen ricevis telegramon de supera instanco por urĝigi transporton de nombro da arbtrunkoj en mallonga tempo. Por scii, kiom da arbtrunkoj en unu hakdistrikto oni povas haki kaj transporti, Ĉeng Bingĉen kun helpo de ligna apogbastoneto vadis sur neĝo kaj vizitis ĉiujn hakdistriktojn por esplori kaj kalkuli la nombron de arboj unu post alia malgraŭ frosteco de 30° C sub nulo. Liaj gamboj suferantaj artriton serioze doloradis al li fojon post fojo en glacio kaj neĝo. Ĉeng Bingĉen foje-refoje parkere recitis la instruon de Prezidanto Maŭ: “**Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidus faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam esti subigita de malamikoj. En kiel ajn malfacilaj kaj penigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu sola homo, li batalos plu.**” La instruo de Prezidanto Maŭ kuraĝigis lin batali kontraŭ doloro, frostado kaj malfacilo. Post esplorado dum 15 tagoj, li fine havigis al si klaran konon pri la stato de ĉiuj hakdistriktoj, kaj tiamaniere garantiis la venkan plenumon de lignohaka tasko.

Kiel kadro dum dekelkaj jaroj Ĉeng Bingĉen faris multajn kontribuojn al la revolucio kaj multajn aferojn utilajn al la popolo, tamen li neniam parolis pri siaj “kontribuoj” aŭ “penoj”. Sed lia interparolo kun kamaradoj ofte temis pri tio kiel plibone oni devas vive studi kaj vive apliki la verkon de Prezidanto Maŭ kaj kiel strikte oni devas sekvi Prezidanton Maŭ en daŭrigado de revolucio. Li opinias, ke famo, profito, pozicio kaj materia ĝuo ĉiuj estas fremdaj por komunistoj. Li diris: “Komunistoj ja devas batali nek por famo nek por profito, sed tutkore por komunismo.” Dum dekelkaj jaroj, pro la bezono de laboroj Ĉeng Bingĉen estis transpostenigita 11 fojojn de oficejo al roto, de roto al oficejo, kaj iam eĉ de plialta rango al malpli alta. Ĉeng Bingĉen rigardis ĉiun transposteniĝon kiel provon fare de la Partio al si sur la vojo de daŭra revolucio. Kie ajn li estis metita de la Partio, li do tie laboris vigleplene kaj servis diligente al la popolo. Li skribis en sia taglibro: “Mi donas ĉion mian al l’ Partio, kaj mia vivo estas sub dispono de l’ Partio; senlime mi fidelas al Prezidanto Maŭ, kaj mi volantas esti ŝraŭbo de l’ revolucio.”

En 1966, por plifortigi la laboron de kultivejo, la organizo decidis transpostenigi Ĉeng Bingĉen de gvida instanco al la kultivejo de la trupo por esti grupestro. Li ĝoje iris al la nova posteno kun sia tornistro. Iuj opiniis, ke transpostenigi Ĉeng Bingĉen kiel grupestron de la kultivejo signifas malpromocion de lia ofico. Sed, Ĉeng Bingĉen diris: “Revolucio estas la plej alta ofico.” En la kultivejo Ĉeng Bingĉen firme praktikis la grandan principon de Prezidanto Maŭ “**teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito**”, sin tenis kiel ordinaran soldaton kaj kun plena revolucia energio manipulis plugilon kaj veturigis ĉaron kaj nutris kaj paŝtis bovojn kune kun la batalantoj en vento kaj pluvo. Timante nek penadon nek malpurecon, li sinforgese batalis sur la plejfronto de produkto. Li prenis la kultivejon kiel bonan lernoĉambron por ĝisfunde reformi la mondkoncepton kaj bone fari revoluciigon de la penso, kaj rigardis la partoprenon de laboro kiel grandan fornon por hardi sin per la revolucia spirito “timi nek penadon nek morton”. Li skribis en sia taglibro: “La celo, por kio komunisto vivas, estas nur unu sola: ekstermi imperiismon, reviziismon kaj reakciularojn, liberigi la tutan homaron kaj realigi komunismon.”

# Duonagrokultura kaj Duonkuraca Taĉmento

**I**NTER malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝinŝan-gubernio de Ŝanhajo aktivis duonagrokultura kaj duonkuraca taĉmento formita el 20 junaj kuracistoj kaj flegistoj de Huaŝan-Hospitalo de Ŝanhajo. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, ili forlasis la grandan hospitalon en la urbo kaj venis al kamparo. Tie ili laboras kiel kuracistoj kaj ankaŭ kiel kamparanoj. Aperis sur iliaj manoj kaloj kaj sur iliaj vestoj flikaĵoj. Multe ŝanĝiĝis ilia penso kaj ili estas varme laŭdataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

## PROFUNDA EDUKO PRI BATALO INTER LA DU LINIOJ

Alveninte al kamparo, la taĉmento tuj ricevis profundan edukon pri batalo inter la du linioj en kuraca kaj higiena laboro.

Dum sia rondira kuracado, iu el la kuracistoj akceptis pacientinon, kiu estis maljuna malriĉkamparanino kaj suferis artriton jam 10 jarojn, ne povante movi sin ĝis nun. Post diagnozo la kuracisto demandis: “Kial vi ne pli frue kuracigis vin?” La demando rememorigis al la maljunulino malĝojan travivaĵon.

La maljunulino jam plurfoje petis helpon ĉe kuracistoj. Antaŭ kelkaj jaroj, kun forta espero resanigi ŝin, ŝia filo eĉ speciale klopodis havigi al ŝi sumon por ricevi kuracon ĉe Huaŝan-Hospitalo en Ŝanhajo. Kiu atendis, ke kuracisto de la hospitalo diagnozis malatente, donis al ŝi simplan preskribon, kaj ŝin resendis. La maljunulino

revenis hejmen kun larmoj. Ŝi do ne plu volis iri al hospitaloj en urbo. Pasis tagoj kaj jaroj, kaj ŝi ĉiam estis alnajlita al la lito.

Aŭdinte la rakonton, ke ŝi iam ricevis kuracon en lia hospitalo, la kuracisto ekpensis en si, en kia grado mankis al tiu kuracisto devkonscio al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj?! Li tuj petis la maljunulinon montri al li la pacientan karton. Sed, kia surprizo! Sur la karto troviĝas ja ĝuste lia propramana subskribo. Tenante la de li mem plenigitan karton en la mano, li rigardis la maljunulinon kuŝantan sur la lito kaj ekstreme ekhontis. En lia penso disvolviĝis intensa batalo. Li pensis en si: “En kuracarto mi ja tute kapablis resanigi la maljunulinon, ĉar mi multe legis pri kuracado de artrito kaj cetere havas klinikan sperton. Sed, kial mi tiam trovis sufiĉe nur preskribi tian simplan recepton?” Li dolore sentis antaŭ la maljunulino ke lia mondkoncepto nepre devas esti ĝisfunde reformita, kaj samtempe ankoraŭ pli forte malamamis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki en kuraca kaj higiena laboro.

Rememorante la doloran lecionon en la pasinteco, li decidis nepre resanigi la maljunulinon. Dum kuracado li kelkfoje venis al la pacientino en ĉiu tago por ekzameni ŝian staton kaj doni al ŝi medikamenton, kaj per praktika agado forte kritikis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de Liu Ŝaŭki en kuraca kaj higiena laboro kaj ĝisfunde eliminis ĝiajn venenajn influojn. Sub lia zorga kuracado kaj flegado la maljunulino nun jam povas forlasi sian liton kaj paŝi sur la tero.



La afero, kiun spertis la kuracisto, multe skuis la membrojn de la taĉmento. Kaj grandanombraj faktoj, kiujn ili renkontis dum vizitado kaj enketado, igis ilin plie pensi pri multaj demandoj: Kial la pacientoj en la kamparo, kies malsano estas pli grava, preskaŭ ĉiuj iris al hospitaloj en urbo sed ne estis resanigitaj? Kial mankas kuracistoj kaj medikamentoj en la kamparo? Kial antaŭe nia koro estis tiel malvarma al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj? . . . Ili ekkonis ke ĉiuj ĉi tiuj faktoj estas malbonaj rezultoj de la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de la granda renegato Liu Ŝaŭki en kuraca kaj higiena laboro kaj atestoj de lia krimo vane provi restaŭri kapitalismon!

“La problemo por kiuj estas problemo fundamenta, problemo de principo.” Ili ripetade studis tiun grandan instruon de Prezidanto Maŭ en ligo kun la realo de la batalo inter la du linioj en kuraca kaj higiena laboro kaj kun siaj propraj pensoj kaj forte kritikis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de Liu Ŝaŭki en kuraca kaj higiena laboro. Rememorante la venenajn influojn, kiujn ili ricevis de ĝi antaŭe en la hospitalo, multaj kuracistoj kaj flegistoj pliprofundigis malamon kontraŭ Liu Ŝaŭki kaj decidis sekvi la proletaran higienan linion de Prezidanto Maŭ, enradikiĝi en la kamparo kaj servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum la tuta vivo.

### AKCEPTI REEDUKON DE MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ KAJ PENEME REFORMI LA MONDKONCEPTON

La membroj de tiu duonagrokultura kaj duonkuraca taĉmento aktivas en la vasta kamparo kiel kuracistoj kaj ankaŭ kiel kamparanoj kaj ĉiam zorgas pri reformo de sia mondkoncepto. Por pli bone akcepti reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj konformi al la bezonoj de la kuracaj kaj higienaj laboroj en la kamparo, la 20 membroj de la taĉmento disiris al la apartaj 20 brigadoj de 3 komunumoj por tie kune lerni, kune kritiki, kune manĝi, kune loĝi kaj kune labori kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Sub la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, okazis al ili granda ŝanĝiĝo en la sentimento: la inklino al la urba vivo turniĝis al varma amo al la kamparo kaj anstataŭ konsideri sin nur kuracistoj ili konsideras sin ordinaraj komunumanoj.

Kiam iu kamaradino venis al iu brigado kaj ne vidis siajn kolegojn en la taĉmento por kelkaj tagoj, ŝi sentis solecon kaj ĉagrenon. Poste, ŝi studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *La Direkto de la Junulara Movado*, ripetade pripensis la profundan signifon de “kombiniĝo kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj”, kaj tiel ekkomprenis, ke vivante inter la vasta amaso de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, oni devas senti sin hejme. Sed, kial ŝi sentas solecon? Tio ne nur montras problemon en ŝia sento mal-sama al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sed ankaŭ spegulas ŝian sintenon en la problemo “por kiuj”. De tiam ŝi komencis konscie kombiniĝi kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj rigore postulas de si, nome: estu same kuraĝa kiel ili en batalo kon-

*Juna kuracistino vizitas malsanan malriĉkamparaninon-avinon.*



traŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo en ideologio; estu same malluksa kiel ili en vivado; kaj estu same tutkore sindonema kiel ili en revoluciado.

La profunda proletara sento de senlime varma amo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj ilia serioza sinteno en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso profunde stimulis ĉiujn membrojn de la taĉmento. Foje iu kuracisto laboranta en Ginvej-komunumo aŭdis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ. Li tuj venis al la brigado sen preno de vespermanĝo kaj tie ĝin legis kaj ripetadis kune kun kelkaj maljunaj malriĉkamparanoj vorton post vorto kaj frazon post frazo. Kiam li rimarkis ke la maljunuloj jam povas parkeri, li ekdemandis ilin: “Ĉu jam sufiĉas?” La maljunuloj respondis: “Kiel povas esti sufiĉo en studo de la plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ? Kiam oni povas parkeri, oni devas ankoraŭ profunde kompreni ĝin por ke oni povu ĝin efektivigi bone.” Antaŭe la kuracisto pensis, ke sufiĉas al li ĝin legi kaj parkeri kune kun la maljunaj malriĉkamparanoj. Sed, en komparo kun la maljunaj malriĉkamparanoj li ne povis ne senti, ke lia politika konscio estas tro malalta. Sub edukado de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj per praktika agado, li korektis sian malbonan lernostilon de apartiĝo de teorio disde la praktiko kaj multe progresis en ideologio.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas tre zorgemaj en politiko al la membroj de la taĉmento, ĉiam donas al ili varmkorajn helpojn cele al iliaj ideologiaj mankoj kaj edukon pri klaso kaj batalo inter la du linioj por levi ilian konscion pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. Multaj maljunaj malriĉkamparanoj meminitate rakontis al ili vilaĝajn kaj familiajn historiojn kaj montris al ili la “kavegon por dekmil homoj”, kie sennombraj malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj martiroj estis mortigitaj de japanaj agresintoj kaj kuomintangaj reakciuloj. Sub la edukado de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la kamaradoj de la taĉmento grandpaŝe marŝas antaŭen sur la vojo de ideologia revoluciigo.

### **SERVI TUTKORE KAJ TUTANIME AL MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ**

Dum sia partopreno en produkta laboro en

kamparo kaj akceptado de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en pli ol ok monatoj, la kamaradoj de la duonagrokultura kaj duonkuraca taĉmento levis sian politikan konscion kaj pli firme starigis al si la penson de tutkora kaj tutanima servado al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili venkis diversajn malfacilojn, timas nek penadon nek laciĝon nek riskon de akcepto de respondeco kaj tutkore kuracas por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Iu maljuna malriĉkamparano de Jongŝengbrigado de Ginvej-komunumo suferis absceson en profunda parto de kaphaŭto, kiu terure turmentis lin, tiel ke li kuŝis sur lito ostece malgrasa. Kiam ĥirurgio de la taĉmento iris lin kuraci, la malsanulo rakontis al li prenante lian manon sian sperton ĉe kuracistoj: Ĉe la komenco de sia malsano, li jam vizitis iun hospitalon por kuracigi sin. Sed post malatenta ekzameno la kuracisto diris skuante sian kapon, ke la kazo estas serioza kaj nekuracebla, kaj tiel lin forsendis. La malsanulo vizitis kelkajn aliajn hospitalojn kaj ricevis saman traktadon. La akuzo de la maljuna malriĉkamparano vekis ĉe la ĥirurgio senkomparan indignon kaj malamon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki en kuraca kaj higiena laboro. La ĥirurgio decidis agi laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ kaj venki ĉiujn malfacilojn por resanigi la maljunan malriĉkamparanon. Li faris kune kun la “nudpiedaj kuracistoj” de la brigado sukcesan operacion por la maljuna malriĉkamparano. Kaj sub lia zorga flegado, la tranĉita loko rapide fermiĝis kaj la paciento tute resaniĝis. La maljuna malriĉkamparano diradis al ĉiu renkontita: “La kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki en kuraca kaj higiena laboro puŝis min al morto kaj la revolucia linio de Prezidanto Maŭ tiris min al vivo. La bona kuracisto sendita de Prezidanto Maŭ min resanigis, kaj Prezidanto Maŭ estas mia granda savanto!”

Sub la direktado de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, la duonagrokultura kaj duonkuraca taĉmento servas tutkore kaj tutanime al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Multaj rakontoj pri iliaj kortuŝaj agadoj vaste cirkulas inter la lokaj vilaĝoj. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdas ke ili estas bonaj kuracistoj senditaj de Prezidanto Maŭ kaj intimuloj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



# Dekknabina Paŝtgrupo



*Min ne timigas frosto, prujno kaj glacio,  
Nek pluvo bateganta kaj tempest' rabia.  
La tempon mi pasigas sur la step' mil-lia,  
Paŝtante la ĉevalojn por revolucio.*

## I

Tiuj dek knabinoj finis sian studon en elementa mezlernejo en 1968. Ili aktive respondis al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ ke intelektaj junuloj devas iri al montoj kaj kamparo, kaj venis kun entuziasmo de diversaj urboj en la interna parto de la patrolando al la Armea Ĉevalbredejo de Bajjinkulun. Laŭ la bezono de preparo kontraŭ milito, la partia komitato de la bredejo decidis fondi "deknabinan paŝtgrupon", kaj la dek knabinoj kun plena memfido decidis nepre bredi bone la militajn ĉevalojn.

Sur la vasta stepo senlime etendiĝanta sub Bajjin-monto kaj ĉe la ondanta Dali-lago, oni ofte aŭdas tiun arĝentan sonon kaj vidas knabinan paŝtgrupon tie aktivantan. Tute egale, ĉu en serena tago kun bela suno kaj milda vento aŭ en malluma nokto kun ruliĝanta sablovento aŭ pluvo kaj neĝo, tiu knabina paŝtgrupo ĉiam deĵoras laŭ fiksita tempo por paŝti ĉevalojn svingante vipon sur galopantaj ĉevaloj. Kie la knabinoj alvenas, tie ekregas gajeco: senĉesaj kantoj kun plena vikleco. Ĝi estas la "deknabina paŝtgrupo sub Bajjin-monto" formita el junaj intelektuloj de la Armea Ĉevalbredejo de Bajjinkulun.

Por paŝti ĉevalojn, la unua paŝo estas ellerni rajdadon. Tio estis malfacilo por la knabinoj, kiuj estis malgrandaĝaj kaj malaltkreskaj. Iuj eĉ ne povis atingi piedingon por surrajdi ĉevalon kaj, kiam ili surrajdis, malfacile estis denove por

ili deĉevaliĝi. Tamen, fronte al tiuj malfaciloj, la knabinoj tute ne hezitis en sia decido kaj memfido pri ellerno de rajdado por la revolucio.

Foje, Li Hiuling sola provis ekzerci sin en rajdado, sed ŝi neniel povis surĉevaliĝi, ĉar la ĉevalo rondiris ĉirkaŭ ŝi, kiam ŝi volis surrajdi ĝin. Tiamaniere, dum pli ol unu horo la ĉevalo turniĝis jen dekstren jen maldekstren, ne lasante ŝin surrajdi ĝin, tiel ke malgranda Li ekploris ĉagrene, sidante sur la tero. Tiam ŝi ekmemoris la instruojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al junuloj kaj virinoj kaj pensis en si: "Sensence! Por kio taŭgas larmoj!" Ŝi stariĝis kaj forviŝis la larmojn. Levante sian kuraĝon kaj recitante la vortojn de Prezidanto Maŭ "**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon**", ŝi denove provis. Unufoje, dufoje, trifoje . . . kaj fine ŝi sukcesis surĉevaliĝi unuafoje per si mem. Dum ekzercado, Caŭ Hin multfoje falis de sur la ĉevalo. Iutage, ŝi falis de sur la ĉevalo kaj vundiĝis al ŝi la ŝultro. Aliaj konsilis ŝin ripozi, sed ŝi firme tion rifuzis kaj diris: "Estas nenio grava. Sen falado, ne eblas forigi malbonajn egoismajn ideojn for de la kapo kaj elhardi malmolajn ostojn!" Malgraŭ la doloro, ŝi resurĉevaliĝis kaj daŭrigis la lukton por sin ekzerci. Tiuj obstinaj knabinoj tage kaj nokte ekzercis sin kun koro plene fidela al Prezidanto Maŭ. Ili senĉese resumis sian sperton kaj senĉese progresis kaj fine ellernis rajdarton kaj povas galope rajdi sur la senlima stepo!

## II

Paŝti en nokto estas malfacila laboro eĉ por veteranaj paŝtistoj. Por tiuj knabinoj sidi unu nokton sur la vasta stepo jam estas afero sufiĉe suferiga por ne paroli pri paŝtado. Se tio tamen estas pli malpli eltenebla en bona vetero, ankoraŭ pli malfacile estas en la tempo, kiam malboniĝas la vetero aŭ okazas io eksterordinara.

Iun tagon, la dek knabinoj devis deĵori en nokto. Ĵus kiam ili prenis la taskon, subite ŝanĝiĝis la vetero. Blovis sur la vasta stepo furioza vento, kiu levis sablon kaj rulis ŝtonojn. Dense amasiĝis grizaj nuboj kaj tondris surdige. Post kelkaj fulmoj, ekfalas pluvego kvazaŭ el sitelo, kaj la vasta mil-lia stepo tuj fariĝis nebula mondo. Rajdante sur ĉevalo, la knabinoj ne povis malfermi siajn okulojn kaj vidi la gregon. Sed, malgraŭ ĉio ĉi tio ili laŭte recitis vortojn de Prezidanto Maŭ en vento kaj pluvo, kriis, obstine haltigadis la frontajn ĉevalojn dank' al la ekbrilo de fulmoj kaj kuraĝe rondkuris sur la stepo. Ne atendite,

tondro eksplodis subite ĝuste super la loko, kaj centoj da militaj ĉevaloj sage flugis henante al nordokcidento. Sub la lumo de fulmo, ili vidis ke la grego jam forkuris malproksimen. Kriante ili postkuris ĝin renkonte al pluvo kaj vento. Tondris kaj pluvegis. Sur la stepo estis tiel mallume, ke nenio estis videbla ekster du paŝoj. La grupestro Niu Enhuj laŭte recitis la vortojn de Prezidanto Maŭ: "**Tiu ĉi armeo posedas nevenkeblan spiriton marŝi sentime antaŭen**" kaj alvokis la aliajn rapide postkuri. Nur post galopado de pli ol 20 lioj, ili sukcesis haltigi la gregon ĉe iu montpiedo kaj repeli ĝin malgraŭ la furioza vento kaj batanta pluvo. Ili fine revenis triumfe al la bredejo venkinte la froston kaj laciĝon.

## III

Ellerni rajdarton, scipovi paŝton kaj noktan deĵoron estas nur komenco por la paŝtista vivo sur la stepo. Malfaciloj venas sinsekve. La dek knabinoj kuraĝe batalas sur la vasta stepo kvazaŭ agloj en ŝtormo.

Por paŝti ĉevalojn sur la stepo, la unua afero estas akomodigi al malfacila vivo. Dum la tuta jaro, tie la vetero ŝanĝiĝas tre abrupte. Tio vere estas provo por la dek knabinoj, kiuj kreskis en urboj de la interna parto de la lando. Kun sincere fidela koro al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ili prenis la vastan stepon kiel klasĉambron por vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson. Trovante ĝojon en laborado sub vento kaj neĝo kaj prenante malfacilan penadon kiel gloron, ili hardis sian fidelan koron sur la vasta stepo. Ili kuraĝe luktis kontraŭ vento kaj neĝo, konscie batalis kontraŭ siaj egoismaj ideoj, hardis kaj reformis sin en la tri grandaj revoluciaj movadoj.

Iun printempan nokton ĉi-jare, intensis vento, pluvo kaj hajlo. Kju Gin-je disiĝis de sia ĉevalogrego dum paŝtado. Portante sur si pezan peltan surtuton kaj feltajn botojn, ŝi ne povis surrajdi la ĉevalon kaj cetere ne havis kun si elektran torĉon. Hajleroj frapis ŝian vizaĝon dolore kaj malvarme. Tirante la ĉevalon, ŝi marŝis sur malglata tero kaj kriis jen al tiu direkto jen al alia direkto, sed ne trovis la gregon. Antaŭeniri aŭ retroiri? En tiu grava momento malgranda Kju ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ "**En kiel ajn malfacilaj kaj penigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu homo, tiu batalos plu**" kaj tuj venis al ŝi energio. Ŝi pensis: "Ju pli granda estas la malfacilo kaj ju pli grava estas la momento, des pli estas tempo de provo kaj bona okazo por hardi fidelecon al Prezidanto Maŭ." Ŝi revi-



gligis sian energion post iom da ripozo kaj daŭrigis la serĉadon. Post granda klopodo, ŝi fine trovis la perditan gregon ĉe iu lago. Matene, ŝi ĝoje pelis la gregon revene al la bredejo.

Nun la dek knabinoj montras sin kuraĝaj, obstinaj kaj aŭdacaj en la malfacila luktado de paŝto same kiel fortaj junuloj.

#### IV

Vidante la maturiĝon de la dek knabinoj, veteranaj paŝtistoj diris ĝoje: “Tiu knabinoj vere ŝanĝiĝis.” De unu jaro, ili sincere akceptis la reedukon ĉe la veteranaj paŝtistoj de la bredejo, senĉese batalis kontraŭ siaj egoismaj ideoj, kritikis reviziismon kaj reformis sian mondkoncepton, tiel ke ilia spirita fizionomio profunde ŝanĝiĝis.

Kiam Gin Anŝun venis de urbo al la bredejo, ŝi tute ne povis kutimiĝi al tio, ke la veteranaj paŝtistoj portas sur si ventĉapon kaj surtuton el blanka ŝafpelto kaj grandajn feltbotojn sur siaj piedoj, kun vizaĝo plena de flava polvo. Ifoje, kiam ŝi iris ĉeesti kunsidon en loĝejo de paŝtistoj, ŝi ne volis sidi sur la masonita lito, timante malpurigi sian veston, nek trinki la akvon, kiun paŝtistoj afable prezentis al ŝi. Kiam ŝi portis tritikajn pajlojn, ŝi strikte ligis al si la manikojn kaj gambumojn, surportis ventĉapon, kaj alligis viŝtukon ĉirkaŭ la kolo, por bari la eniron de pajleroj kaj polvo. Tial, la paŝtistoj ne rilatis kun ŝi proksime, kaj ankaŭ ŝi ne povis intimiĝi kun la paŝtistoj kaj dum certa tempo falis en ĉagrenon. Kun tiu problemo, malgranda Gin serioze studis la instruon de Prezidanto Maŭ “**Se intelektuloj ne kombinas sin kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio**” kaj sentis apartan intimecon. Ŝi ekpensis el tio pri la kortuŝaj agadoj, kiujn ŝi vidis en ĉiutaga laborado ĉe veteranaj paŝtistoj, kiuj plenkore bredas militajn ĉevalojn por la revolucio, kaj emociiĝis ĝis larmo. Foje la paŝtisto kamarado Uliĝi deĵoris nokte kun la knabinoj. Post la deĵoro en la sekvinta mateno, Gin Anŝun sentis doloron tra la tuta korpo kaj revenis al loĝejo por ripozi tuj post transdono de la grego. Sed, aŭdinte ke la bredejo perdis ĉevalon, kamarado Uliĝi tuj rajdis por ĝin serĉi, malgraŭ la laciĝo dum la nokto, kaj eĉ ne aŭdis ke liaj familianoj vokis lin al manĝo. Kamarado Uliĝi rajdis dum tuta tagnokto sen trinko kaj manĝo kaj fine trovis la perditan ĉevalon. La intima instruo de Prezidanto Maŭ kaj la kortuŝa agado de paŝtistoj helpis al malgranda Gin trovi sian mankon kaj ĝustan direkton. Ŝi profunde ekkonis ke la laborista klaso estas plej fidela al Prezidanto Maŭ,

plej bone studas Maŭzedongpenon kaj aplikas ĝin plej vive. Kvankam iliaj vestoj estas makulitaj per graso kaj iliaj vizaĝoj surhavas flavan polvon, tamen ilia animo estas plej pura. De tiam ŝi decidis sincere akcepti reedukon de la laborista klaso kaj ĝisfunde reformi sian mondkoncepton. Kiam okazis kunsido en loĝejo de paŝtistoj, ŝi malkaŝis unue sian timon al malpureco, kaj sidis inter la paŝtistoj por peti ties helpojn en batalo kontraŭ siaj egoismaj ideoj. En transportado de tritikaj pajloj, ŝi forĵetis sian bluzon kaj laboris kune kun aliaj sen timo al flava polvo kaj pajleroj. Post kelka tempo, la vizaĝo de malgranda Gin fariĝis sunbruna kaj aperis kaloj sur ŝiaj manoj. Kaj la paŝtistoj ekvolontis rilati kun ŝi intime. Ili laŭdis: “La koro de la knabino malgranda Gin kuniĝas nun kun la nia.” Sed ŝi respondis: “Ne, ne! Restas ankoraŭ por mi longa distanco. Mi por ĉiam akceptos reedukon de la laborista klaso, ĝisfunde reformos mian mondkoncepton kaj dum la tuta vivo iros la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj!”

Kiam la grupestro Niu Enhuj venis al la stepo kaj vidis la kalvajn montojn kaj senfinan dezertan stepon, malvarmiĝis al ŝi duono de la koro kaj en certa tempo ŝi ne povis volonte labori en la ĉevalbredejo. Veteranaj paŝtistoj studis verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun ŝi lige kun ŝiaj realaj pensoj kaj rakontis al ŝi historiojn plenajn de amaroj kaj suferoj de paŝtistoj en la malnova socio por iom post iom ŝin edifi. Kaj krome ili senĉese kritikis kun ŝi la teoriojn “viziti lernejon por fariĝi estro” kaj “iri al kamparo por orumi sin” disvastigitajn de Liu Ŝaŭki, tiel ke rapide leviĝis ŝia klasa konscio kaj konscio pri batalo inter la du linioj, kaj ŝi decidis enradikiĝi sur la stepo dum la tuta vivo. De tiam ŝi ellitiĝas ĉiumatene frue je duono post la 5-a por purigi la stalojn kaj ĉirkaŭaĵon kaj alporti furaĝon. Post deĵoro, kiam la aliaj iras ripozi, ŝi ĉiam ankoraŭ ordigas objektojn, kontrolas selojn kaj enbuŝaĵojn de la grupanoj, kaj tuj riparis la difektitajn. De post sia alveno al la bredejo, tiel en lernado kiel en paŝtado, ŝi neniam malĉeestis eĉ unu fojon kaj ĉiam laboris konsciencie kaj solide. Oni nomas ŝin “bona konsciencia grupestro”.

Sub la brilo de la granda Maŭzedongpeno, ĉiuj membroj de la dekknabina paŝtgrupo rapide kreskas sur la vojo de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, same kiel grupestroj Niu Enhuj kaj Gin Anŝun! Maljunaj paŝtistoj ĝoje laŭdis: “Tiu dek knabinoj havas ruĝan penson kaj grandan laborfervoron kaj progresas rapide. Ili estas bonaj filinoj de ni laborista klaso!”

# Reedukis Min la Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj

ĈEN HUJMING

**M**I estis studentino elkulturita de malnova arta kolegio. Dum longa tempo sub la venena influo de la reviziisma eduka linio, mi apartiĝis de la proletara politiko, de la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj kaj de la produkta laboro. Mi tutanime lernis ludi biron (ĉina kordinstrumento kun kvar kordoj) kaj aspiris fariĝi fama majstro de bivo.

Aŭtune de 1968, kiam mi finis mian studon en la arta kolegio, Prezidanto Maŭ donis grandan alvokon, ke intelektuloj devas akcepti reedukon de la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj. La gvida instanco decidis ke mi ricevu hardon en fizika laboro en agrikultivejo de iu trupo de la liberiga armeo.

En la unua tago, mi ne povis distingi herbojn disde rizplantidoj dum sarkado. Mi ekkonsciis, kiom profunde venenis min la reviziisma eduka linio.

Postnelonge, nia agrikultivejo estis atakata de tajfuno kaj la mardigo estis minacata. Komandantoj kaj batalantoj de PLA sin pafis al la marbordo por plifortikigi la digon kontraŭ la ŝtormo. Kiam la ŝtormo atakis niajn kazernojn, komandantoj kaj batalantoj surgrimpis la kazernejn riskante sian vivon. Sed mi ne kuraĝis tion fari, ĉar mi timis ke miaj brakoj eble rompiĝos okaze de disfalo de la domo, kaj ke tiam ne eblus al mi plu ludi biron.

Post la tajfuno, kun la supre dirita problemo, mi fojrefoje studis la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ kaj ekkomprenis, ke la komandantoj kaj batalantoj de PLA armis sian kapon per la "tri popularaj artikoloj" kaj tiel fariĝis homoj plej kuraĝaj. Samtempe mi ekkonsciis, kiom profunde enradikiĝis la burĝara egoismo en mia animo!

Prenante la "tri popularajn artikolojn" kiel armilon, mi akre kritikis "vivkonservan filozofion"

de la granda renegato Liu Ŝaŭki, forte batalis kontraŭ mia burĝara mondkoncepto kaj la egoismo en mia animo. Poste mi partoprenis konstruon de mardigo. Mi pensis en mi: Tio estas ne nur problemo de persistado en fizika laboro, sed ankaŭ problemo de strikta sekvado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj persistado en batalo kontraŭ la burĝaraj pensoj en mia cerbo. Tiel konsiderante, mi senhezite ĵetis min en la furioze ondantan maron. Miaj piedoj estis vunditaj de konkoj, kaj en la marakvo, la vundoj forte doloris al mi. Tamen, mi persiste laboris ĝis la fino.

Ĝuste en tiu tempo, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis plej novan instrukcion: "El la lernantoj kulturitaj de la malnovaj lernejoj, la pliparto aŭ plejparto povas sin kombini kun la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj, kaj iuj eĉ ion atingis en inventado kaj kreado, sed ili devas esti reedukataj de la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj sub la gvido de ĝusta linio por ĝisfunde ŝanĝi sian malnovan ideologion. Tiaj intelektuloj estas bonvenaj al la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj." La instrukcio de Prezidanto Maŭ plifirmigis mian decidon akcepti reedukon de la laboristoj, kampanoj kaj soldatoj.

En mia kazo, "ĝisfunde ŝanĝi sian malnovan ideologion" signifas unue venki mian penson pri "famiĝo kaj specialistiĝo", la venenan influon de la reviziisma eduka linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki sur mi.

Dum sarkado, necesis al mi enigi miajn fingrojn en teron por elradiki herbon. En tia tempo, mia individuisma penso pri famiĝo kaj specialistiĝo revigliĝis: Kiel mi povos ludi biron en la estonteco, se rompiĝos al mi la longaj ungoj, kiujn mi multjare flegis por ludi biron? Pro longtempa sarko miaj fingroj eble fariĝos rigidaj, kiel mi tiam povos ludi muzikilon?



La politika direktanto travidis mian penson kaj studis kune kun mi la “tri popularajn artikolojn”. Li ankaŭ instigis min rememori mian familian historion plenan de amaraj travivaĵoj. En la malnova socio mia patro laboris por kapitalistoj. La ok homoj de mia familio vivis mizere. Pro tro peza laboro mia patrino malsaniĝis kaj mortis pro manko de mono por peti kuracon. Estas Prezidanto Maŭ, kiu savis mian familion kaj ebligas al ĝi nun vivi feliĉe. Mi demandis min: Mi estas filino de laboranta popolo kaj devas varme ami fizikan laboron. Kial tamen mi malestimas laborantan popolon kaj ne ŝatas fizikan laboron, post kiam mi vizitis lernejon? Kial mi tutanime ĉasas famiĝon kaj specialistiĝon? Mi sentis ke mi estas tro multe venenita de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio de Liu Ŝaŭki. Tio plifortigis mian malamon kontraŭ la reviziisma eduka linio. Mi fortondis miajn longajn ungojn kaj partoprenis sarkadon kun gaja humoro.

Prezidanto Maŭ diris: “Se la intelektuloj deziras sin kombini kun la amasoj kaj servi al la amasoj, necesas al ili procedo de reciproka konado kun la lastaj. En tiu procedo eble kaj eĉ certe okazos multaj suferoj kaj konfliktoj, tamen, ilia deziro estos efektivigita, nur se ili havas decidemon.”

Laŭ la brila instruo de Prezidanto Maŭ mi batalis kontraŭ mia egoismo kaj kritikis revizi-

ismon, batalis intense kontraŭ la burĝara penso en mia animo per la granda Maŭzedongpenso. Tiamaniere, mi gajnis novan venkon en ideologia remuldo en la liberiga armeo — la granda lernejo de Maŭzedongpenso.

En la printempo de la kuranta jaro, la gvida instanco sendis min al grupo de aktivuloj en viva studo kaj viva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ de PLA. La grupo estis organizita por propagandi ilian sperton en studo. Kiam mi vivis kune kun tiuj bravaj komandantoj kaj batalantoj de PLA, mi multon lernis de ili. Inter ili troviĝis rota politika direktanto, kiu iam riskante sian vivon ĵetis sin sur tuj eksplodontan grenadon por protekti la ĉirkaŭajn kamaradojn. Pro tio li perdis la dekstran brakon. Aŭdinte pri lia heroo ago, mi rememoris, kiel mi iam timis vundiĝon de miaj fingroj kaj rompiĝon de miaj brakoj, mi sentis honton. Same kiel mi, tiu kamarado de PLA havas paron da manoj. Sed, sub la brila lumo de Maŭzedongpenso, li uzis siajn manojn por krei emocian meriton, dum mi provis uzi diversajn metodojn por protekti mian malbelan animon de burĝara individuismo de famiĝo kaj specialistiĝo. Nun mi vere sentas, ke necesas al intelektuloj profundiĝi inter la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn por fariĝi iliaj lernantoj kaj modeste akcepti ilian reedukon, ke nur tiamaniere ili povos ĝisfunde remuldi sian mondkoncepton.



*Ĉen Hujming (fronte) intense laboras kune kun batalantoj.*



*Ĉen Hujming ludas biron dum laborpaŭzo por kunlaborantoj prikantante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.*

Dank' al la fizika laboro de ok monatoj kaj reeduko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, mi akiris novan vivon ne nur en la penso sed ankaŭ en la arto.

Nelonge post mia alveno al la trupo, mi komponis kanton. Kiam mi kantis ĝin por la batalantoj, ili diris ke ĝia melodio estas tro mola kaj mankas al ĝi proletara sento kaj batala spirito. Tiam, la direktanto pacience helpis min proponante ke mi serĉu kialon de la malsukceso en miaj klasaj starpunktoj kaj sentoj. Li helpis min studi la instruojn de Prezidanto Maŭ: **“Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.”** **“Se niaj literaturaj kaj artaj laborantoj el intelektularo volas, ke iliaj verkoj estu varme akceptataj de la popolamasoj, ili devas ŝanĝi kaj remuldi siajn pensojn kaj sentojn.”** Mi rememoris, kiel la burĝaraj akademianoj **“aŭtoritatuloj”** en la kolegio malpermesis al ni studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj admonis min tutage ekzerci biron en fermita kabineto. Ili volis kulturi min per sento de feŭdismo, kapitalismo kaj reviziismo. Sekve, se mi ne ĝisfunde remuldas mian mondkoncepton, kiel mi povas verki kanton bonvenan al la laboristoj, kamparanoj

kaj soldatoj? Nun mi ekkomprenis, ke la kritiko de la batalantoj estas tute prava. La laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas miaj plej bonaj instruistoj. En mia kontakto kun ili, mi ofte ricevis edukon el iliaj sennombraj heroaj agoj. Naskiĝis al mi urĝa bezono muzike priskribi kaj prikanti tiujn heroojn.

En iu aparte forta tajfuno en 1968, mi vidis, kiel la komandantoj kaj batalantoj de PLA, spite al la ŝtormo kaj furiozaj ondoj, riskis sian vivon por protekti vivon kaj posedaĵon de la popolo. Tiu sceno donis al mi tre profundan edukon. Mi estis tre emociita kaj verkis malgrandan operon prenante ĝin kiel la temon. Dum mia fizika laboro mi verkis pli ol 20 kantojn kaj faris pli ol 10 prezentadojn, ili ĉiuj trovis bonvenigon ĉe la batalantoj. Kamaradoj diris: **“La sento de nia bivisto ŝanĝiĝis, tial ankaŭ ŝia muziko ŝanĝiĝis.”**

La direkto montrita de Prezidanto Maŭ al intelektuloj sin kombini kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estas la unika ĝusta direkto por la junulara movado. Nur irante tiun vojon akcepti reedukon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj komandi la animon per Maŭzedong-penso, mi povas verki muzikaĵojn ŝatatajn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.





# Dong Cunĵuj Sinofere

## Eksplodigis Fortikaĵon

**E**N 1948, la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kun nevenkebla forto, grandnombre ekstermis kuomintangajn banditajn trupojn kaj liberigis urbojn kaj vilaĝojn unu post alia. En majo iu trupo de nia armeo proksimiĝis al Longhua-gubernio de Hebej-provinco kaj baldaŭ komencos la batalon por liberigi Longhua.

Subplotonestro el la nomita trupo Dong Cunĵuj sin kaŝis kun dinamito sub la brako en fronta tranĉeo, por atendi la ordonon. Lia tasko estis gvidi kelkajn batalantojn forigi la ĉirkaŭajn militkonstruaĵojn de la malamikoj.

Atak-signalo leviĝis en la ĉielon. La batalo por liberigi Longhua komenciĝis. Post momento la urbo jam fariĝis fajra maro. Ŝirmate de nia intensa pafado Dong Cunĵuj gvidis kelkajn batalantojn elstirmi antaŭen: Li fulme kaj zigzage antaŭenkuregis kun klinita korpo kaj rapide proksimiĝis al la malamikoj. Li detruis subteran fortikaĵon de la malamikoj per miriga sagaco kaj kuraĝo. Post tio, li tuj subbrakigis alian pakon da dinamito kaj sin ĵetis al alia subtera fortikaĵo, kaj tiu ĉi fortikaĵo estis rapide detruita. La aliaj batalantoj ankaŭ detruis du subterajn fortikaĵojn de la malamikoj, tiel ke ili garantiis la venkon de la batalo ĉe periferio. La teruritaj malamikoj konfuzite retiriĝis. Mezlernejo Longhua, la sidejo de la malamika komando, prezentigis antaŭ ni. Niaj

batalantoj tuj sin ĵetis antaŭen, sed en tiu tempo la malamikoj blokadis la vojon per ses mitraloj. Tiu neatendita fajrforto de la malamikoj devigis niajn batalantojn sin kaŝi post iu malgranda monteto kaj ne povi levi sian kapon.

La ses mitraloj de la malamikoj krakadis sur ponto situanta super la seka rivero ekster la mezlernejo. Ambaŭflanke de la ponto estis muroj kaj sur ĝi estis ŝirmilo kaj tiel ĝi formis tre solidan fortikaĵon. Se ĝi ne estus forigita, estus neeble proksimiĝi al la mezlernejo.

Dong Cunĵuj kaj lia kunbatalanto Ĝi Ŝunĵi akceptis la taskon ebenigi tiun solidan fortikaĵon. Sub la ŝirmo de pafado fare de aliaj kamaradoj ili antaŭen rampis kaj ruliĝis jen maldekstren jen dekstren, kaj baldaŭ atingis la lokon 50 metrojn for de la fortikaĵo. En tiu momento la piedo de Dong Cunĵuj estis trafita de kuglo.

La fervola Dong Cunĵuj tute ne prizorgis la akran doloron de la vundita piedo, sed nur pensis, kiel li povas proksimiĝi al la malamika fortikaĵo.

Dong Cunĵuj bone sciis, ke li ne povos plenumi la taskon asigantan de la Partio, se li faros nur unu senatentan paŝon. Simpla sturmo certe ne sukcesos, tial saĝeco necesas. Dong Cunĵuj faris geston al Ĝi Ŝunĵi kaj la lasta tuj komprenis lian intencon kaj sinsekve

elĵetis kelkajn grenadojn al la fortikaĵo. La grenadoj eksplodis antaŭ ĝi. La malamikoj konsterniĝis kaj ĉesis pafadi. En palpebruma momento Dong Cunĵuj tutforte kuris al la fortikaĵo kaj ensaltis la riveron sub la ŝirmo de la nigra fumo. Ankaŭ Ĝi Ŝunĵi ensaltis tranĉeon antaŭ la rivero.

La ses mitraloj denove ekmuĝis furioze kaj blokadis la vastan areon antaŭ la pozicio.

Dong Cunĵuj rampis sub la ponton. Ĝi altas je pli ol homstature. Li ne havis apogilon por meti dinamiton, nek povis trovi bastonon en la rivero. Dong Cunĵuj tiam povis nur meti la eksplodaĵon sur la pont-randon, sed ĉiufoje ĝi defalis. Se oni metus ĝin sur la riverfundon, ĝi ne povus ruinigi la fortikaĵon. Li tiel maltrankviliĝis, kvazaŭ li estus ĉirkaŭata de flamoj.

Brilis la okuloj de Dong Cunĵuj kaj lia penso ondis en la cerbo. Memorante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "Kie estas lukto, tie estas vivofero, kaj mortoj de homoj okazas konstante. Sed, pensante pri la interesoj de la popolo kaj pri la suferoj de la plejparto de la popolo, ni trovas, ke ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo", li kvazaŭ vidus, ke kunbatalantoj barataj de la fajra forto de la fortikaĵo atendas lian sukceson; ankaŭ la popolo atendas tion. Li klare sciis, ke ĉiu minuto de lia prokrasto kaŭzos pli da mortoj kaj vundoj al la kunbatalantoj.

# 国庆节 Guóqìng Jié

## Nacia Festo

TRADUKO

Nacia Festo

一九六九年十月一日，  
Yī jiǔ liù jiǔ nián shí yuè yī rì,  
Unu naŭ ses naŭ(a) jaro dek(a) monato unu(a) tago

是中华人民共和国成立二十  
shì Zhōnghuá Rénmín Gònghéguó chénglì èrshí  
estas Ĉina Popola Respubliko fondiĝo dudek

周年紀念日。全国人民欢欣  
zhōunián jìniànrì. Quán guó rénmín huānxīn  
plenjaro(a) memortago. Tut-landa popolo ĝoje

鼓午，热烈庆祝这个盛大的  
gǔwǔ, rèliè qìngzhù zhègè shèngdàde  
entuziasmiĝas, varme celebras ĉi tiun grandiozan

节日  
jieri.  
festtagon.

La 1-a de oktobro de 1969 estas la dudeka datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. La popolo de la tuta lando ĝoje entuziasmiĝas kaj varme celebras ĉi tiun grandiozan festtagon.

KLARIGOJ

1. Por esprimi daton la ĉina lingvo diras unue la jaron, due la monaton kaj trie la tagon, en ordo mala al tiu en Esperanto.

2. Por esprimi la rilaton de dependeco inter tago, monato kaj jaro, oni uzas en Esperanto prepozicion, kiu en simpligita formo estas ellasita kaj subkomprenata, kaj tial rezultas ke la tago antaŭas la monaton kaj la monato antaŭas la jaron. Dume en la ĉina lingvo oni ne uzas prepozicion kaj la rilaton de dependeco difinas la vortordo.

Dong Cunĵuj iris per grandaj paŝoj sub la ponton kun elstara brusto kaj levita kapo kaj senhezite levis la dinamiton supren per la maldekstra mano kaj apogis ĝin al la ponto. Rigardante Ĝi Ŝunji per brilaj kaj firmaj okuloj, li diris: "Se mi ne sukcesos ĝin ruinigi, vi daŭrigu!"

Dong Cunĵuj forte tiris meĉon de la eksplodaĵo per la dekstra mano. La meĉo ekbrulis kaj glim-

brilis. La fajreroj rapide proksimiĝis al la eksplodaĵo. Dong Cunĵuj trovis, ke la meĉo restas nur unu colon longa. Li per tuta forto kriis: "Kamaradoj, por la venko, antaŭen!" Kun ekfulmo aŭdiĝis terskua tondro — la fortikaĵo rui- niĝis.

La tondra bruoj estas ja ordono. La batalantoj salte levis sin kaj brave sturmis al la malamikoj tra la fumo.

Leviĝis ruĝa flago super Mezlernejo Longhua. La restantaj malamikoj kapitulacis kaj liberiĝis Longhua-gubernio!

La granda heroo kaj eminenta filo de la ĉina popolo — la deknaŭjara Dong Cunĵuj oferis sian junan vivon por la liberiga afero de la ĉina popolo. Lia nobla kvalito timi nek penadon nek morton estas ekzemplo por la ĉina popolo kaj lia herooa figuro por ĉiam vivos en la koro de la popolo.





## Letero de Japana

Amiko N. H.

Inaŭguriĝis la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio en la brilanta triumfo de la Granda Proleta Kultura Revolucio!

La Kongreso fariĝos poreterna monumento por la historio de la homaro!

La sepcent milionoj da ĉina popolo armita per Maŭzedongpenso tagon post tago daŭrigas progresadon kiel la citadelo de la mond-revolucio!

Kamaradoj en Azio kaj Afriko!  
Fratoj kaj fratinoj batalantaj en Vjetnamio!

Fratoj kaj fratinoj en Arabio!

Fratoj kaj fratinoj en Ĉeĥoslovakio, Francio kaj Usono!

Nu, etendu manojn, kaj kune marŝu brako en brako!

Nun baraktas la forpelota imperiismo kaj la malbenita renegata kliko de soveta moderna reviziismo!

La naciperfidanta, reakcia Sato-registaro volonte prenas la rolon de lancisto por la imperiist-agresanto kaj la renegata kliko de reviziismo.

Ĝi intencas faligi la japanan popolon denove en la militon, en la detruon kaj en profundan mizeron.

Nun la japana popolo devas firme unuiĝi sub la Standardo de Maŭzedongpenso!

La japana popolo jam ne permesas ĉiun intrigon, ĉiun provokon kaj ĉiun disigon fare de la malamiko!

Firme tenante en nia brusto tiun ĉi vorton de K-do Maŭ Zedong

“UNUIĜO — KRITIKO — UNUIĜO” ni batalante marŝas antaŭen.

Ni plifortigas la unuiĝon kaj ĝin plivastigas.

“UNUIĜO—KRITIKO—UNUIĜO” — Ho, estas tiu ĉi granda vorto, kiun K-do Maŭ Zedong instruis al ni kaj la japana popolo lernakiris per sia sperto tra la malfacila batalo.

Ju pli estas alpremitaj la imperiistoj kaj naciperfiduloj, des pli ili krueliĝas. Tiel Hitler estis, tiel Ngo Dinh Diem estis, kaj tiel estas ĉiuj aliaj.

Sed ĉiulandaj popoloj nepre frakasos ĉiun ilian intrigon kaj subpremon.

Gloro apartenas al la Komunista Partio de Ĉinio, hardita tra la cent militoj, armita per Maŭzedongpenso!

Gloro apartenas al la batalanta 700,000,000 ĉina popolo!

Gloro apartenas al la batalanta albana popolo!

Gloro apartenas al la batalanta vjetnama popolo!

La Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, gvidata de K-do Maŭ Zedong, mem ja fariĝos la ora monumento faranta novan epokon en la historio de la homaro!

La Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio estas ja ruĝa, ruĝa kaj ruĝega suno, kiu montras la irvojon al ĉiulandaj batalantaj popoloj!

Vivu la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, kiel la senmorta ora monumento de la historio de la homaro!

Vivu la triumfo de la Granda Proleta Kultura Revolucio!

Vivu la poreterne neŝanĝebla batalanta amikeco kaj la unuiĝo inter la japana kaj ĉina popoloj!

Vivu la nevenkebla Maŭzedongpenso!

Longan, longan, longan vivon al K-do Maŭ Zedong!

(Trad. M.S.)

## Letero de Angla Leganto D. F. G.

Kara amiko,

Mi multe dankas vin por la pluraj ekzempleroj de la libreto “For la Novajn Carojn”. Mi montris ilin al mia Esperanta grupo, kiu treege interesiĝis pri ili. Ni trovis la skizan mapon precipe utila, ĉar en neniu angla ĵurnalo oni presis tiel detalan mapon.

La klarigon de la temoj de la Ĉina-rusa traktato de 1860, miaj historiaj studentoj trovis interesege. Ili konsultis la historiajn lernolibrojn kaj baldaŭ trovis ke ĉi tio estas, fakte, vera. Unu el ili havis la anglalingvan gazeton “The Moscow News”, kiu donis la rusan priskribon pri la afero de Ĝenbaŭ-insulo. Nature, ĝi ne menciis la traktaton de 1860 kaj pro tio miaj studentoj rapide konstatis la ĝustecon de la ĉina sinteno.

Denove mi volas gratuli vin pri bonkvalito de “El Popola Ĉinio”! Nuntempe, ŝajnas al mi, estas multe pli da koloraj bildoj ol antaŭe. La nuna eldono ĉarme montras kvar infanojn sanajn kaj feliĉajn, kiuj diligente legas la mondkonatan ruĝan libreton. Tia feliĉo ja demonstras, kiel prosperema estas la granda ĉina popolo sub la saĝa gvidado de via Prezidanto Maŭ Zedong.

Mi volas gratuli vin ankaŭ pro la novaj artikoloj, kiuj celas instrui al ni la Han-an lingvon. Dum multaj jaroj mi volis legi la poemojn de Prezidanto Maŭ kiuj aperas sur nuntempaj ĉinaj poŝtmarkoj: espereble en la proksima estonteco mi povos fari tion.


Mi sendas al vi tutkorajn salutojn kaj gratulas vin pro via sukcesa laboro por kunligi la popolojn de niaj malproksimaj landoj.

# La Albana Popolo

## Antaŭenmarŝas sur




*La kadro (maldekstre) de la Ŝpinteksa Fabriko "Stalin" en Tirano, partoprenas laboron kaj lernas produktan teknikon de la laboristino en la laborejo.*



*Nova granda hidroelektra centralo de Albanio en intensa konstruado*


*Dank' al eduka revolucio, la juna generacio de la albana popolo sane kreskas.*

*Elstarajn sukcesojn atingis Albanio en agrikultura produktado. La tritiko de la kooperativo "Maŭ Zedong" estas rikoltata de kombajno.*







# Revoluciiga Vojo



*Albanaj kuracaj laborantoj konstante iras al kamparo por doni medicinajn helpojn al la kamparanaj amasoj. La bildo montras, ke instruistoj de la medicina fakultato de iu tirana universitato kuracas kamparanan pacienton en Shkodër.*



*Batalantoj de la Albana Popola Armeo ekzercas sin pri pafado kun profunda malamo kontraŭ la malamiko por esti pretaj ĉiumomente bati invadantojn.*



# La Novaj Caroĵ Turnis Sovetunion Denove en Malliberejon de la Diversaj Nacioj

**S**OVETUNIO estas lando kun multaj nacioj. En Sovetunio nun loĝas pli ol cent nacioj. La rusoj okupas 42 procentojn de ĝia tuta loĝantaro kaj la naciminitatoj okupas 58 procentojn. La cara Rusio aneksis per armitaj fortoj ĉiujn regionojn de multaj naciminitatoj nun apartenantajn al Sovetunio kaj kruele prirabis kaj barbaramente subpremis ilin. La granda instruanto de revolucio Lenin iam montris, ke la cara Rusio turnis Kaŭkazon, Centran Azion, Siberion k. a. en siajn koloniojn, ke la cara Rusio estas “malliberejo de la diversaj nacioj”.

En 1917, sub la gvido de Lenin, la diversaj nacioj de Rusio frakasis la “malliberejon de la diversaj nacioj”, fondis novan sovetan ŝtaton per memvola alianciĝo kaj efektivigis egalrajtecon inter la nacioj. Sed post kiam la renegata kliko de Sovetunio uzurpis la regpotencon, ĝi kruele ekspluatas enlande la naciminitatojn kaj denove ĵetis ilin en “malliberejon” tute senluman.

## PROPAGANDI PRI “PRAVECO DE SUBPREMADO” KAJ “MERITO DE KOLONIADO”

Pro bezono de sia praktiko de subpremado super la naciminitatoj, de multaj jaroj la sovetunia reviziisma renegata kliko publike laŭdas kaj prikantas la carojn, senĉese ripetadas la absurdajn de la malnovaj reviziistoj de la Dua Internacio, ke “koloniado estas merito”.

Multaj naciminitatoj en la nuna Sovetunio estis kruele konkeritaj per armitaj fortoj kaj sanga masakro fare de caroj por akiri bazojn de materialoj kaj merkaton de industriaĵoj en leviĝa periodo de la rusa kapitalismo. Ĝuste kiel Lenin montris, tiuj nacioj fariĝis siatempe “**nacioj en sanga marĉo**”. La sovetuniaj reviziistoj-renegatoj ĉiamaniere klopodas revizii la historion. Ili absurde diris, ke tiuj nacioj “volonte aliĝis” al cara Rusio. Kia senhonteco! Kaj Lenin montris krome: “La

cara registaro kaj bienuloj kaj kapitalistoj sufokis multajn naciojn en la limregiono.” La sovetuniaj reviziismaj renegatoj tamen diris senhonte, ke la agreso kaj okupo fare de cara Rusio al “la teritorio nun loĝata de indiĝenaj nacioj” “konformis al la intereso kaj de Rusio kaj de la lokaj nacioj”, “havis gravan signifon por progreso”. La naŭza beligo al la caroj fare de la sovetuniaj reviziismaj renegatoj fidele bildigis la abomenindan vizaĝon de obeemaj posteuloj de caroj kaj lojalaj heredantoj de la robo de koloniisma regado de la caroj.

Lenin ĉiam opiniis, ke “**neniu ajn nacio devas havi ian ajn privilegion kaj ĉiuj nacioj devas esti tute egalrajtaj**”, kaj li multfoje refutis la absurdan aserton de grandrusa ŝovinismo, ke “ĉiuj nacioj devas obei la gvidon de la grandrusoj”. Tamen, la sovetuniaj reviziismaj renegatoj korve krias, ke la naciminitatoj en Sovetunio estu “fidelaj filoj de la granda Rusio”. Ili ĉiuj devas esti “gvidataj” de la rusa nacio. Kaj ĉi tiuj nacioj nepre devas “energie kulturi” “amon kaj respekton al la granda rusa nacio”. La senco en tio estas, ke ĉiuj naciminitatoj obeeme akceptu la reakcian regadon de la sovetunia reviziisma renegata kliko, kiu freneze antaŭenpuŝas grandrusan ŝovinismon. Tiu absurda aserto de la sovetunia reviziisma renegata kliko ja neniom diferencas de la faŝisma teorio distrumpetita de Hitler, ke la ĝermana gento estas eminenta dum la ceteraj nacioj estas malsuperaj kaj devas esti regataj de la ĝermana gento.

## KRUELA EKSPLUATADO

Flirtigante la flagon de “fakiĝo en ekonomio” kaj “labordivido” el sia bezono por kontroli kaj ekspluati la naciminitatojn, la sovetunia reviziisma renegata kliko limigas disvolvdon de prilaboraj industrioj kaj unuflankece disvolvas produkton de agrikulturaĵoj kaj krudaj materialoj en la regionoj de naciminitatoj kaj unuflankecigis kaj kripligis la ekonomion en tiuj regionoj.



Ili turnis la kvar uniajn respublikojn en Centra Azio Uzbekio, Turkmenio, Taĝikio kaj Kirgizio en bazon de kotona produkto. En tiu regiono koncentre produktiĝas 93 procentoj de la sovetunia kotono. Kaj tiuj novaj caroj faris Kazaĥion en sian provizan bazon de greno kaj lano, faris Ukrainion en provizan bazon de karbo, fera erco kaj sukero, faris la respublikojn apud Balta Maro en paŝtejojn viandon kaj lakton provizantajn kaj faris Kartvelion kaj Moldavion en teĝardenon kaj fruktan kaj legoman ĝardenon.

En tiuj regionoj de naciminoritatoj ne estas aŭ estas nur tre malmulte da koncerna prilabora industrio kaj industriaj branĉoj necesaj por disvolvo de la ekonomio de respektivaj regionoj. En Uzbekio, kie produktiĝas 68 procentoj de la tuta produktkvanto de kotono de la tuta lando, la teksa industrio estas tre malforta kaj la ekipaĵoj estas tre kadukaj. Nun ĝia ŝtofa produktkvanto estas nur ĉirkaŭ 3 procentoj de tiu de Sovetunio. Uzbekio devas enporti ĉiujare ĉirkaŭ 150,000,000 metrojn da ŝtofo. Kaj tiu tendenco estas nun disvolviĝanta. En Moldavio, kiu bezonas tre grandan kvanton da kemia sterko, tute ne ekzistas kemisterka industrio.

Utiligante la unuflankecan kaj kriplan disvolviĝon de ekonomio en la naciminoritataj regionoj, la sovetunia reviziisma renegata kliko kruele ekspluatas, de multaj jaroj, la vastan laborantan popolon de la naciminoritatoj, per tiaj metodoj kiaj perforta aĉeto de agrikulturaj produktaĵoj kaj krudaj materialoj en grandaj kvantoj je tre malalta prezo kaj vendo de industriaj produktaĵoj je alta prezo. Eĉ la ĉefo de sovetuniaj reviziistoj Breĵnev devis konfesi, ke “en serio da lokoj, la pagoj por aĉetitaj grenoj ne povas rekompenci ties produktkostojn”. Por plenumi la aĉetan taskon de la sovetuniaj reviziistoj, Kazaĥio perforte foraĉetis eĉ parton de la grenoj kiujn la kamparanoj rezervis por manĝo kaj semado; kaj en Belorusio la kamparanoj “povis nur buĉi junajn brutojn por vendi viandon”.

Feraj faktoj pravas, ke Breĵnev k. s. estas la plej grandaj ekspluatantoj de la popolanoj de la sovetuniaj naciminoritatoj.

## **MALHUMANA SANGA SUBPREMO**

La celo de la sovetunia reviziismo en ĝia freneza antaŭenpuŝado de la reakcia politiko de grandrusa ŝovinismo estas kaŭzi konfliktojn kaj malamon inter la nacioj kaj detru la unuiĝon de diversnaciaj popoloj por protekti sian reakcian regadon.

Hodiaŭ en Sovetunio la lingvo de la naciminoritatoj suferas diversajn diskriminaciojn kaj barbaran subpremon. En Ukrainio, iuj petis, ke la ukraina lingvo estu difinita kiel oficiala lingvo en la Ukraina Respubliko, kaj ili estis kondamnitaj al morto. En okcidenta parto de Ukrainio, iuj intelektuloj nur petis la sovetunian reviziisman renegatan klikon “iom pli alte taksi la ukrainajn lingvon kaj kulturon” kaj estis kulpigitaj pri “distorda ekspliko de la ukraina historio”, kaj pli ol 70 el ili estis arestitaj samtempe. La aresta tajdo envolvis 5-6 urbojn inkluzive de Kievo, Odeso kaj Lvovo.

Kaj pretekstante per “netaŭga por la ofico”, “entrepreno de subfosa movado”, “naciismo” kaj similaj, la sovetunia reviziisma renegata kliko grandnombre ŝanĝis naciminoritatajn kadrojn.

La sovetunia reviziisma renegata kliko starigis en la naciminoritataj regionoj grandajn nombrojn da malliberejoj, juĝejoj, koncentrejoj kaj la t. n. “frenezulejoj”, praktikas faŝisman diktaturon kaj blankan teroron. Laŭ informoj ellasitaj de ĵurnaloj de sovetunia reviziismo, en la regiono Dnepropetrovsk sola de Ukrainio troviĝas dek malliberejoj, en kiuj 50,000 homoj estas enkarcerigitaj, kaj tiu nombro superis tiun dum la cara periodo. En la regiono Vitebsk troviĝas 7 koncentrejoj. En la lastaj jaroj, la sovetunia reviziisma renegata kliko faris grandskalajn arestojn kaj sangajn subpremojn en Kazaĥio, Ukrainio, Kartvelio, Litovio k. a. Sufiĉe granda parto de la homoj nun enkarcerigitaj en la sovetuniaj koncentrejoj estas popolanoj de naciminoritatoj kulpigitaj de la sovetunia reviziismo kiel “burĝaraj naciistoj”.

Lastatempe, ĵurnaloj de sovetunia reviziismo malkaŝis, ke la sovetunia reviziisma renegata kliko plifortigas la spionajn aparatojn kaj organizojn de “politikaj informoj” en la naciminoritataj regionoj de Ukrainio, Uzbekio, Belorusio, Kartvelio, Latvio kaj multaj aŭtonomaj respublikoj de la Rusia Soveta Federacia Socialisma Respubliko.

Kaj la sovetunia reviziisma renegata kliko alprenis diversajn plej barbarajn kaj plej fiajn rimedojn por kruele subpremi naciminoritatajn popolanojn, kiuj levigis ribeli kontraŭ ili. En marto de 1967, la sovetunia reviziisma renegata kliko sendis tankojn kaj kirasaŭtojn al Ĉimkent de Kazaĥio por sange subpremi laboristan klason de tiu urbo. Sovetunia trupo ekpafis ĉeloke, mortigis dekojn da laboristoj, vundis kaj arestis multajn ordinarajn civitanojn. La 21-an de aprilo, 1968, la sovetunia reviziisma renegata kliko sendis grandan nombron

da armeanoj kaj policianoj por subpremi tatarajn loĝantojn. En tiu faŝista perforto, la sovetunia reviziisma renegata kliko eĉ uzis “venenan likvaĵon”, bategis per kluboj tute senarmilajn tatarajn loĝantojn kaj arestis pli ol 300 homojn en unu fojo. En persekutado kaj subpremado al la popolanoj de la sovetuniaj naciminoritatoj, la sovetunia reviziisma renegata kliko multe superis la malnovajn carojn. Feraj faktoj pruvas, ke Breĵnev k. s. estas la plej grandaj subpremantoj de la naciminoritatoj de Sovetunio.

### LA NACIMINORITATAJ POPOLOJ VEKIĜAS TAGON POST TAGO KAJ LEVIĜAS AL BATALO

Kie estas subpremo, tie estas opozicio. La diversaj persekutoj fare de la sovetunia reviziisma renegata kliko al la sovetuniaj naciminoritatoj akcelas la vastajn popolamasojn de la naciminoritatoj vekigi kaj kuraĝe leviĝi por batali kontraŭ la sovetunia reviziisma renegata kliko.

En la lastaj jaroj, en multaj naciminoritataj regionoj de Sovetunio eksplodis fojrefoje amasaj revoluciaj bataloj kontraŭ la nacia subpremado de la sovetunia reviziisma renegata kliko. Kaj tiaj bataloj sekvas unu tuj post alia kiel ondoj en torento senĉesa. En Kartvelio, la naskiĝloko de la granda marksist-leninisto Stalin, granda amasa manifestacio okazis jam en la komenca periodo baldaŭ post kiam la sovetunia reviziisma renegata kliko uzurpis la partian kaj ŝtatan potencojn de Sovetunio, por rebati ĝian maljustan fiagon. Kun flamanta malamo, laboristoj de Ĉimkent de Kazaĥio atakis kaj bruligis la ĝeneralan polican oficejon de la

urbo kaj apudan polican stacion. En la urboj Kievo, Odeso, Ivano-frankovsk k. a. de Ukrainio senescepte okazis manifestacioj por oponi la sovetunian reviziisman renegatan klikon. Ankaŭ en Uzbekio, Azerbajĝano, Litovio, Latvio, Estonio kaj la naciminoritataj regionoj de la Rusia Soveta Federacia Socialisma Respubliko okazis diversformaj amasaj bataloj kontraŭ la subpremado de la sovetunia reviziismo. La batalo de la diversnaciaj popoloj de Sovetunio kontraŭ nacia subpremo estas forte atakantaj la tronon de la sovetuniaj reviziismaj novaj caroj, kies regado jam estas en danĝero de pereco.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“En analizo ĝis la fino, nacia batalo estas problemo de klasbatalo.” “En nacia batalo, klasbatalo aperas en formo de nacia batalo.”** La kontraŭdiroj kaj batalo inter la sovetuniaj naciminoritatoj kaj la sovetunia reviziisma renegata kliko estas nepacigeblaj klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo inter vivo kaj morto. En Sovetunio, tiuj kiuj subpremas kaj ekspluatas la naciminoritatajn popolojn estas nur la sovetunia reviziisma renegata kliko kaj plenmano da burĝaraj privilegiaj elementoj. Kaj la sovetuniaj naciminoritataj popoloj kaj rusa popolo estas senescepte suferantaj de la faŝisma regado de la sovetuniaj reviziistoj. La sovetuniaj naciminoritataj popoloj certe unuiĝos kun la rusa popolo, senĉese plifortigos sian revolucionan batalon kaj renversos la faŝisman regadon de la mortaj malamikoj de la diversaj nacioj de Sovetunio Breĵnev kaj la aliaj novaj caroj, por ke la granda proletara politiko de Lenin pri nacioj denove brilu super la vasta tero de Sovetunio.

## Plena Nudiĝo de la Lupa Naturo de Nixon

ĜI LIU

Nixon estas lupo en ŝafpelto.

La faroj de Nixon post lia ekpotenco klare montris, ke lia slogano de “paco” estas nenio alia ol fumkurteno, per kiu li ŝirmas la spurojn de sia pli freneza ekspansiigo de armeo por milito. Fakte, li iras ankoraŭ la malnovan vojon de agresado kaj ekspansio kiun iris la usona imperiismo.

Nixon estas lojala agento de la monopolaj kapitalistoj de milita industrio de Usono. Frue en la kvindekaj jaroj li jam akiris fifamon kiel militmaniulo pro liaj senskrupulaj kontraŭkomunismaj kaj kontraŭrevoluciaj paroloj kaj senkaŝaj

bruaĉoj pri milito. Sed en la tagoj antaŭ kaj post lia ekpotenco, li abrupte ŝanĝis sian tonon kaj komencis laŭte legi biblion pri “paco”, ĉar la usonaj imperiistoj alfrontas senprecedence seriozan krizon enlande kaj eksterlande, la diversaj reakciaj politikoj de la reganta kliko vekis ĉiam pli grandan malkontenton de la usona popolo, kaj ankaŭ la reganta kliko mem sin trovis en konfuziĝo, tiel ke Nixon estis devigita paroli pri “paco”, “unuiĝo” kaj aliaj similaj belaj vortoj, por “kvietigi” la kontraŭdirojn kaj trompi la popolon.



Sed, estas tro malfacile por Nixon alivesti sin kiel “anĝelon de paco”. Li mem sin nudigis en sia parolado je la 4-a de junio. Li historie bruaĉis, ke la usona imperiismo daŭrigos preni sur sin “devojn” tra la mondo kaj “plenumi” sian “respondecon... al protekto de libereco ekster siaj marbordoj” kaj ke, por tiu ĉi celo, la usonaj “armitaj fortoj devas esti potencaj, pretaj agi en ĉiu momento”.

Fakte, tio estis ne la unua fojo, ke Nixon malkaŝis sian vulpan voston. La buĝeto de li elmetita en la mezo de aprilo por financa jaro 1969-1970 (de la 1-a de julio de 1969 ĝis la 30-a de junio de 1970) multe diris pri tio. En la buĝeto, la milita elspezo multiĝis ĝis 84.2 miliardoj da usonaj dolaroj, tio estas nova rekordo post la Dua Mondmilito. En komparo kun la financa jaro 1969, la milita elspezo por la financa jaro 1970 escepte por la agresa milito kontraŭ Vjetnamio, plimultiĝis je pli ol 4 miliardoj da dolaroj.

Post sia ekpotenco Nixon-registaro tuj organizis specialan grupon por ellabori grandskalan kaj longperiodan planon por armeekspansiigo kaj militpreparo. La grupo estis sub la direktado de vicministro de Nacidefenda Ministerio David Packard, fondinto kaj kompaniano de iu granda milita kompanio en Kalifornio — la Hewlett-Packard-Kompanio de elektrona produkto. Laŭ informo, tiu ĉi grupo lastatempe elmetis al Nixon “esploran raporton” en kiu estas listigitaj kelkaj “elektoj”. La grupo proponas pligrandigi jaran elspezon por strategiaj nukleaj armiloj de 10 miliardoj da dolaroj ĝis 16 miliardoj; kaj plimultiigi jaran elspezon por ordinaraj armiloj de la nunaj 30 miliardoj da dolaroj ĝis 85 miliardoj.

Post sia ekpotenco, por konservi la antaŭlonge bankrotintan nuklean monopolon de Usono kaj Sovetunio kaj daŭre fari nuklean minacon kaj nuklean ĉantaĝon kontraŭ la ĉina popolo kaj diverslandaj popoloj de la mondo en kunago kun la sovetunia reviziismo, Nixon-registaro unuflanke entreprenis starigon de la sistemo kontraŭ “balistika ĵetarmilo” kun lancpinto direktata kontraŭ Ĉinio, aliflanke, ĝi energiĝis sin okupas pri renovigo de nukle-armilaj portiloj: anstataŭigi “Minuteman II”-interkontinentajn ĵetarmilojn per “Minuteman III” kaj ekipi nukleajn submarajn ŝipojn “Polaris” per mezdistancaj balistikaj ĵetarmiloj “Poseidon”. Tiuj du novaj ĵetarmiloj portos MIRV-ojn. Krome, ĝi planas anstataŭigi strategiajn bombaeroplanojn “B-52” per altklasaj strategiaj bombaeroplanoj “B-1A”.

La usona imperiismo intensigas siajn paŝojn en disvolvo de nukleaj armiloj. Usono jam faris 11 subterajn nukleajn provojn ekde la komenco de tiu ĉi jaro kaj planas fari pli grandskalajn subterajn

provojn aŭtune sur la nova provejo Amchitka-insulo de Alaska.

Estas atentinde, ke senskrupule ekspansiigante armeon kaj sin preparante al milito enlande, Nixon-registaro ankaŭ intensigis siajn militajn agresojn al Azio kun lancpinto direktata unue kontraŭ la socialisma Ĉinio.

En senelirejo Nixon insistas pri freneza politiko de armeekspansiigo kaj militpreparo. Tamen tio neniel kvietigos liajn malfacilojn, sed kontraŭe, pli akriĝos la diversajn kontraŭdirojn kaj malfacilojn de la usona imperiismo. La sorto de Nixon certe ne povas esti pli bona, sed pli malbona ol tiu de liaj antaŭuloj.

Tamen, rilate al tia malica ĉefo de la usona imperiismo, bando da renegatoj en Kremlo klopodas el sia tuta koro por lin ŝminki, intencante beligi lin en tiun apartenantan al la “pli modera alo”. Tio donas neniun helpon al Nixon krom pluapaŝe malkovri ilian senhontan fizionomion de renegatoj. La fakto estas, ke la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo ambaŭ alfrontas malfacilojn en- kaj ekster-lande kaj troviĝas en senelirejo, nun intensigas armeekspansiigon kaj militpreparon kaj ĉiam plirapidigas komploton inter si por oponi kontraŭ la ĉina popolo kaj la diverslandaj revoluciaj popoloj de la mondo. Sed, la revoluciaj popoloj de la tuta mondo tenas altan singardemon kontraŭ la senskrupula intenco de la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo fari per milita aventuro barakton en malesperiĝo. Kiel ajn la usona imperiismo kaj la sovetunia reviziismo svingas siajn ungojn, tio neniel savos ilin el la agonio fatalo. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **“Sovetunia reviziismo kaj usona imperiismo faris en koluzio tiom multe da malbonaĵoj kaj hontindaĵoj, ke la tutmondaj revoluciaj popoloj certe ne lasos ilin nepunitaj. La diverslandaj popoloj de la mondo estas leviĝantaj. Kaj la nova historia periodo de opono kontraŭ usona imperiismo kaj sovetunia reviziismo jam komenciĝis.”** Se la revoluciaj popoloj de la tuta mondo unuigis kaj kuraĝos batali, ili certe entombigos plenmanon da malutilaj insektoj — la usonaj imperiistoj kaj la sovetuniaj reviziistoj.

*Parizaj laboristoj kaj studentoj de Francio kolere forbruligas portreton de la dio de epidemio Nixon por forte protesti kontraŭ la intrigado de tiu nova ĉefo de la usona imperiismo en Parizo.*





## LA LAOSAJ PATRIOTAJ ARMITAJ FORTOJ KONKERIS MUONG SOUE

Ekde la 24-a de junio, la laosaj patriotaj armitaj fortoj komencis fortan ofensivon al Muong Soue, grava milita punkto de la malamikoj en la provinco Xieng-Khoung, okupis post 4-taga arda lukto ĝian tutan areon vespere de la 27-a de junio kaj ekstermis pli ol 1000 malamikojn. Tio estas granda venko akirita de la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso post la komenciĝo de la pluvsezona batalo en la jaro 1969.

Muong Soue, kiu situas en la nord-okcidento de la urbo Xieng-Khoung je 58 kilometroj fore, estas grava strategia punkto de la malamikoj en la provinco Xieng-Khoung. De kelkaj jaroj, la malamikoj klopodis per ĉiuj fortoj transformi Muong Soue en bazon por fari "mordetajn" atakojn al la liberigita regiono en Xieng-Khoung. Ili konstruis tie fortikajn militajn konstruaĵojn, aerodromon kaj artileriajn poziciojn kaj starigis garnizonon el ĉefaj fortoj sub la rekta direktado de la usonaj kaj tajlandaj "konsilantoj". La usonaj agresantoj kaj la trupoj de la laosaj dekstruloj ofte lanĉis de tie grandskalajn armitajn atakojn al la liberigita regiono de la provinco Xieng-Khoung kaj faris grandajn krimojn al la tiea popolo.

Kiam la laosaj patriotaj armitaj fortoj komencis la sukcesan atakon kontraŭ Muong Soue, tuj ribelis unu post alia la soldatoj

el la malamika garnizono en Muong Soue, kiuj havas nacian konscion. Sub la duflanka atako fare de la patriotaj armitaj fortoj de ekstere kaj la ribelintaj soldatoj de interne, la grava strategia punkto Muong Soue, kiun la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, la dekstraj trupoj de Laoso zorgeme fortikigis, estis rapide konkerita.

## LA POPOLO DE CHIENGRAI DE TAJLANDO AKIRIS BRILAJN VENKOJN EN SIAJ ARMITAJ BATALOJ

Sub la gvido de la Komunista Partio de Tajlando, en la kuranta jaro, la popolo de Chiengrai en la norda parto de Tajlando akiris brilajn venkojn en sia armita batalado.

En la antaŭa duono de la kuranta jaro, laŭ nekompleta statistiko, la patriotaj armeo kaj popolo de Chiengrai ekstermis ĉirkaŭ 200 armeanojn kaj policianojn de Usono-Thanom-kliko, inkluzive multajn usonajn agresantojn.

Krom tio, ili detruis kaj difektis pli ol 10 diversspecajn aviadilojn de Usono-Thanom-kliko, detruis multajn militajn veturilojn, forigis multajn apogpunktojn de malamikoj kaj militakiris aron da militaj materialoj.

Disvolvante sian peneman kaj obstinan batalspiriton, la popolaj armitaj fortoj de Chiengrai lernas militarton en milito, akumulas sperton kaj senĉese altigas sian militan arton. Pro tio, la nombro de ekstermitaj malamikoj kreskas tagon post tago, kaj ili foje-refoje frakasis la kontraŭrevolucionan militan "ĉirkaŭekstermon" fare de Usono-Thanom-kliko.

La venkoj de la patriotaj armeo kaj popolo de Chiengrai fortege kuraĝigas la armeon

*(Maldekstre) La popolaj armitaj fortoj de Tajlando kuraĝe ekstermas malamikojn kaj akiris venkojn unu post alia. La bildo montras la mizeran aspekton de reakciaj soldatoj de la usona imperiismo kaj Thanom-Praphas-kliko, batitaj de la popolaj armitaj fortoj.*

*(Dekstre) La usona imperiismo kaj Thanom-Praphas-kliko uzas helikopteron por reporti siajn soldatojn kaj policianojn vunditajn kaj mortigitajn de la popolaj armitaj fortoj de Tajlando.*





kaj popolon de la tuta lando. Tio refoje pruvas, ke “ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj.” Usono-Thanom-kliko armita ĝis dentoj estas ankaŭ papera tigo.

La popolo de Tajlando nepre povos venki Usono-Thanom-klikon, se ili nur firme unuiĝas kaj decideme faras armitan batalon sub la gvido de la Komunista Partio de Tajlando.

## DEK MIL TOKIAJ STUDENTOJ OPONAS REAKCIAN LEĜPROJEKTON DE SATO-REGISTARO

En la posttagmezo de 27-a de junio, pli ol dek mil studentoj el ĉirkaŭ 50 universitatoj de Tokio okazigis mitingon en Meizi-parko, Japanio, por forte oponi la reakcian leĝprojekton, proponitan de la reakcia Sato-registaro al la parlamento kaj celantan subpremi studentan movadon. Krome ili decideme esprimis, ke ili batalos ĝis la fino por frakasi la “Sekurecan Traktaton” inter Japanio kaj Usono.

En la kunvenejo flirtis ĉie ruĝaj flagoj kaj regis plene batal-atmosfero. La reakcia Sato-registaro alsendis tri mil armitajn policanojn por sieĝi la kunvenejon kun intrigo subpremi la studentojn. Ne timante perfortaĵon, la progresemaj studentoj persiste okazigis la mitingon. La reprezentantoj de la studentoj el diversaj universitatoj esprimis, ke la batala fajrego de la studentoj ne estos estingita, tute egale, kian ajn reakcian leĝon la reakcia Sato-registaro fabrikos, kaj ke ili pli forte unuiĝos por repreni Okinaŭa kaj frakasi la “Sekurecan Traktaton” inter Japanio kaj Usono per sia batalado.

Post la kunveno, la studentoj faris manifestacion kun levitaj kapoj, laŭte kantante la *Internacion*.

## Novaj Filmoj

La novaĵ-dokumenta filmo *Invadi Ĝenbaŭ-insulon Estas Nepermesate* per vivaj faktoj malkaŝas krimojn de la armitaj provokadoj de la sovetuniaj reviziistoj en la entrudiĝo en Ĝenbaŭ-insulon de nia lando kaj registris batalajn scenojn, en kiuj niaj limgardaj batalantoj severe punis la sovetuniajn reviziismajn agrezantojn kaj venke defendis la sanktan teritorion de nia lando.

La dokumenta filmo *La Ĉeĥoslovaka Popolo Neniam Submetiĝos* vivece spegulas la bravan bataladon de la ĉeĥoslovaka popolo en opono kontraŭ la armita okupado fare de la sovetunia reviziismo.

Tiuj du filmoj ekprezentiĝis en nia ĉefurbo — Pekino kaj aliaj urboj de la tuta lando ekde la 20-a de aŭgusto. Iliajn enhavojn nia gazeto detale raportos al niaj legantoj.

*Spite al la barbara subpremo de la japanaj armitaj policanoj, la progresemaj studentoj kaj urbanoj de Tokio faras barikadon kaj heroe lukta kontraŭ la reakciaj armeanoj kaj policanoj.*



## Sur la kovrilo:

La Popola Maŝinfabrika de Pekino estas fabriko por produkti presmaŝinojn. En la komenco ĝi estis fabriko kunigita el kelkaj malgrandaj fabrikoj kun simplaj kaj malbonaj laborejoj ekipitaj per malmalmodernaj ekipaĵoj kaj povis produkti nur malgrandajn maŝinojn por civila uzo. Sed alte tenante la grandan standardon de Maŭzedongpenso, la revoluciaj laboristoj iras decideme la vojon de “**sinapogo sur propraj fortoj**” kaj nun ĝi jam povas produkti diversajn grandajn presmaŝinojn. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, kunlaborante en triflanka kombiniĝo, la revoluciaj laboristoj, revoluciaj kadroj kaj teknikistoj projektis kaj sukcese provfabrikis duflankan presmaŝinon de progresinta nivelo de la mondo. Jen laboristoj muntas dukoloran presmaŝinon.

## Sur la dorskovrilo:

Ferŝtala bazloko en nokto

# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 10 (135) 1969

## Ĉefa Enhavo

Antaŭen Marŝas la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio

Marŝo sur Nia Propra Vojo de Industriigo

La Ruĝa Standardo de Daking en Plia Brileco

Noviĝas la Penso de la Homoj kaj Noviĝas la Fizionomio de la Fabriko

Renminbi — Plej Stabila Mono Malofta en la Mondo

Fremdlandaj Amikoj en Ŝaŭŝan

Turni Vizaĝon al Bazaj Unuoj kaj Enradikiĝi en Rotoj

Por Revolucio Li Volontis Vivoferon

Duonagrokultura kaj Duonkuraca Taĉmento

Dekknabina Paŝtgrupo

Reedukis Min la Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj

Dong Cunĵuj Sinofere Eksplodigis Fortikaĵon

La Albana Popolo Antaŭenmarŝas sur Revoluca Vojo (*bildserio*)

La Novaj Caroj Turnis Sovetunion Denove en Malliberejon de la Diversaj Nacioj

Plena Nudiĝo de la Lupa Naturo de Nixon



# La Komunisma Batalanto

## Caj Jonghiang Tutkore por la Kolektivo

(maŝinbrodaĵo)

Kamarado Caj Jonghiang, batalanto de iu trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, estis heroo kreskinta sub la nutrado de Maŭzedongpenso. Iun fruan matenon en oktobro de 1966, kiam li gardostaris ĉe la fervoja pontego super Kiantang-rivero ĉe Hangĝou, li subite trovis grandan lignan stangon metitan transverse sur la trako je loko pli ol 40 metrojn for de li. Kaj en tiu tempo fluge kuris al la ponto trajno plena de ruĝaj gvardianoj. Li tuj sinforĝese kuregis al la obstaklo kaj ĝin forigis. Tiel li oferis sian vivon por protekti la ruĝajn gvardianojn kaj la pontegon kaj skribis brilan paĝon en la historia libro pri revoluciaj herooj de la proletaro de nia lando.



# Tutkore kaj Tutanime Servi al la Monda Popolo

La ĉinaj kuracaj laborantoj en eksterlando firme tenas en sia memoro instruojn de Prezidanto Maŭ, tutkore kaj tutanime servas al la monda popolo, kaj volas nepre fariĝi proletaraj internaciismaj batalantoj, kia Norman Bethune. Ili havas altan devkonscion en sia laboro kaj traktas la pacientojn ekstreme varmkore kaj tiel estas alte laŭdataj de la popoloj de la aziaj kaj afrikaj landoj, kie ili laboras. Oni nomas ilin "la plej bonaj kuracistoj edukitaj de Prezidanto Maŭ".

*(Supre)* Ĉina kuraca taĉmento rondiras en la kamparo de Zanzibaro kaj donas kuracajn helpojn al kamparaj virinoj kaj infanoj.

*(Sube maldekstre)* La zanzibara virino (dua de dekstre), kiu suferis kruran paralizon kaj estas resanigita de ĉinaj kuracistoj post kelkmonata kuracado, alinomas sian filinon "Ĉinio" por esprimi sian dankon al Prezidanto Maŭ kaj varman amon al la nova Ĉinio.

*(Sube dekstre)* Kuracisto de la ĉina inĝeniera grupo laboranta en Gvineo kuracas gvineajn laboristojn en iu konstruejo.









*(Maldekstre)* La 78-jara kamparano Ondze Ephraim de Kongolando (B.), kiu perdis vidkapablon dum pli ol dek jaroj pro katarakto, reakiris sian vidon dank' al la operacio farita de ĉina kuracisto.

*(Supre dekstre)* Kuracistoj de la ĉina fervoja esplora, mezura kaj projekta grupo uzas la ĉinan tradicion kuracarton akupunkturo por kuraci artikiton, kapdoloron k. a. oftajn malsanojn en kamparo de Zambio kaj ricevis grandan efikon.

*(Sube dekstre)* Kuracisto de la ĉina inĝeniera taĉmento kuracas malsanan infanon de nepala laboristo-vilaĝano.





